
ISSN 0984 7626

# evangeliaj kajeroj

internacia kristana revuo en Esperanto

# PACO JUSTECO



7
1990

EVANGELIAJ KAJEROJ

*internacia kristana revuo en Esperanto*

-----------------------

Ni daŭre serĉas kunlaborontojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La *artikoloj* estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn *kontribuaĵojn, recenzojn, noticojn,* kiuj iel rilatas al la temo. Vi ankaŭ povas fari intervjuojn, poste tradukitajn.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

----------------

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé Maupertuis, Francio ; tel. 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

---

*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*
*Dépôt légal : juillet 1990.*
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.*
*Imprimé par Michel Brun SARL, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex).*

Tio ne estas justa ! Ĉi tio estas la titolo de televida programo en Francio.

Kaj do, kio estas justa ? Kio estas justeco ? Multaj homoj batalis por justeco. Ĉu justeco estas resumebla de la franca revolucia slogano "Libereco, Egaleco, Frateco" ?

Kaj, ĉu nome de "la" justeco oni ne militis ? Ĉu gravaj militoj ne ekfajris ĝuste pro "justeco" ? Ĉu eblas paco sen justeco ? Ĉu eblas justeco sen paco ?

Jam de kelkaj jaroj, la eklezioj pridiskutas ĉi tiujn temojn. Ni ankaŭ tion faris en la Kristana Kongreso en Annan Court en julio 1989. Bedaŭrinde mi ne ricevis ĉiujn tektojn prezentitajn en Britio. Nur aperos ĉi tie tiuj, kiuj jam aperis en *Dia Regno*, en disaj numeroj. Krom la propraj artikoloj mi aldonis artikolon aperintan en *Monato*, kiun vi tre certe aprezos. Mi esperis aliajn artikolojn, sed vi jam havas en la manoj sufiĉe, almenaŭ laŭ mi, interesan kajeron, por informiĝi kaj veki diskutojn.

---

Denove prokrastego ! Ĉu mi resaniĝos el ĝi ? Espereble !

# PARABOLO DE LA GRACO, KIUN DONAS LA MONDO

La Regno de Dio similas al viro, sidanta sur dika heredaĵo. Li diris en si mem : Mia animo, ci ricevis profitajn bienojn, diplomojn de pluraj grandaj lernejoj en Francio kaj Usono, talenton, mondospertón. Jen ci, ĉe la profito de granda graco. Nu malligu cin el tiuj riĉaĵoj kaj investu cian energion en la etika esploro.

Sed estis en la sama urbo viro sidanta **sub** la dika heredaĵo. Kaj li diris mallaŭte : se mi povus elstrebi sufiĉe por forpreni min el la fekaĵo en kiu mi estas absorbita, miaj infanoj havos ŝancon por liberigi sin...

Kiel ŝajnas al vi ? Kiu el ambaŭ altiĝos plej supre super la amo al riĉaĵoj ? La viro supersidanta aŭ la viro subsidanta ?

Vere mi diras al vi : la socia ambicio de la malgranduloj estas pli valora por via Patro, ol la etika bezono de la granduloj. Tamen ambaŭ estas trompigiloj.

Kaj ankaŭ : en via volo pri sociala regajno, vi diras inter vi : la senlaborulo estas savata, kiam li ĉesas esti petanto pri laboro kaj fariĝas ofertanto de kompetenteco. Ĉu vi ne vidas, ke la senlaborulo estas savata, kiam li fariĝas kapabla de favorkoreco ? Ĉar tiam li estas pli granda ol la tuta ekonomia kaj socia sistemo, kiu lin kondamnis al pensoj de malgajnanto. Tial estas pli da ĝojo ĉe via Ĉiela Patro por nur senlaborulo, kiu pardonas ol por milo da decidantoj, kiuj vidas la finon de sia psikanalizo.

el *Le Protestant de l'Ouest*, 146, juin 1990.
trad. A. Bachelier

# LA REGNO DE DIO KAJ LIA JUSTECO

Kelkfoje oni aŭdas la opinion, ke ekzistas fundamenta kontrasto kaj esenca diferenco inter la t.n. Malnova kaj Nova Testamentoj. Unu pasis kaj arkaikas, la alia estas valida kaj aktuala. Unu atestas pri leĝo, la alia pri graco. Unu estas karno, la alia, kontraŭe, spirito. Resume, ili rilatas inter si kiel sklaveco kaj libereco, kiel ombro kaj lumo. Mi jam antaŭe konfesas laŭte, ke ĉi tiu vidmaniero nepre ne estas mia ! Konsenkvence, mi ŝatas paroli pri "la Biblio de Jesuo" (TANAĤ) aŭ Unua Testamento, kaj la "apostola atestaro" aŭ Dua (Denova) Testamento, komentanta la Unuan. La Sanktan Skribon mi, sekve, ne konsideras libro konsistanta el du volumoj, el kiuj unu estas "malpli perfekta" kaj la alia "pli perfekta". Mi preferas defendi la tezon, ke Jesuo per sia predikado celis pliradikaligi la sanktan vivo-instruon, kiun donis Moseo kaj la profetoj.

Sed ĉu oni povus tezi, ke **justeco** karakterizas la vivpraktikon de la judoj, dum amo al la proksimulo estas la kerno de la kristana kredkonvinko ; justeco kiel abstraktaĵo kontraste kun konkreta karitato ? Ne, justeco tute ne estas abstrakta vorto en la Biblio ; ĝi, male, koncernas ĉiutagan vivovojon de homo fidela, preĝanta, laboranta, amanta, fastanta, ktp., kiu tute inkluzivas la amon al la proksimulo. Ni vidos en ĉi tiu artikolo, ke la "emblemo" de la Regno estas justeco, kvazaŭ liganta la tempojn antaŭ kaj post la veno de la Mesio... Pluraj lokoj en la denov-testamentaj skribaĵoj evidentigas, ke vortoj kiel kompatemo kaj bonfaremo harmonie kongruas kun justeco (ekz-e Mat 6:1 ; 2 Kor 9:9).

## Kio estas justeco ?

Mi komence iom konsideru la "teologian" fakterminon **justeco** ( = la eco de just-ulo, de tiu kiu faras justecon, 1 Joh 3:7), pro ĝiaj multaj nuancoj malfacile priskribeblan kaj ankoraŭ pli malfacile difineblan. PIV donas kvar signifojn : 1. Eco de tio, kio estas justa ( = respektanta egale kaj senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartenaĵon) ; 2. Sento de la konscienco ( = interna juĝo), per kiu

---

JUSTECO, BIBLIA VIDPUNKTO · JUSTICE, POINT DE VUE BIBLIQUE · JUSTICE, BIBLICAL POINT OF VUE · GERECHTIGKEIT, BIBLISCHER GESICHTSPUNKT · JUSTICIA, PUNTO DE VISTA BíBLICO · GIUSTIZIA, PUNTO DI VISTA BIBLICO.

oni redonas al ĉiu lian rajtaĵon ; 3. Plenumado de tio, kio estas justa ( = virta, prava, ĝusta) ; 4. Justico.

Justeco do ĉiam funkcias sur la kampo de rajtoj kaj devoj en la kadro de rilatoj de la homoj **kun si mem** kaj **kun aliaj**. Kaj por homoj kredantaj nelaste **kun Dio**, kiu estas perfekte justa. Klare estu, ke biblia justeco estas pli ol tio, kion formulas la klasika maksimo «doni al ĉiu la onian!»

Tiuj, kiuj bone konas la literaturon de Izraelo, scias ke ĝian tutan pensadon, ankaŭ teologian, emfaze influas la emo reguladi kaj strukturadi per principoj, leĝoj, kriterioj kaj normoj, kiuj detale "receptu" la socian vivon de homoj kun homoj laŭ ĉiuj ĝiaj rilatoj, formoj, cirkonstancoj kaj interesoj. La kontaktoj interhomaj estu bonaj, eĉ bonegaj en tiu senco, ke ĉiu el ili povu disvolviĝi al la plej alta nivelo de homeco kaj atingi la plej riĉan gradon de humana vivo. Afero de moralo, etiko, disciplino, asketismo, de ĉiutaga lernado kaj daŭra ekzercado. Sur kaj ekster la lernejaj benkoj. Afero samtempe de graco, fido, fideleco, religia kredo. La hebreaj SEDEK kaj SEDAKA, kiujn oni ĝenerale tradukas per *δικαιοσυνη* (greke), *justitia* (latine) kaj *justeco* (Esperante) montras al ideala kondutaro, kiu konkrete kaj praktike celas bonon por la komunumo kaj estas vera beno por ĉiu el ĝiaj membroj ; patrono eliminanta pekon plej detruan kaj malliberigan kaj alportanta ŜALOM-on plej sanigan kaj savan.

## La evangelio laŭ Mateo

Estas interese, ke la termino justeco tre oftas en la evangelio laŭ Mateo, kiu skribaĵo direktas sin ĉefe al la judoj. Mateo pentras en sia surmonta prediko Jesuon kiel denovan Moseon, kiu iris tra la Jordano por esti baptata de Johano, «ĉar tiel decas al ni (plurale !) plen-umi ĉian justecon» (3:15). Mi preferus traduki : ĉar tiel nepras aŭ necesas al ni plen-umi (greke : *πασαν*) justecon. Ĉi tie estas parolo pri la justeco de Jesuo, kaj estas li, kiu baldaŭ poste instruos, ke «feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili sat-iĝos» (5:6). «Feliĉaj estas ankaŭ tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo» (5:10) : gravaj tekstoj rilate al la tasko al mi komisiita, nome ke mi verku pri la temo "la regno de Dio kaj Lia justeco" ! Plenumi kaj satiĝi ... Ĉu plena kaj sata ne estas adjektivoj

preskaŭ sinonimaj ?

Jesuo nepre ne venis por detrui la Toraon kaj la profetojn, sed por plen-umi !

> «Vere, mi diras al vi : ĝis la ĉielo kaj la tero forpasos, nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo, ĝis ĉio plen-umiĝos» (5:18).

Esence estas ke la justeco de la disĉiplo de Jesuo superu tiun de... skribistoj kaj fariseoj, ĉar alimaniere «vi tute ne eniros en la regnon de la ĉielo» (5:20). Konklude oni povas resumi, ke justeco estas plena observado de eĉ la plej malgrandaj ordonoj ! Tio estas : senmakule vivi kiel justulo, piulo, sanktulo, perfektulo, malpekulo : homo plena kaj sata de boneco, servanta al Dio kaj homoj. Nur justeco faras homojn veraj filoj kaj filinoj de Dio !

## Serĉu la Regnon !

Pripensinda estas la imperativa vorto : «Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta» (5:48). En Sia perfekteco, tiu Patro scias, kion *ni bezonas* por vivi. Li volas, ke *ni ne demonstracie*, teatre kaj hipokrite faru **nian** justecon antaŭ la homoj (6:1), «sed **celu** unue la Regnon de Dio kaj Lian justecon» (kaj ĉio alia aldoniĝos). Nia traduko preferas uzi "celi" por redoni grekan vorton multnuancan : serĉi, gardi, deziri, sopiri, bezoni, studi, fervori, strebi, postuli, peti, demandi, konsideri, k.a. Bela ekvivalento estus "esplori" (en la germana lingvo UNTERSUCHEN, 'sube' serĉi, t.e. serĉi la radikojn kaj fundamentojn de la Regno, la konstitucion (Toraon). Homoj kredantaj estas invitataj al tutkora kaj diligenta agado per la okuloj, oreloj, manoj, pensoj kaj streboj. Sed ĉu ni finfine povos ĝoje elkrii, ke dank'al la ĉielo ni **trovis** la regnon de Dio ? Kaj se jes, kion do ni trovis ? Ĉu lokon geografian, ĉu staton interfeliĉan ? Jesuo pli ofte parolas pri "eniri en la regnon". Tre povas esti, ke **justeco** estas klarigo, eksplicito kaj konkretigo de **regno**, nome en la senco de **ekzegeza "kaj"**. Serĉi la regnon de Dio nelaste estas kritike levi demandojn : kie estas mia frato, fratino ? Kiel mi povas esti la paŝtisto de mia proksimulo ? Kien mi iras kaj laŭ kiu vojo ? Kie mi estas ? Kial mi tion faras ? Kiel mi preĝu ? Kie restas tiu Via regno ? Kio estas justa en tiu situacio , Kiel mi praktiku justecon, se la alia... ? Kiam finfine mi ĉirkaŭbrakos la Mesion kaj lian promeson ?

Klare Jesuo faras hierarkion de valoroj. Unuflanke aferoj ĉiutagaj sekve de tio ke homo devas manĝi, trinki, sin vesti k.s. por vivi. Aliflanke aferoj pli superaj, al kiu kategorio apartenas la regno de Dio kaj Lia justeco. La unuaj estas aldonotaĵoj (la zorgotereno de la Ĉiela Patro), la aliaj estas aĵoj strebindaj kaj strebendaj unualoke inciate de la homo, kvankam ade sub la spiro de la Spirito. Kial ni **unue** celu kaj strebu ? Bengel diris : kiu la regnon serĉas unue, tiu baldaŭ ĝin serĉas nure *(qui id primum quaerit, mox id unum quaeret)*. Ĉi tie distingiĝas inter si judoj kaj nejudoj konforme al la surmonta "leĝdonado" (6:7,32).

## Sankta Paŭlo kaj justeco

Ĉie la Sanktaj Skriboj atestas pri tio, ke Dio estas justa. Unuarangas la Psalmaro. Preĝante la homo povas elkrii : «Vi estas justa, ho Dio, kaj faru min justulo !» Plej bela ekzemplo estas la unua psalmo. Justulo estas tiu, kiu agnoskas Dion kiel sian reĝon kaj konsideras Liajn leĝojn kiel firman konstitucion de la regno. Tiuj leĝoj, instruoj, vojindikiloj veke kaj voke inspiras al vivo de justulo, kiu servas Dion sentime, en sankteco kaj justeco ĉiujn siajn tagojn (Luko 1:75). Pri la Sankta Evangelio Paŭlo epistolis al la Romanoj, ke la justeco de Dio malkaŝiĝas en ĝi kiel estas skribite : «la justulo (virtulo) vivas el fido» (1:7).

Ĉu oni povas diri, ke la or-donoj, paralantaj pri la justeco de Dio, estas kvazaŭ ŝlosiloj, havigantaj aliron al la regno ? Nu, ni ne bezonas serĉi ilin, sed studi, mediti kaj praktiki kiel la justulo el la unua psalmo ! Tage kaj nokte. Admire kaj sopire. Kape kaj kore. Mane kaj piede.

En alia epistolo Paŭlo skribas pri la graco de Dio, kiu aperis,

> «portante savon al ĉiuj homoj, instruante nin, ke forigínte malpiecon kaj laŭmondajn dezirojn, ni vivadu sobre, juste kaj pie en la unua mondo, atendantaj la feliĉan esperon kaj epifanion de la gloro de nia granda Dio kaj Savanto, Jesuo Kristo, kiu donis sin por ni, por elaĉeti nin el ĉiu **maljusteco** kaj por purigi al si popolon propran, fervoran pri bonaj faroj» (Tit 2:11-14).

Maljustulo estas tiu, kiu forneas la Toraon kun ĝiaj normoj pri justeco kaj tiel faras "ANOMIA" (sennormecon).

Paŭlo diras, ke la homo-laŭ-la-koro-de-Kristo vivu en harmonio kun si mem (sobre, prudente, memkritike, modeste, modere, saĝe), kapabla klare distingi inter bono kaj malbono. Necesas sana menso (σωφρόνως). Due, li/ŝi vivu en harmonio kun aliaj homoj (juste, prave, rekte, virte, senkulpe, dece). Necesas pripensema, matura kaj ekvilibra juĝo pri la socia vivo kun ĝiaj rajtoj kaj devoj kaj ade ŝanĝiĝantaj situacioj (δικαίως). Trie kaj laste nepras vivi en harmonio kun Dio, pie, religie, respekte, fidele, amplene. Necesas la pens- kaj ag-maniero de la vera sanktulo, kiu estas en seninterrompa sincera rilato kun **'sia'** Dio, lernante, preĝante, meditante, irante, himnante, vivante (εὐσεβῶς) ; homo revanta pri la regno jam preparita kaj troviĝanta kvazaŭ sub la mano, en la mano !

## Konklude : vivi juste

Se iu atingis tiun trioblan harmonion, aliaj emas supozi ke justulo estas en nia mezo, kiu **unue** (poste **nure** !) celas la regnon de Dio kaj Lian justecon kaj grandafide taksas "la alion", tio kion serĉas nekredantoj. Alivorte : vivi juste estas sekvi la Mesion !

La vivo de Jesuo evoluis inter la matea «nepre necesas al ni plenumi ĉiun justecon» (3:15) kaj la johana «estas finite» (19:30). La plurala Jesuo plenumis ĉiun justecon kaj pagis nian tutan ŝuldon ! Se ni vere kredus tion, ni povus pli libere spiri kaj iri ! Estas ja **Dia** regno, kiu alvenu kaj **Dia** justeco, kiu energiu kaj servu al ni kiel "modelo" invitanta kaj imitinda. Kiom konsolaj vortoj por ni, pekuloj, vivantaj en kronika malharmonio kun ni mem, la liaj kaj nia Kreanto... Ĉio, kion ni bezonas kredi kaj praktiki, estas esprimata per la trankviliga alvoko : «Serĉu kaj sekvu la Justulon, kiu estas unu kaj unika, ĉar plenumis ĉion kaj kvitancis ĉion.»

Jacques Tuinder, Nederlando

---

Jacques TUINDER *(töjnder)*, nederlandano (1933), studis filozofion kaj teologion, kaj poste en sociala akademio, laboras kiel klinika social-helpisto. Iniciatis **AgadonE₃**.

# KELI ☆ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed.Resp. Germanujo.

**Sekretario:** E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn (Nederlando). ☎ 01720-20222.

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume 25 ned. guld. — Membro-subtenanto 37,50 ned. guld. — Membro de IKUE 12,50 ned. guld. — Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de "Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI», van Hogendorplaan 4, NL-3135 CD Vlaardingen.

**DIA REGNO**
Oficiala organo de KELI
Fondita 1908

**Redaktoro:** Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé-Maupertuis, ☎ 49 46 80 21

**Manuskriptojn** oni sendu nur al la redaktoro!

**Abonprezo** sen membreco en KELI: 21 ned. guld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kaso de KELI [vidu supre].

**Ekspedado** de «Dia Regno» kaj membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, NL-3135 CD Vlaardingen.

*Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redakcio.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj.

Monata revuo - maandelijks tijdschrift. ISSN 0167-9554.

**Verantwoordelijke uitgever:** P. Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (Belgio).

## AL MALRIĈULOJ EVANGELIO ESTAS PREDIKATA

Luko raportas ĉi tiun vorton en la 7-a ĉapitro de sia evangelio : Johano, la Baptisto, aŭdas en karcero pri la faradoj de Jesuo kaj li sendas du el siaj disĉiploj al Jesuo, kiuj demandas lin : «Ĉu vi estas la venonto aŭ ĉu ni atendu alian ?» Kaj la respondo de Jesuo estas :

> «Iru kaj sciigu Johanon pri tio, kion vi vidas kaj aŭdas : blinduloj vidas, lamuloj marŝas, lepruloj estas purigitaj, kaj surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, al malriĉuloj evangelio estas predikata. Kaj feliĉa estas ĉiu, kiu ne falpuŝiĝas pro mi.» (Luko 7:18-23)

Jesuo aludas ĉi tie vortojn el la 29-a kaj la 61-a ĉapitroj de profeto Jesaja. En Jes 29:18 la sav-tempo de la Eternulo estas priskribita, en kiu blinduloj vidas, surduloj aŭdas kaj la malriĉuloj, la mizeruloj havas grandan ĝojon en la Eternulo, kaj Jes 61:1-2 parolas pri la Sankt-oleito de la Eternulo, kies misio estas anonci al la mizeruloj la favorkorecon de la Sinjoro. Ĉi tiun vorton Jesuo legas ankaŭ en la sinagogo de Nazaret kaj li aplikas ĝin al si mem kaj sia misio. Li estas la plenumo de ĉi tiu vorto (vidu Luko 4:16-21).

Kiuj estas nun la malriĉuloj kaj mizeruloj, al kiuj la Evangelio estas predikata ? La profetoj antaŭ la transloĝiĝo de la popolo de Izrael en Babilono vidis la malriĉulojn kiel la karulojn de la Eternulo. Dio mem zorgas pri ili. Sed por la profetoj egalis ankaŭ la malriĉuloj kaj la popolo de Izrael, la popolo de la Eternulo (Vidu Amos 2:7 ; Jes 3:13-15 ; Miĥa 2:8-11 ; 3:1-4).

### Kiuj malriĉuloj ?

En la tempo de ekzilo kaj post ĉi tiu tempo okazis ŝanĝiĝo en la bildo de malriĉuloj. En ĉi tiu tempo ne plu estas tiu homo la malriĉulo, al kiu mankas la mondaj bonaĵoj, mono, posedaĵoj, ktp., sed tiu, kiu vivas pie kaj humile antaŭ la Eternulo. La Plejpotenculo batalas por la piulo kaj ŝirmas lin kontraŭ la potenculoj de l' mondo. Precipe la tekstoj de tielnomata "Deŭtero-Jesaja" (la dua Jesaja) parolas pri tiuj malriĉuloj,

---

**LUKO 7, MALRIĈULOJ** · LUC 7, PAUVRES · LUKE 7, POOR · LUKAS 7, ARMEN · LUCAS 7, POBRES · LUCO 7, POVERI.

ekzemple en la "kantoj pri la servisto de Dio" (Vidu : Jes 42:1-9 ; 49:1-9c ; 50:4-9 ; 52:13-53:12).

La "Magnificat", la laŭd-kanto de Maria, kiun ni legas en Luko 1:48-55, daŭrigas la tradicion de la Malnova Testamento, transprenas ĝin en la Novan Testamenton. Ankaŭ ĉi tiu kanto parolas pri la piuloj kaj malpotenculoj, kiuj estas ŝirmataj de la Eternulo.

Maria mem estas ja malriĉulino. Ŝi konfidas Dion kaj Lian Vorton, kaj ŝi konstruas sian vivon sur la Vorto de Dio. Sed ŝi nur povas fari tion, ĉar ŝi akceptas, ke Li gvidas ŝin laŭ Sia volo, ĉar ŝi jesas Lian volon kaj estas preta servi Lin.

En Mat 5:3, Jesuo nomas la malriĉajn en spirito feliĉaj ĉar al ili estas la regno de la ĉielo. En la paralela teksto ĉe Luko mankas la vorto "en spirito". Luko raportas la "ve-"vorton de Jesuo : «Ve al vi riĉuloj !» (Luko 6:24).

Ĉu tio signifas, ke ĉiu malriĉulo aŭskultas al la prediko de la Evangelio kaj ĉiu riĉulo ne aŭskultas ? Sed ni legas en la evangelio pri la impostisto Levi-Mateo, kiu estas vokata de Jesuo por esti apostolo kaj pri la tre riĉa impostisto Zakĥeo, kiu spertas la Dian savon ! Ili ne estas malriĉuloj.

Laŭ mia opinio oni povas esti malriĉulo kun la koro de riĉulo kaj ankaŭ riĉulo kun la koro de malriĉulo. Kiu estas la plej grava signo de malriĉulo antaŭ Dio ? Ŝajnas al mi, oni povas diri bilde : tiu, kiu staras antaŭ Dio kun malplenaj manoj, petante ne postulante. La malriĉulo antaŭ Dio estas kiel la impostisto en la parabolo en Luko 18:13-14, kiu scias sin mem pekulo antaŭ Dio. Al li donacas Dio Sian pardonantan gracon. Ankaŭ la infanoj estas malriĉaj en la senco de la evangelio. Ili atendas ĉiun bonon de la gepatroj, ne postulante sed sciante, ke la amo de la gepatroj zorgas pri ili.

Jesuo postulas de siaj disĉiploj, ke ili estu infanoj antaŭ la Patro ĉiela. La infano levas siajn okulojn al la gepatroj, al Dio, kaj ne rigardas de supre. Rigardante de supre mi komparas min kun la aliaj kaj komparante mi juĝas kaj kondamnas.

## "De supre"

La bildo de "rigardi de supre" entenas la speron, ke mi opinias min pli bona, pli alta ol la aliaj. Mi estas riĉa, mi estas pli riĉa je scio, je bonaj verkoj, ktp. Tio estas la sinteno de fariseo en la jam citita parabolo en Luko 18. Li rigardas de supre la impostiston kaj la aliajn. Pro tio li malsupreniras al sia domo, malpravigita li ne povas aŭdi la vorton de savo. Li havas plenajn manojn.

Ankaŭ la viro, kiu demandas al Jesuo, kion li faru por heredi la eternan vivon, ankaŭ li havas plenajn manojn kaj li ne kapablas malplenigi ilin. Li malgajiĝas kaj foriras malgaja for de Jesuo, aŭdante la vorton de Jesuo :

> «Iru, vendu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo ; kaj venu kaj sekvu min !» (Mar 10:21-22)

Ĉi tiu homo volas ŝirmi sin mem kaj ne lasi sin mem al Dio, al Lia ŝirmado, al Lia graco. Mateo, Marko kaj Luko raportas pri ĉi tiu homo (vidu Mat 19:16-30 ; Mar 10:17-31 ; Luko 18:18-30), sed nur Marko skribas, ke Jesuo amas ĉi tiun homon, kiu vere serĉas la Regnon de Dio. Sed ankaŭ la amoplena rigardo de Jesuo ne povas helpi lin lasi, forlasi siajn posedojn. Kaj Jesuo - ankaŭ malĝoja - ĉirkaŭrigardante diras la gravan vorton al siaj disĉiploj :

> «Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio. Infanoj, kiel malfacile estas por tiuj, kiuj fidas al la riĉo, eniri en la regnon de Dio. Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio !» (Luko 18:24-25)

## Kapablaj ?

Oni povus malesperi aŭdante ĉi tiun vorton de Jesuo. Kiu el ni kapablas malplenigi siajn manojn, sin mem antaŭ Dio ? Neniu el si mem ! Sed ĉi tie jam komenciĝas la malplenigo de manoj, komencas la malriĉo antaŭ Dio. Ekkoni mian malkapablon kaj akcepti ĝin kaj alporti ĝin al Dio, tio igas min malriĉa antaŭ Dio. Se mi akceptas miajn malplenajn manojn, mi ne plu volas brili antaŭ Dio kaj antaŭ miaj proksimuloj. Mi povas diri kune kun Petro, kiu parolas ĉi tiun vorton post la akirado de granda amaso da fiŝoj : «Foriru de mi, ho Sinjoro, ĉar mi estas pekulo !» (Luko 5:8)

Petro, kiu estas en ĉi tiu momento riĉega fiŝ-kaptisto, fariĝas malriĉulo, ĉar la Dia graco povas tuŝi lian koron. Li rimarkas sian senpotencon kaj samtempe li rajtas sperti la Dian helpon. Li akceptas ĝin. Li scias sin mem malgranda antaŭ Dio.

Precipe la pekuloj kaj malsanuloj estas malriĉuloj, kiuj aŭdas la Evangelion, kiuj estas pretaj aŭskulti al Jesuo. Kaj li, ĉiam denove, ripetas, ke li estas sendata al ili. La fariseoj, kiuj estas konvinkitaj de sia justeco, grumblas, kaj eĉ protestas, ke Jesuo manĝas kun pekuloj, ke li parolas kun paganoj kaj malpuraj homoj, ke li lasas sin tuŝi de pekulino. La raporto pri la unktado de Jesuo fare de la pekulino, precipe laŭ la evangelio de Luko, montras, kiu estas malriĉa kaj kiu estas riĉa antaŭ Dio : la fariseo Simon invitas Jesuon, ĉar li estas riĉa. Li havas sufiĉe da mono kaj da renomo, ke li povas inviti la faman rabenon. Li volas rigardi ĉi tiun Jesuon. Li akceptas Jesuon en sian domon, sed ne en sian koron. Jesuo ne estas ŝatata, amata gasto. La virino ankaŭ ne estas malriĉa, tute ne. Ŝi aĉetas multekostan ŝmiraĵon por 300 denaroj, la laborenspezo de tuta jaro por dungio, kaj disipas ĝin por la piedoj de Jesuo. Sed ne okaze de ĉi tiu disipo ŝi fariĝas malriĉa antaŭ Dio. Ŝi igas sin mem malriĉa, irante en la domon de Simon kaj sciante, ke ŝi estas malestimata de Simon kaj liaj amikoj. Sed malgraŭ ŝi iras en la domon kaj unktas la piedojn de Jesuo kun la multekosta ŝmiraĵo. Ŝi ne kalkulas, ŝi nur donacas, ĉar ŝi amas kaj amo ne kalkulas. Amo malriĉigas sin mem ! Kaj ĉar la virino malriĉigas sin mem antaŭ Jesuo, ĉar ŝi sentas sin mem kulpa kaj malgranda antaŭ Dio, pro tio ŝi rajtas aŭdi la Evangelion, la vorton de Dia pardono kaj de graco kaj savo. Jesuo montras al Simon kial ŝi kapablas aŭdi la Evangelion, la vorton de savo kaj de pardono, kaj kial Simon ne povas aŭdi ĝin. Li ne estas malriĉa, li ne havas malplenajn manojn.

Sama afero en la parabolo pri la ne-kompatema servisto (vidu Mat 18:23-35). La reĝo pardonis al li grandegan ŝuldon. Sed li estas kaj restas riĉa en sia koro. Li ne povas forlasi sian mon-postulon kaj lasi libera sian kunserviston. Li ne kapablas ankaŭ donaci, preterdonaci la korfavoron, kiun li mem rajtas sperti. La donaco de la reĝo ne kortuŝas lin mem. Li nur kalkulas. Pro tio li perdas la jam ricevitan donacon. Li ne rajtis eniri en la Regnon de la ĉielo.

Ankaŭ la parabolo en Mat 20:1-16 montras, ke nur la kompatema amo, la amanta kompatemo igas la homon preta por la Evangelio. La unuaj laboristoj ne povas kaj ne volas akcepti, ke la dommastro estas bonkora kaj kompatema, ke li donas al ĉiu laboristo, kiun li bezonas por la taga vivo.

Precipe la malsanuloj, venante al Jesuo, estas malriĉaj. Ili scias, ke ili bezonas la helpon de Jesuo, ili havas malplenajn manojn. Kaj ĉar ili igas sin mem malgrandaj antaŭ Dio, pro tio ili rajtas aŭdi la Evangelion. Ili sentas sin dependaj de Dio, kaj ili rajtas aŭdi la vorton de savo. Estas tre interese, ke Jesuo neniam sanigas homon, kiam tiu aŭ aliaj homoj ne petas lin. La malsanulo devas esprimi sian peton, sian deziron. Li devas montri sian fidon, sian konfidon. Li devas sin mem konfesi malsana, manko-hava, li konfesas sin mem peka. La peko estas la plej granda malriĉo antaŭ Dio, sed samtempe ĝi estas la plej granda kontraŭaĵo sur nia vojo al Dio. Ni, la homoj de ĉiu tempo, ofte tre malfacile konfesas, ke ni estas pekaj, pekuloj, ke ni ne estas perfektaj. Estas formo de riĉeco, ankaŭ. Nur tiam, kiam ni akceptas niajn ne-perfektaĵojn, niajn pekojn kiel pekojn, tiam ni estas malriĉaj antaŭ Dio kaj ni povas aŭdi la vorton de Evangelio, la vorton de Jesuo :

«Viaj pekoj estas pardonitaj !»

La sperto de malriĉo antaŭ Dio, kiu pretigas aŭdi la Evangelion, ĉiam efikas en la aŭskultanto. Tiu, kiu aŭdas la Evangelion, fariĝas mem mesaĝisto de Evangelio. La malplenaj manoj, kiujn plenigis Dio, mem donacas nun. Zakĥeo, kiu ricevis la gracon kaj la pardonon de Dio, povas lasi sian riĉecon kaj povas donaci al la malriĉuloj. La malsanuloj, kiujn Jesuo sanigis, anoncas la laŭdon de Dio, de Jesuo. Petro kaj la aliaj apostoloj, kiuj spertis la potencon de Jesuo en la akirado de granda amaso da fiŝoj, forlasas ĉion kaj sekvas Jesuon. Mi povus daŭrigi la nombradon.

Resumante mi povas diri : ĉiu, kiu scias pri sia neperfektaĵo, kaj kiu ankaŭ akceptas ĝin, kiu vivas antaŭ Dio kun "malplenaj manoj", tiu rajtas aŭdi la predikon de Evangelio. Malplenaj manoj ne nur estas malplenaj de materialaj bonaĵoj (ili estas, povas esti, granda kontraŭaĵo, ĉar ili donas ja materialan sendependecon) sed la manoj devas precipe esti malplenaj de mi mem, de mia *ego* (mia mi-o), de miaj deziroj kaj mia fiero kaj envio. Malriĉulo antaŭ Dio estas tiu, kiu havas la malfermitan koron

de infano, la malfermitajn manojn, kiuj povas ricevi kaj samtempe donaci.

Theotima Rotthaus, F.R. Germanio

---

Theotima **Rotthaus**, germanino (1937). Studis teologion kaj matematikon en Münster (Vestfalio). De 1960 benediktanino en la monaĥejo St Lioba en Freiburg/Breisgau. Ŝi poste studis en la pedagogia universitato en Freiburg. Instruas religion kaj matematikon. Esperantistino de 1981. Sendas ĉiumonate *biblioleteron* en Esperanto.

# ĈIELA PACO KAJ MONDA PACO

## Paco ?

Kio estas paco ? Kio estas paco, ke oni tiel klopodas akiri ĝin ? Kio forprenis la pacon el niaj koro, hejmo, laborejo, socio kaj mondo ? De kiam estiĝis la t.n. malpaco en la mondo ? Ĉu iam antaŭe estis vera paco en tiu ĉi mondo ?

Rilate al paco, oni multe pripensas, studas, kaj verkas eĉ disertaciojn pri tio, kio estas kaj kiel ni povas vivi en paco. Sed ĉu vi iam aŭdis ian solvon, per kiu la homaro povas konstante ĝui pacon en tiu ĉi mondo ? Ĉu vi opinias, ke homoj estas serĉantaj la pacon en ĝustaj loko kaj vidpunkto ?

Oni diras, ke krimo antaŭiras la leĝon kontraŭ tiu krimo, malsano ĉiam superas la medikamenton kontraŭ tiu malsano, kaj milito kaj malpaco konstante minacas la pacon, kiun ni tiel sopiras. Kaj oni aldonas, ke tio estas la atributo de la mondo. Do ĉu la homaro neniam havos la eblecon vivi en paca mondo ?

## Paca laboro

En Oriento ni havas tre interesan diron de parabolo : KAG ĜU KU KOM ( 각주구검:刻舟求劍 ). Tiu ĉi diro signifas malsaĝan agon de homo. La laŭlitera senco estas : Ŝipo estas sur akvo, kaj homo gravuras la randon de la ŝipo por signi la lokon, de kie lia glavo defalis en akvon. Ĉu vi pensas, ke li povos retrovi la glavon ? La akvo fluas kaj la ŝipo moviĝas. Kiel do la ŝipo povus resti sur la sama loko ? Absolute ne ! Ĉia klopodo de la homaro por akiri pacon rememorigas al mi tian ridindan kaj sensencan agon. Kvankam homoj forte sopiras pacon, tamen ili ĝin serĉas en malĝusta loko.

Manĝado estas nepre necesa ago por daŭrigi nian vivon. Sed se iu, ne manĝante nutraĵon, prenas nur medikamentojn, kiun oni diras bona elemento por sano, li eĉ ŝi baldaŭ mortos. Preni manĝaĵon estas esenco, kiu

---

**PACO, JESUO KRISTO** · PAIX, JÉSUS-CHRIST · PEACE, JESUS CHRIST · FRIEDE, JESUS CHRISTUS · PAZ, JESUCRISTO · PACE, GESÙ CRISTO.

daŭrigas nian vivon. Tute same, io necesa mankas al la homaro. La homaro perdis ion necesan por vivi en paco. Sen tiu esenco, la homaro pripensadas nur la akcesoraĵon : la branĉojn ! Kien ni do iru por serĉi ĝustan vojon ? Al kiu ni do direktu nin por solvi la demandon ?

Jesuo diris : «laboru ne por la **pereema nutraĵo**, sed por la **nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo**» (Joh 6:27). Kaj li ankaŭ diris, ke «mi estas la **pano de vivo** ; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos» (Joh 6:35). Jesuo estas la pano de vivo (Joh 6:48). Jesuo, nia Kristo, **havas la vortojn de eterna vivo** (Joh 6:68). Kio do ? Jesuo estas jam malferminta por ni la vojon al eterna vivo ne per pereema nutraĵo sed per nutraĵo, kiu restos ĝis eterna vivo, t.e. la vortoj de eterna vivo. Jesuo donis al ni panon de vivo kaj per tio ni havas eternan vivon. Kion do devas celi ni, kredantoj, kiuj havas eternan vivon ? Ĉu al la tero, kiu estas plena de krimoj kaj kulpoj ? Ne !

Kia rilato do estas inter la paco kaj la pano de vivo ? Estas eterna vero, ke viva nutraĵo vivigas ĉion sed la pereema, ne. Tiu ĉi lasta kondukas ĉion al morto. Vivo estas lumo, kaj morto estas mallumo. En lumo ni vidas la gracon kaj veron de Dio, kaj en mallumo estas nenio krom la regado de Satano. Satano venas por ŝteli, buĉi kaj pereigi, sed Jesuo venas, por ke ni havu vivon kaj havu ĝin abunde (Joh 10:10). Estas evidente, ke kie estas ŝtelado, buĉado kaj pereigado, tie estas milito kaj malpaco, kaj kie estas regado de Dio, tie estas amo kaj paco.

## Lia paco

Jesuo ankoraŭ diras al ni, ke *«pacon mi lasas al vi ; mian pacon mi donas al vi ; ne kiel la mondo donas al vi, mi donas al vi»*. Jesuo venis por doni al ni pacon. La paco, kiun li donas al ni estas alia ol tiu de la mondo. La paco de Jesuo ne estas portempa sed eterna. Homo, kiu posedas ĉielan pacon, neniam ŝanceliĝos eĉ en konstante minacaj cirkonstancoj, ĉar la Eternulo estas nia rifuĝejo. Imagu la bildon : kiom ajn furioza estas la uragano kaj la tajfuno, pace ripozas la birdoj en nesto, kiu estas en krutaĵo de roko.

Kvankam homoj multe sopiras al paco kaj pripensas pri ĝi, tamen ĉar la mondo estas plena de pekoj, kaj la homaro serĉas pacon en malĝusta direkto, ili neniam atingas la veran pacon de tiu ĉi mondo. Vidante la

homaron, kiu suferas sub la regado de Satano, Dio sendis al ni Jesuon kiel Kriston, kaj li mem fariĝis la **pano de vivo**, ŝanĝis nin el la origino, kaj en kompletan unu tuton kunmetis nin, kiuj estis malpurigitaj kaj dispecigitaj de peko. Laŭ la providenco de Dio, ĝusta ordo estas, ke unue la homoj estu justaj antaŭ Dio, kaj la mondo sin trovos en ordo kaj paco.

## Kunmeti la homon

Iam estis kvin-jara infano. La patro donis al ĝi puzlon, kiu konsistas el dispecigita mondmapo. Tio, kion la infano devis fari, estis kunmeti la pecojn por refari la mapon. La patro pensis, ke la ludado de la puzlo daŭros tre longe, ĉar tio estis sufiĉe malfacila eĉ por plenaĝuloj. Sed nur post kelkaj minutoj la infano revenis kun plen-vizaĝa rideto. La patro surpriziĝis kaj demandis ĝin, kiel ĝi finis la puzlon tiel rapide. La infano respondis : «Estis simple ! Sur la dorsa flanko de la mapo estis desegnita unu homo. Tio, kion mi faris, estis nur kunmeti la simplan figuron de la homo !!»

Prave ! Kunmeti en unu tuton la homon, kiu estas dispecigita de pekoj, turmentiĝoj kaj mondaj zorgoj, estas kunmeti kaj harmoniigi la mondon. Kaj poste ? Monda paco ĝermos en tio.

Ma Young-tae, Koreio

---

**Ma** Young-tae, koreo (1946), esperantistiĝis en 1966, studis en korea kaj usona universitatoj, instruas Esperanton en Universitato *Dankook*. Verkis lingvajn librojn pri Esperanto. KELI-ano.

## Redaktora noteto

Redakti revuon ne estas simpla afero.

Oni devas relegi kaj kelkfoje korekti strangajn frazturnojn, eĉ oni tutsimple nur supozas la signifon. Oni tiel ankaŭ multe lernas, kiam oni volas kontroli en P.I.V. aŭ en P.A.G., kaj oni trovas, ke jes li pravas.

La kunlaborantoj ricevis (-os, se ili petas) la instrukciojn (samaj por *DIA REGNO* kaj por *Evangeliaj Kajeroj*, en kies 6-a numero ili ankaŭ estas). Ili indikas kiel prezenti la artikolon, kian artikolon verki, kaj kelkajn indikojn pri la lingvo kaj la terminologio.

Pri tiu lasta temo, mi volas indiki, ke oni povas reakcie pendole indiki ion, kiu fakte iras en alia malbona direkto. Mi klarigu :

Reakcie al alies kutimo esperantigi ĉiujn proprajn nomojn, malpermesante rekoni la originalajn, kaj malpermesante tiel prezenti ekster nia movado la publikaĵojn, mi indikis doni ĉiam la originalan nomon, kun eble poste parenteze la proponatan esperantigon por uzo en derivaĵoj. Sed, oni indikis al mi, ke tio certe ne estas tiel logika, kiam temas pri klasikaj nomoj, kiuj estas tradukitaj en ĉiujn aliajn lingvojn. Do nun, laŭ mi ekvilibra pozicio : ĉiuj propraj nomoj estu, kiel mi unue diris, donitaj en la originala formo, latinskribigita se necese, kun eble proponata esperantigo, kaj prononco se bezonata, kun la escepto de la klasikaj nomoj (ni diru ĝis la Renesanco), indikitaj inverse, t.e. esperantigo (ekz-e laŭ P.I.V), kaj originala formo. Tiu rimarko validas por artikoloj aperintaj en *Evangeliaj Kajeroj*, kaj same en *DIA REGNO*, ekz-e pri Homero. Vi mem korektu la korektitaĵojn.

P.C.

# PRI LA DIA JUSTECO

Dio estas absolute simpla, ne kunmetita estaĵo ; ne konsistas el materio, do Li ne havas partojn. En Li Ĉio estas kune, nur ni homoj disigas Lin je diversaj partoj, ecoj, laŭ la homaj konceptoj. Kaj ju pli primitiva estas la homoj, des pli ili akcentas la justecon. Tial la prahomo timegis Dion. Eĉ hodiaŭ simplulo ofte diras : "Dio punigas vin."

## Alianco

La kerno de la Malnova Testamento estis la alianco inter Dio kaj la popolo elektita, ke ĝi posedu la Dian revelacion. La justeco de Dio ne signifas la esencan propraĵon, sed la konduton, kiu estis bezonata de la alianco. Dio per sia potenco sukcese protektis la popolon kaj samtempe devigis ĝin plenumi la aliancon.

Jesaja jam parolas pri la puna justeco, sed ĝenerale en la MNT Dio prizorgas sian popolon per bonaĵoj de la alianco, kaj donas liberigon per la alveno de la Savanto.

## Fido al Jesuo Kristo

En la Nova Testamento apostolo Paŭlo uzas la vorton en simila senco :

> «Manifestiĝis la justeco de Dio, per fido al Jesuo Kristo por ĉiuj kredantoj, ĉar ne ekzistas diferencigo ; ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio ; pravigite donace de Lia graco, per la elaĉeto kiu estas en Jesuo Kristo ; kiun Dio antaŭdifinis kiel repacigilon per fido en lia sango, por la elmontrado de Sia justeco per la pardono de la pekoj... kaj ke Li estas justa, kaj estas praviganto de tiu, kiu havas fidon en Jesuo Kristo.» (Rom 3:22-26)

Do, la justeco signifas tiun internan pulson pro kio la Patro influis efike la vivon de la homo per sendo de Kristo, kiu akiris por ni la savon. La justeco de Dio, ne restos interna propraĵo, sed ĝi elverŝiĝas sur la homon... Kiel diras apostolo Paŭlo : "La justeco de Dio

---

**DIO, JUSTECO, AMO** · DIEU, JUSTICE, AMOUR · GOD, JUSTICE, LOVE · GOTT, GERECHTIGKEIT, LIEBE · DIOS, JUSTICIA, AMOR · DIO, GIUSTIZIA, AMORE.

manifestiĝas, kiun la kredanto akiras per la kredo." (Rom 1:17)

Kiu kredas Jesuon Kriston, tiu partoprenas el la benoj de la Nova Testamento. La apostolo aludas ankaŭ al tio, ke Dio postulas kompenson pro la faritaj pekoj, sed Sian justecon Li unuigas kun kompato, kiam tiun rekompencon Li efektivigis per la surkruca morto de Kristo.

## Mistero

En la letero de Paŭlo (2 Kor 5:21) ni legas : "Tiun, kiu ne konis pekon, Li faris peko pro ni ; por ke ni fariĝu justeco de Dio en Li." La antitezo montras, ke ankaŭ tiu konduto de Dio estas perfekta Mistero : kvazaŭ Kristo partoprenus en la sorto de la peko, akceptas la krucoferon por ke la homo povu survesti la justiĝon. Ni sentas, ke en tiu efektivigo de la Dia justeco estas trovebla la boneco de Dio, sed ankaŭ kompato, mizerikordo.

La justecon ni povas rigardi ankaŭ kiel nocion prenitan el la homa vivo, kaj tiam ĝi signifas konstantan emon doni al ĉiu ties propran propraĵon. Ankaŭ ĉi-kaze ni ne povas paroli pri la dia justeco. Li kvankam ne estas ŝuldanto al iu ajn, sed se Li kreis kaj Liaj kreitaĵoj estas destinitaj anonci Lian gloron, tiam Li devas doni al ili ĉiun eblecon, kiun iliaj esencoj bezonas. Plue, la kreitaĵoj por atingi siajn celojn bezonas unu la alian, ili dependas unu de la alia. Pro tio estis bezonate fari ian ordon inter ili.

Se ni homoj progresas en intelekto kaj spirito, kaj povas ekkompreni la esencon de Dio, nepre iras ne nur nia penso, sed ankaŭ niaj deziroj direkte al la plej grava, kaj kvazaŭ ni volas diri, eĉ ni kuraĝas diri, ke : "Dank'al Dio, ke Dio ne estas justa !"

## Kie la justeco ?

Ĉar se Dio estus justa, ni jam delonge estus kondamnitaj. Ne nur en tagoj de Noa, sed de tiam, kiomfoje okazis teruraj holokaŭstoj (bruloferoj), neimageblaj kruelaĵoj, maljustecoj faritaj de homoj al homoj... Ĝuste la simplaj homoj perdas ofte la kredon pro tio, dirante : "Kie estas la justeco de Dio ?"

La demando estas malbona ! Ĉar la justecon oni povas imagi nur home. La **Dian koncepton** ni povas rigardi ĝusta, nur laŭ la instruo de Kristo, kiu tiuspecan dian justecon metis, ĵetis en la lastajn tagojn ! Ĝis tiam Kristo volas transformi nian pensmanieron laŭ la koncepto de la "ĉiela Patro" : La bona Patro ne estas justa, sed kompatema !

La kreitaĵoj havantaj racion, apartenas ankaŭ al la morala ordo, kiu devigas ilin, kaj pro tio ili devas atingi siajn celojn. Tiel evidentiĝas por ili la justeco de Dio, kiu fontas el Lia amo. La psalmo 118-a tiel entuziasmas pri la leĝoj de Dio.

## Graco

La homo ekkonas la revelaciitan leĝon per la kredo. La leĝojn de la naturo oni ekkonas el la naturo mem, sed oni spertas en si mem la leĝon de la instinkto, kiu blinde diretiĝas al sia objekto kaj disrompas la vorton de la konscienco. La harmonion oni povas efektivigi nur pere de la graco (kp. Rom 7:23).

Jes, Kristo volas transformi nian pensmanieron laŭ la koncepto de la "ĉiela Patro"... Sed ĝis tiam, la fonto de la kompatemo estas tute alia koncepto pri justeco ; kiu en Dio signifas justecon : kiel la bona Patro al la Filo..., "vi estas la Mia, pro tio Mi donas al vi ĉion, Mi helpos vin en ĉio, neniel Mi forĵetos vin, eĉ se vi estas krimulo. Mi ne timigas vin per puno, sed Mi invitas vin, atendas vin, serĉas vin... Ĉiam, ĝis vi ne froĵetos Min, vian Dion... Sed se vi forĵetos Min, tiam plenumiĝos je vi tiu justeco, kiun vi ateiste povas imagi, kaj ricevos pro via krimo vian punon."

## Pentofaro

Do, kiel fonto kaj gardanto de la morala ordo, Dio volas, ke la bono ricevu rekompencon, la malbono punon. Tiun leĝon validigas Lia justeco efektivigita. Sed ni ne forgesu, ke inter Dio kaj la kreitaĵoj, ni ne povas paroli pri reciproka justeco. Li ne ŝuldas al la kreitaĵoj. Kontraŭe la kreitaĵoj estas tute submetitaj al Li. Ne malgrandiĝus justeco de Dio, se Li ne donus rekompencon por la meritoj de la homo ; kaj same Li povas pardoni ankaŭ sen puno, kompreneble se estas antaŭe la pentofaro.

La justeco de Dio ne permesas, ke sen pentofaro nuliĝu la peko. Ja, kiu pekis, tiu turniĝis for de Li kaj eksigis sin el la benoj de la Dia amo. Dio ne volas perforte doni amon al tiu, kiu rifuzas ĝin.

Do, Dio estas tiel justa, ke Li estimas en ni tion, kion ni ricevis de Li : la liberan volon, per kio ni mem decidas, kiel ni volas vivi. Laŭ mia opinio, la libera volo portas ties esencon, ke Dio estas justa. Ĉar ni povas paroli pri la Dia justeco nur rilate al inteligentaj kreitaĵoj.

Se ni rigardas la esencon de Dio, ni ektrovas la amon, kiel tian propraĵon. Se estas tiel, niaj demandoj povas esti nur tiuj :
- kia kompatemo fontas el la Dia amo ?
- kia justeco fontas el la Dia amo ?
- kia boneco fontas el la Dia amo ?

Nun nia demando estas : kia justeco devenas el la amo de Dio ? Neniel la prirespondiga justeco, sed tia kiu senĉese volas doni al ni, tiri al Li, justeco kiu volas konduki nin al la celo...

Ne estas dubo, ke Dio povas influi nian volon aŭ ŝanĝi ĝin. La gracon de la savo Li ĉiam donas tiudirekte. Estas sekreto, mistero, kiam kaj kial Li donas sanigan punon, aŭ kiun Li punas per venĝo, aŭ pro kio Li donas al iu plurfoje eblecon pentofari ol al la aliaj. Sed ne estas dubo, ke Li ĉiam efektivigas providencan justecon. Kristo parolas pri talentoj kaj devoj. Dio donas al ĉiu laŭ ties povoj (Mat 25:15).

Ja ĉi tiuj justecoj, veroj fontas el la instruo de Kristo, kiun ni ricevis de Li ne pro tio, ke pere de ili ni venku aliajn, sed por ke pere de ili ni povu elteni ĉion.

## Konduto de la kristanoj

Nia konduto estos tiu forto por la mondo, precipe se ĝi manifestiĝas en la komunumo, kiu laŭ la volo de Kristo konvinkos la mondon.

En ni, la justeco kaj amo estas du apartaj virtoj, sed en Dio estas nur unu povo. Lia amo tiam iĝas prirespondiga justeco, se iu per peko eligas sin el ĝi. Ne Dio uzas alian mezuron, sed la kreitaĵo turniĝas for de Li, kaj tiel oni necese batiĝas al tiu barilo, kiu gardas la moralan ordon.

Estas same ankaŭ al kondamnito : Dio ne devigas sian amon al ili kontraŭ ilia volo... Tia devigo rompus ilian liberan volon.

Por kompreni la kondamnon ni devas pensi, ke unika celo de la inteligenta kreitaĵo estas posedi Dion, kaj ties perdo estas ne **ia** perdo, sed **la** perdo de la esenco de la vivo. Jene diras la Biblio : **Eterna morto.**

En la nuna situacio de nia konduto, ni ne nur ne povas plenumi la ordonon de Kristo, kiu estas por ni la Dia justeco, sed ne eblas fari tion en nia nuna situacio.

Povas esti, ke ie kaj tie ni venkas, rikoltas sukceson.

Frato **Roger** *(roĵe)*, patrino Theresa, vojaĝoj kaj predikoj de Billy **Graham**, aŭ vizitoj de la papo **Johano Paŭlo la 2-a** ĉe diversaj popoloj... tamen tiuj ĉu etaj, ĉu grandaj, ne estas konvinkanta forto por la mondo.

1. En Japanio, la plej multe legata libro estas la Biblio, kvankam la nombro de kristanoj estas malmulta... tamen ili ne fariĝas kristanoj, kvankam la vero de la Biblio estas konvinka, sed la konduto de la kristanoj, kiuj posedas ties verojn, tute ne...

2. En la lernejoj la kredantoj instruus entuziasme dum ses ĝis dek jaroj geinfanojn, kiuj eklernas multon de la Evangelio, sed en animo ili restas religiaj analfabetoj, eĉ post certa tempo ili forgesas sian religion, eĉ perdas la kredon kaj fariĝas ne-kredantoj, ĉar mankas la konvinka vero, la konduto de la kristanoj. Ĉar nia vivo, aparte kaj kune, la vivo de la kristana komunumo, ĝis nun ne efektivigis la moralan ordon, la justecon de Dio, kio, estas la devo, la tasko de la kristanoj.

Sed tiu jam estos temo de sekvonta prelego.

Kóbor Lajos, Hungario<br>Prelego el la Ekumena Kongreso<br>Annan Court, 1989

---

KÓBOR Lajos, hungaro, katolika pastro, vic-prezidanto de IKUE.




(Ĉeĥoslovaka poŝtkarto)

## AMO DE DIO, AMO AL DIO

Dio estas amema, justa kaj favorkora. En la centro de nia vivo estas Jesuo, lia mesaĝo de amo, de batalo, de espero. Li donas sencon al nia vivo, nin gvidas al la Patro.

### La ĉefaj devoj de la homo

> «Vi amos la Sinjoron, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.»

Notu : «Vi amos» prefere ol «amu», ĉar necesas, ke estu kelke da tempo por sukcesi ami. Oni povas trafi tion nur en Dio kaj kun lia graco.

> «Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo. Kaj se mi posedus la profetpovon kaj komprenus ĉiujn misterojn kaj ĉian scion ; kaj se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi montojn, sed ne havus amon, mi estus nenio. Kaj se mi disdonus mian tutan havon por nutri la malsatulojn, kaj se mi lasus mian korpon por forbrulo, sed ne havus amon, per tio mi neniom profitus.» (1 Kor 13:1-3)

### Amo

> «Amo longe suferas kaj bonfaras ; amo ne envias ; amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne kondutas nedece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas kun vereco ; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas.» (1 Kor 13:3-7)

Ami estas tute forgesi sin por alia, entute sin doni, senpage, por riĉigi la alian kaj fariĝi nur unu kun li.

Dio unue amis nin. Li kreis kaj volis nin laŭ sia bildo kaj simileco kaj komisiis al ni la regadon de la tuta mondo. Li estas patra, sed ne patronista. Li estas senpaga Dio ; ofte oni diras : "Dio kreis la mondon, kiel la maro faras la kontinentojn, retiriĝante." Li lasas la homojn

---

**AMO, DIO** · AMOUR, DIEU · LOVE, GOD · LIEBE, GOTT · AMOR, DIOS · AMORE, DIO.

vidalvide sian responson. Li estas doneco kaj Li vokas nin al dono. Li donis al ni sian unikan Filon por nin savi.

Ni devas manifesti al Dio nian amon per nia dankemo, nia konfido kaj nia obeo ; kaj estas Li, kiu metas en nin la povon doni tiun manifestiĝon.

a) Ni povas manifesti al Dio nian dankemon per dankopreĝoj kaj precipe partoprenante aktive en la Diservo, tio estas, komuniante al la paska movo : morto - releviĝo.

b) Ni povas manifesti al Dio nian konfidon, prezentante al Li niajn bezonojn en la porpeta preĝo, sin turnante al Li, kiam ni pekis, speciale en la absolva sakramento, kaj precipe obeante al Lia volo.

c) Ni povas manifesti al Dio nian obeon, ne pasive rezignaciante al fatala destino, sed kiel eble plej aktive kunlaborante al Lia persona volo sur nin, ĝis kiam, je Lia volo, ni enmanigos nian animon inter liaj manoj.

Ne forgesi vivi la okazaĵojn en la certeco, ke Dio tie scios nin renkonti.

## Kial kaj kiel ?

Kristano pli ol iu ajn alia devas servi la veron. Estas multe da homoj, kiuj suferas multe pli de misintenco ol de insultoj, kaj de ĉi tiuj pli ol de frapoj. Oni legas en la Evangelio laŭ Mateo (15:19) :

> «Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj, adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatentoj, blasfemoj ; jen tio, kiu profanas la homojn.»

Sed ĉiu vero ne estas ĉiam bona por diri, kaj estas necese scii silentiĝi pri kelkaj aĵoj ; efektive, la vero en certaj kazoj, rekte aŭ nerekte, malutilas al la karitato. Ni devas esti prudentaj.

Dio respektas la disvolviĝon de bela naturo, sed nepre neperfekta, ĉar ĝi ne estas Dio mem. Iutage la naturo estos prenita en Dio. Atendante, «la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras» (Rom 8:22). Plie,

klopodante antaŭvidi la naturajn katastrofojn, sin ŝirmi kontraŭ ilin, eĉ iam ilin mastri, la homo kreskas laŭ la celoj de Dio.

**Tiuj homoj, kiuj montris amon**

Jes ja, ni estas altirataj al Dio de tiuj homoj, kiuj pretendis pro Li, kaj trovis en Li lumon kaj forton. Pro sia vivo kaj paroloj, ili instruas Dion al ni. Inter la plej grandaj, oni nombras la profetojn de la Malnova Testamento, kristanajn lumajn rimarkindulojn, kiel Francisko en Assisi, kaj nepre Marian, la patrino de Jesuo.

En la 13-a jarcento, S. Francisko trakondukis humilan kaj malriĉan vivon, tuta bildo de Kristo, plena de ĝojo kaj karitato. Li ne havis alian zorgon ol marŝi en la paŝoj de Jesuo por vivi la beatecojn (la feliĉo-dirojn en Mat 5). La sekreto de feliĉo ? Mildeco, humileco, ĝojeco, memvola akcepto de la turmentoj kaj de la insultmokoj. Liaj idoj estas la franciskanoj[1].

Pli proksime de ni, niaepoke, Abbé Pierre (*abe pjer'*, pastro Petro), alterne partizano, deputito, fondinto de la hokĉifonistoj de Emmaüs, senlace parolas al ni pri justeco. «Pri Emmaüs, ĉio komenciĝis,» li diris, «ĉar mia domo estis tro granda». Tre rapide li akceptis kaj gastigis senhejmulojn. Poste, malgranda komunumo ariĝas ĉirkaŭ li. Estis la komenciĝo de Emmaüs. Abbé Pierre rezignas sian deputitan mandaton, en 1951, post ses jaroj de aktiveco, por plene sin dediĉi al la "hokĉifonistoj de Emmaüs", kies nombro dikiĝis ekde la alveno de la unua "kolego".

Vintre 1954, dek jarojn post la fino de la milito, terura ondo de malvarmo falis sur la landon. Jam Abbé Pierre estis petinta al la registaro helpon por senprokraste konstrui urĝan domaron, sed en la nokto de la 3-a al la 4-a de januaro, li jam ne havis respondon ; kiam en tiu nokto, Marc, bebo tritaga, viola pro malvarmo, mortas antaŭ ol havi tegmenton super sia kapo. Abbé Pierre sonorigis al la pordo de la taĝurnalo *Le Figaro* por publikigi sian longan plendon. Estas necese, laŭ li, ke oni impresu la publikan opinion. La morgaŭan tagon, sur tri kolumnoj, ĉiu povis legi la doloran krion, kiun li adresis al la ministro : "simpla alvoko de homo al homo." Kial rakonti ! Ĉiu povas vidi la kinofilmon, kiu estas titolita *Hiver 1954*.

50 000 leterojn en la unua semajno post la apero de la artikolo en la ĵurnalo ! Kelkaj alvenas ĝis la bona loko, kun nur la mencion : "Abbé Pierre, Francio". Jes, eksterlande oni aŭdis la alvokon. En Vatikano, la *Osservatore Romano* aperas kun foto de Abbé Pierre, «tiu, kontribuis por eltiri Francion el ties egoismo».

Sed, ni devas vidi en tiu pastro, tiu homo tiel bona, tiel milda, koleran homon. Tion li mem diras : «La legado de la Evangelio, gvidata de S. Francisko, malkaŝis al mi la nedisigeblan ligilon, kiu ligas amon kaj koleron» ; kaj jene konkludas :

> «Kia amo estus vera amo, se ĝi estus sen kolero, kiam la amato estas mistraktata, ofendomokata, frakasata ? Patrino, kiu estus sen kolero, vidante bati sian infaneton, ĉu ŝi estus amanta ? Se ni estas sen kolero, kiam ni vidas la aliajn ofendomokatajn, ekspluatataj, humiligataj, estas evidente, ke ni ne amas ilin.»

Marcel Colleu, Francio
teksto preparita por la kongreso
de la Francaj Katolikaj Esperantistoj,
responde al demandaro pri la kongresa temo.

---

noto :

1. NDLR : Vidu en *Evangeliaj Kajeroj*, 3, 1988, p. 53 k.s.

# INTER DILUVO KAJ ĈIELARKO

Pri la Monda Asembleo por Justeco, Paco kaj Konservado de la Kreo en Seoul, Suda Koreio, 5-13 marto 1990.

## Originoj

Nekontentiga. Tio estas la preskaŭ unuanima juĝo pri la rezulto de ĉi tiu monda kunveno, kiun partoprenis preskaŭ mil personoj el ĉiuj partoj de la mondo, inter ili 400 oficialaj delegitoj de diversaj eklezioj. Aliaj eĉ parolas pri fiasko. Verŝajne ĝuste pro tio la seniluziiĝo estas granda, ĉar multaj kristanoj, junaj kaj pli aĝaj, ligis altajn esperojn kun tiu renkontiĝo. Oni ja anoncis ĝin kiel gravan etapon en la tiel nomata **koncilieca procezo**[1], kiun ekirigis en 1983 la Pleno de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en la kanada Vancouver (Vankuvero). Du jarojn poste, la fizikisto kaj filozofo **Carl Friedrich von Weizsäcker**, frato de la germana federacia prezidento, reprenis la ideon dum la "Kirchentag" en Düsseldorf, la plej granda laika movado de la germana protestantismo. Li advokatis "koncilion" de ĉiuj eklezioj por laŭte kaj klare vortigi komunan mesaĝon al la mondo vide al krizo, kies kulmino ankoraŭ ne venis kaj en kies fokuso estas la kampoj de justeco, paco kaj konservado de la kreo[2].

La spiritaj patroj de tiu ideo estas la evangeliana (luterana) pastoro **Dietrich Bonhoeffer**, kaj la katolika pastro **Max Josef Metzger**, kiun la esperantistoj konas kiel pioniro de ekumena porpaca laboro inter eklezioj kaj nacioj, mem aktiva esperantisto kaj redaktoro de Esperanta gazeto *Katolika Mondo*. Bonhoeffer siatempe vane elstarigis la urĝan neceson de komuna pozicio. Max Josef Metzger restis profeto krianta en la dezerto. Ambaŭ perdis sian vivon sub la manoj de hitleraj ekzekutistoj. Dum Bonhoeffer fariĝis vaste konata, post sia morto eĉ pli ol antaŭe, Max Josef Matzger longe restis en la ombro, ĉar lia karaktero de viziulo kondukis lin en konfliktojn kaj kun la oficiala eklezio dum la naziisma periodo kaj kun la oficiala katolika Esperanto-movado IKUE. Tamen Walter

---

**INTERNACIA EKUMENA KONFERENCO** · CONFERENCE OECUMÉNIQUE INTERNATIONALE · INTERNATIONAL ECUMENICAL CONFERENCE · ÖKUMENISCHE INTERNATIONALE KONFERENZ · CONFERENCIA ECUMÉNICA INTERNACIONAL · CONFERENZA ECUMENICA INTERNAZIONALE.

Mudrak el Vieno frue atentigis pri li.

Kiam montriĝis, ke la uzata vorto "koncilio" per si mem elbaras ĉiujn katolikojn, romajn kaj ortodoksajn, oni serĉis alian terminologion : "koncilieca procezo" devus iniciati mondvastan diskuton inter eklezioj kaj kristanoj ĝenerale ; ĉiu devus alporti sian brikon por komuna konstruo. Gravaj regionaj konferencoj devus konduki al granda universala asembleo, tiu originale tiel nomata "koncilio", do al la Monda Asembleo en Koreio, unua kulmino de la koncilieca procezo. Certe ĝi ne fariĝis kulmino. Laŭ ĉiuj premisoj, ĝi ne povis. La ideo neniel penetris en ĉiujn angulojn de la mondo. Multaj delegitoj alvenis en Seoul ne leginte la preparajn dokumentojn, kelkaj eĉ ne ricevinte ilin antaŭ la alveno en Koreio. Estas neniel mirige, ke tiel granda konferenco kun tiom da homoj, kiuj grandparte neniam antaŭe renkontiĝis, ne povas vere prilabori, tralabori, decidi kaj adopti tian amason da tekstoj pri tre kompleksaj temoj. Male, kiu jam ĉeestis ekumenajn konferencojn, iom pli indulge prijuĝos, kion la konferencanoj tamen atingis, eĉ se la pleno povis diskuti ĝuste la titol-liniojn de la unuopaj ĉapitroj, sed ne la kompletajn tekstojn. Estas nur konsekvence, se sub tiaj kondiĉoj oni rifuzas doni blokan aprobon de la tuto.

Indas memorigi parton de la prepara laboro. Altnivelaj forumoj pritraktis la temojn en Königstein kaj Stuttgart (1988) kaj en Dresden (1989), tiutempe do en du diametre malsamaj mondoj. Vera evento estis kaj restas la Eŭropa Ekumena Kunveno en Basel (Bazelo) je Pentekosto 1989. La signifo de la dokumento rezultinta de Basel reliefiĝas, kiam oni konsciiĝas, ke ĝi estas la unua grava teksto[3] post la Reformacio, kiun subtenis kaj subskribis reprezentantoj de kvazaŭ ĉiuj eklezioj en Eŭropo, orienta kaj okcidenta, katolikaj kaj protestantaj. Esence, Seoul ne povis aldoni ion vere novan, kaj krome, la tempo post Basel ĝis Seoul estis ege mallonga, la plimulto de la delegitoj ja ne havis libertempon por profundiĝi en la akceptitaj tekstoj de Basel kaj studi la novajn projektojn por Seoul. La prepara komitato antaŭvidis, ke en Koreio oni diskutu kaj fine aprobu la dikan dokumenton kompilitan en Genève (Ĝenevo).

## Disputoj

Tiu aprobo ne okazis. Suspekto kreskis inter iuj delegitoj el la tiel nomata Tria Mondo, kvazaŭ denove la eŭropanoj volas diri kaj dikti al la aliaj, kio estas ĝusta kaj farenda. Rezultis parte akraj disputoj. La eŭropanoj premisis (kaj ankaŭ en la Ekumena Esperanto-Kongreso en Annan Court (1989) tio ŝajnis evidenta) ke la tri subtemoj estas egalvaloraj, kvazaŭ sur la sama nivelo. Surprizis la insisto de la tria-mondanoj, ke 'paco' estas por ili duanranga problemo, kaj 'konservado de la kreo' eĉ pli, dum restas nesolvita la elementa kaj fundamenta demando de 'justeco'. Unu post alia, grupoj kaj unuopuloj donis kor-ŝirajn raportojn pri maljusteco, perforto, subpremo, malsato kaj arbitro en plej diversaj landoj sur nia nuna tero en nia nuna epoko (aŭstralia indiĝena virino, alĝeria laboristino en Francio, japana social-helpantino inter filipinaj prostituitinoj viv-tenantaj tutajn familiojn, hinda kuracistino inter parioj, aliaj el Brazilo kaj tiel plu kaj tiel plu). Ili oponis kontraŭ la proponata teksto : Tio ne estas nia lingvo, tio ne spegulas nian teologion.

Sekve, oni ne akceptis aŭ aprobis la tekston. Tamen la faktoj listitaj en la unua el la kvar partoj de la dokumento, restas timiga realo : En ĉiu minuto, do ankaŭ en tiu minuto, kiun mi bezonas por tajpi kelkajn liniojn, la landoj de la mondo elspezas 1,8 milionojn da usonaj dolaroj por armado militisma ; en ĉiu horo, tage kaj nokte, mortas 1 500 infanoj pro malsato aŭ pro malsanoj kaŭzitaj de malsato ; en ĉiu tago formortas unu specio de bestoj aŭ plantoj. Tial oni komparas nian situacion kun tiu antaŭ la diluvo*. Jam Basel donis tian liston. Tiu de Seoul konsiderinde plilongiĝis, kaj certe ĝi ne estas elĉerpa.

La dua parto de la dokumento substrekas, ke ankaŭ ni kristanoj partoprenas en la kulpo pri tiu minaca evoluo. Ankaŭ ni neglektis montri solidarecon kun la viktimoj de subpremo kaj perforto aŭ kontraŭstari politikajn sistemojn, kiuj metas sin mem super la juro. Ankaŭ ni ne kuraĝis diri la veron kaj nomi malbonon malbona. Ankaŭ ni kontribuis al konfliktoj kaj favoris la starigon de malamiko-imagoj. Ni mem ne vere kredis al la Evangelio kaj ne vere fidis la Dion de la interligo, kaj en la vivo kaj en la morto.

La tria parto, tre ampleksa kaj detala, estis funde debatata kaj fine akceptita de la tuta asembleo kun grandega plimulto.

**Bazaj punktoj**

En la anglalingva dokumento sub miaj okuloj ĝi havas dek sekciojn, kiuj substrekas kaj reasertas bazajn punktojn, kiuj, en la formo de la respektivaj titol-linioj, eniris ankaŭ en la **Mesaĝon** direktitan al la eklezioj :

\# 1 Ni reasertas, ke ĉiu uzanto de potenco estas respondeca antaŭ Dio. Ni rezistos kontraŭ monopola aŭtoritato, kiu malebligas procezojn de transformiĝo al justeco, paco kaj konservado de la kreo.

\# 2 Ni reasertas, ke Dio prenas la flankon de la malriĉaj. La gloro de Dio speguliĝas en la malriĉulo (ĉefepiskopo Romero). Ni rezistos al klopodoj konsideri malriĉon neevitebla.

\# 3 Ni reasertas la egalan valoron de ĉiuj rasoj kaj popoloj. Ni rezistos la subpremon de grupoj, precipe de virinoj kaj infanoj, kiuj plej dolore suferas pro ĝi.

\# 4 Ni reasertas, ke viro kaj virino estas kreitaj laŭ la bildo de Dio. Ni rezistas kontraŭ strukturoj kiuj daŭrigas perforton kaj ekspluaton de virinoj hejme kaj socie.

\# 5 Ni reasertas, ke la vero estas la bazo por komunumo de liberaj homoj. Ni rezistas kontraŭ la koncentrita povo de amas-komunikiloj en la manoj de kelkaj malmultaj.

\# 6 Ni reasertas la pacon de Jesuo Kristo. La sola ebla bazo por daŭra paco estas justeco (Jesaja 32:17)[5]. Ni rezistos kontraŭ doktrinoj kaj sistemoj bazitaj sur fortimigo per armiloj de amas-detruo kaj sur subpremo de la popolo por protekti la privilegiojn de kelkaj.

\# 7 Ni reasertas, ke Dio amas sian kreon. Ĝi spegulas la gloron de sia kreinto. La elaĉeta ago de Dio en Jesuo Kristo repacigas ĉiujn aĵojn kaj vokas nin al la saniga laboro de la Spirito en la tuta kreo. Ni rezistos al la postulo, ke ĉio en la kreita mondo servu al ekspluato fare de la homo.

\# 8 Ni reasertas, ke la tero apartenas al Dio. Ni rezistos al la provoj trakti la teron sole kiel komercan varon.

\# 9 Ni reasertas la dignon kaj la engaĝiĝon de la juna generacio. Ni rezistos kontraŭ agmanieroj kiuj misuzas la junajn.

\# 10 Ni reasertas, ke la homaj rajtoj estas donaco de Dio. Pro tio necesas sendependa jura sistemo. Ni rezistos kontraŭ ĉiuj strukturoj kiuj lezas homajn rajtojn, precipe torturo, eksterleĝa ekzekuto kaj morto-puno.

**Promesoj**

En la kvara parto temas pri solenaj interligoj aŭ sin-devontigoj. La tempo mankis por plene tradiskuti la proponojn. Tamen rezultis rimarkinda nombro da sindevigoj el tre diversaj specoj, inter grupoj (israela-palestina, ekz-e) aŭ inter regionoj (ekz-e la Filipina Unuigita Eklezio kaj germana eklezia disktrikto). En tiuj interligoj la asembleo deziris konfirmi la frukton de la teologiaj konsultiĝoj kaj transformi ilin al agoj. La simbolo de la ĉielarko en la Malnova Testamento servis kiel celo al kiu oni proksimiĝu. Kiel respondon al la interligo donita de Dio la delegitoj volis fari interligon de solidareco por konstrui solidarajn rilatojn kaj ekumenajn retojn, por komune lukti kontraŭ malriĉo, malpaco kaj detruo de la natura medio. Ĉiu promesis hejme labori por :

\# justa ekonomia ordo ĉie en la mondo

\# efektiva sekureco, senmilitarigo de la internaciaj rilatoj kaj evoluigo de "kulturo de senperforto"

\# venki la rasismon

\# konservi la atmosferon kaj la naturan bazon de la vivo, kreante kulturon, kiu povas vivi harmonie kun la tuta kreo.

Facile videblas, ke nenio vere nova estis dirita, post aliaj pli fruaj studoj kaj dokumentoj. Facile eblas kritiki, kaj la respondeculoj mem ne klopodas kaŝi, ke nur parto de la intenco se Seoul estis realigebla. Des pli la delegitoj havas timige grandan taskon antaŭ si, se ili prenas serioze, kion ili unuanime promesis unu al alia antaŭ ol reveturi hejmen. Multaj iniciatis sindevigojn, kiuj nun postulas konkretigon. Ĉiuj aprobis rezolucion, kiu devigas ilin akcepti longan liston da taskoj, diskuti kaj diskutigi la interligojn kaj ties praktikajn konsekvencojn en la sino de la propraj eklezioj, kaj postuli raportojn de la eklezioj pri faritaj progresoj jam en 1991. Vere ne enviinda ŝarĝo. Sed estus cinike stari flanke kiel spektanto kaj observi, kiel bone aŭ mise ili, la delegitoj, faras siajn hejm-taskojn. Temas ja pri nia mondo, pri nia kredo, pri nia Dio. Ni relegu la historion pri Noa kaj la arkeo. Kiam Noa vidis, ke la kolombo ne trovis ripozejon por siaj piedoj kaj revenis, li pacience kaj

espere atendis pluajn sep tagojn. Li faris novan provon, kaj tiam la kolombo alportis la branĉon de la oliv-arbo, signon de nova vivo.

Adolf Burkhardt, F. R. Germanio

---

notoj

1. Mi uzas la vorton, kvankam mi forte dubas, ĉu tiu distingo eblas en la daŭro de skriba kaj buŝa uzo de Esperanto. Mi konsentas kun Bernard Golden, kiu avertas pri konstantaj eraroj en la uzo de paronimoj (parencaj vortoj, kie nur unu sono malsamas : *proceso, procezo*, aŭ derivo de nocioj el unu vorto : *pensio, pensiono*). Se en etnaj lingvoj sufiĉas unu vorto, kial ne en Esperanto ? Neniu erariĝus legante/dirante "proceso" (vd. *"La plago de paronimoj en Esperanto"* en *Boletin de la Federación Española*, 1989, n-ro 291, pp. 14-16).

2. Ĉu tro aŭdaca resuma formo ? Kreitaro difinas pli ekzakte, kreitaĵo ne povas signifi la tuton, sed apartan estaĵon. Mi rekomendas "kreo" analoge al "skribo"/skribaĵo, skribitaĵo. La "Sankta Skribo" certe estas pli eleganta ol la "Sankta Skribitaĵaro."

3. Eĉ post Seoul, la bazela dokumento restas valora. Ekzistas versio en Esperanto, kaj espereble ĝi baldaŭ aperos kaj trovos interesatojn.

4. vd. en la Biblio, Genezo 6.

5. Ne nur ĉi loke aperas bibliaj referencoj. Ili eĉ abundas. Mi atentigas pri tiu fakto por ne lasi tute malĝustan impreson.

---

Adolf BURKHARDT, germano (1929), studis teologion, sociologion kaj la anglan lingvon 1951-1957 en Usono kaj en la universitatoj de Tübingen kaj Bonn. Pastoro (1957-) de la Evangelia-Luterana Eklezio de Würtemberg. Ankaŭ de temp' al tempo simultana interpretisto. Edzo, patro de tri infanoj. Prezidanto de KELI.

## HOMA JUSTECO

El kiu ajn loko ni venas, niaj tagaj vivoj estas influitaj de homa justeco. En grandaj manieroj, en malgrandaj manieroj, per registaroj kaj aliaj aŭtoritatoj, kies agoj tuŝas nin. Per nia nacia historio, per nia konstitucio, kaj per niaj leĝaj sistemoj.

El kiu ajn eklezio ni venas, nia fido havas, ĉe la centro, la maljustecon kiu okazis al viro, kiu estis juĝita kaj mortigita ĉe Kalvario. Tamen, ni eltrovas la grandajn intencojn de la Dia Paska tago.

### Leĝoj

Se ni retrorigardas al la fruaj tagoj de la homaro, antaŭ ol ekzistis skribitaj kronikoj, ŝajnas ke triboj starigis kutimojn kiuj estis transdonitaj al la venonta generacio per la parolata vorto. Ili estis neskribitaj leĝoj, ofte kun respekto per, aŭ timo de la naturo. Kiam skribado evoluis, skribitaj leĝoj komencis aperi, tiuj de la babilonanoj estas la plej fruaj konataj, eble du mil jarojn antaŭ Kristo. La hebrea popolo, gvidita de Moseo, starigis sian propran leĝon. Ni konas ĝin pere de la Malnova Testamento. Ĉi tiu mosea leĝo emfazis moralajn principojn, speciale la Dekalogon, kaj havis fortan influon sur la okcidentan civilizacion. Malnova Grekujo kontribuis al la evoluado de leĝo kaj justeco. Alia forta influo estis la romia leĝo kaj la ideo ke naturan justecon bezonis ankaŭ ne-romianoj. «La fremduloj interne de siaj pordegoj.»

En la Oriento en Ĉinujo, Konfuceo (Kong Fu Ceŭ) diris : "Virto donas la rajton regi, malbona regado nuligas tiun rajton". Tiu saĝo estis malakceptita de Han Fei, kiu diris, ke reĝo havas la neforigeblan rajton premtrudi obeadon, tio ŝajnas okazi ankaŭ hodiaŭ en Ĉinujo.

Reĝoj, papoj, filozofoj, juristoj, politikistoj, kaj reformistoj kontribuis ideojn kaj interpretis leĝojn tra la jarcentoj. Do, ni havas multajn influojn dum ni serĉas por justeco, kaj por ni la vortoj de Amos

---

**JUSTECO, HOMAJ RAJTOJ** · JUSTICE, DROITS DE L'HOMME · JUSTICE, HUMAN RIGHTS · GERECHTIGKEIT, MENSCHENRECHTE · JUSTICIA, DERECHOS DEL HOMBRE · GIUSTIZIA, DIRITTI UMANI.

daŭre sonas veraj :

> "Sed justeco fluu kiel akvo, kaj vero kiel potenca torento."
> (Amos 5:24)

Pasintjaran aŭguston, mi estis vokita por ĵuria servo. En la juĝejoj de Anglujo, proceso estas juĝata de juĝisto kun du dek anoj de la publiko, kiuj aŭdas la ateston, kaj poste renkontiĝas en aparta ĉambro por decidi ĉu la persono estas kulpa aŭ nekulpa. Kun dek unu aliaj homoj, mi aŭskultis la ateston kaj mi estis impresita pro la tempo uzita, pro la zorgo uzita, por eltrovi la veron, kaj siatempe trovi la veran verdikton, kaj pro la juĝisto kiu deklaris la adekvatan juĝon. Jes justeco fluis.

**Homaj Rajtoj**

Ideoj de justeco kaj leĝo estis eksportitaj de la koloniaj nacioj. Ofte ili konfliktis kun la ideoj de la indiĝenoj. Ofte justeco ne fluis. En aliaj partoj de la mondo, justeco nun fluas pli libere, aliloke, la fluo jam subite haltis. Estas, kompreneble, aranĝoj por internacia justeco pere de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Konsilantaro de Eŭropo. Ni havas «Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj». Estas ofte dirite ke ni vivas en tergloba vilaĝo (Se tio estus vera ni bezonus paroli la saman lokan lingvon !). Sed ĝi estas granda vilaĝo. Ni ofte sentas nin esti longajn distancojn for de la sidejoj de la registaro kaj de la justeco. Niaj ĵurnaloj, nia televido, nia radio, alportas la novaĵon tre rapide al niaj hejmoj. La bezonoj de homoj, la atingoj de homoj, la suferado de homoj, la kuraĝo de homoj. Kion ni povas fari, ni, kiuj estas kristanoj ? La profeto Miĥa diras :

> "Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi : nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio." (Miĥa 6:8)

Antaŭ kelkaj monatoj, mi skribis al la ambasadejo de la Sud-Afrika Respubliko por peti, kun respekto, ke la prezidento ŝanĝu la dumvivan kondamnon de la "ses de Sharpeville". Mi estas certa, ke mi estis nur unu el multaj miloj kiuj skribis. Pli poste la kondamnoj estis ŝanĝitaj (Leĝa juĝo estas kelkfoje korektita de supera morala juĝo).

Lastatempe mi aliĝis al la loka Branĉo de *Amnestio Internacia*. Tio estas neŭtrala organizo, kiu laboras por la liberigo de politikaj

malliberuloj, kaj por la enkonduko de justeco sen rigardo al la haŭtkoloro, kredo, nacieco aŭ politika pensado. Esplorado estas farita, leteroj estas skribitaj, kaj ofte, en urĝaj okazoj, telegramo aŭ teleksmesaĝo estas sendita. Ni memoru vortojn el Sankta Luko :

> "Kaj estis donita al li (Jesuo) libro de la profeto Jesaja. Kaj malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite : La spirito de la Eternulo estas estas sur mi, ĉar li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj ; Li sendis min, por anonci la liberecon al kaptitoj kaj vidpovon al blinduloj, por meti la vunditojn en libereco, por proklami favorjaron de la Eternulo." (Luko 4:17-19)

## Help-organizaĵoj

Multaj el ni sendube estas kunligitaj, pere de niaj eklezioj, kun organizoj kiuj provizas helpon de diversaj specoj, kiuj fin-fine realigas justecon per plenumado de bezonoj, kaj ŝanĝigado de lokaj situacioj, tiel, ke la homoj ne plu estas senhavaj aŭ suferantaj. Ni memoras la kanton de Maria, la *Magnifikaton* :

> "Kaj Maria diris :
> Mia animo altigas la Eternulon, kaj mia spirito ĝojis en Dio, mia Savanto...
> Kaj Lia boneco estas por ĉiuj generacioj al tiuj, kiuj Lin timas. Li montris forton per Sia brako, Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro. Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj, kaj Li altigis humilulojn. Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo, kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj." (Luko 1:46-47,50-53)

Amiko mia verkis himnon por emfazi la signifon malantaŭ tio ĉi por hodiaŭ. Li nomis ĝin «*Magnifikato nun !*»[1] Ĝi laŭdas Dion sed ankaŭ alvokas nin batali kun Dio kiu estas justa kaj prava. En tiu maniero, ni montras Magnifikaton en niaj ĉiutagaj vivoj. Jes, la alveno de Jesuo signifas ŝanĝon ne nur por nia spirita vojaĝo sed en niaj rilatoj al la mondo. Nia propra kompreno de morala justeco estas influita de nia kristana fido, de nia kompreno de la Malnova Testamento, de la instruado de Jesuo, de la frua eklezio, de la Agoj kaj de la Epistoloj. En biblia studado lastatempe, mi trovis ĉi tiujn vortojn : "La Eklezio estas kelkfoje tentata forlasi la mondon, kaj ferii kun Dio."

## Ĉe ni

Amos siatempe, vidis prosperon esti limigita al la riĉuloj, nutritaj de maljusteco kaj subpremo de la malriĉuloj. Denove li parolas al ni :

> "Serĉu bonon, ne malbonon, por ke vi vivu ; tiam la Eternulo, Dio Cebaot, estos kun vi, kiel vi diras." (Amos 5:14)

En nia propra familio, nia propra strato, nia propra vilaĝo, nia propra urbo, nia propra lando, ni vidas problemojn de homa maljusteco. Antaŭ kelkaj semajnoj, mi aŭdis ĉi tiun rakonton en prediko. Juna knabino, kiu loĝis en urbo en Nord-okcidenta Anglujo, estis malbone traktita. Ŝi iris al la loka fervoja stacio, eniris vagonaron, vojaĝis ĉirkaŭ 400 km-ojn al Londono, tie ŝi estis, ses-jaraĝa, perdita en granda londona fervojstacio. Feliĉe, oficiro de la Savarmeo trovis ŝin. Sed ni devas fari demandojn pri justeco, en la familio, eble inter ŝiaj najbaroj, inter vojaĝantoj en la vagonaro, la fervoja stabo. Kaj de ni mem. **Kion ni farus ?** Lasu al la Psalmisto paroli al ni :

> "Estu kuraĝaj, kaj forta estu via koro, vi ĉiuj, kiuj esperas al la Eternulo !" (Psa 31:24)

Du demandoj :

1. Kian diferencon faras fido en Dio en nia komprenado pri homa justeco ?
2. En kiuj praktikaj manieroj ni povas, kiel kristanoj, enkonduki justecon, loke, nacie, kaj internacie ?

Peter Hayward (Britio)
(prelego en Annan Court)

---

noto :

1. **Kaan**, Fred. - *The hymn texts of Fred Kaan*. - London : Stainer & Bell, 1985. - ISBN 0-85249-644-3.

---

Peter **Hayward** *(piter hajŭod)* estas bibliotekisto, lastatempe emeritiĝis. Li laboris en la biblioteka servo de la graflando (provinco). Li estas laika predikanto kaj kunvenestro de artosocieto.

# EVANGELIO KAJ SERVO

teksto adoptita de la partoprenantoj en **la Nacia Sinodo de la Franca Reformita Eklezio**, kunveninta en Enghien-les-Bains [*ãgjê le bê*], 1990/05/05-07.

"Potenco de Dio al savo por ĉiu, kiu kredas", la Evangelio rivelas al ni Jesuon Kriston, komunikas al ni lian ĉeeston, kaj vokas nin servi lin en ĉiuj sferoj de la ekzistado.

Kunigitaj en ĉi tiu konfido, ni esprimas la ĝojon pri ĉi tiu libereco, ricevita de Dio per la Evangelio kaj pri la servo al kiu ĝi engaĝas nin.

## Situacio

1. Tiu ĉi sinoda temo donis en diversaj regionoj la okazon de multaj interŝanĝoj inter agantoj de la lokaj komunumoj kaj agantoj de la diakoniado. Novaj ligiloj tiel manifestiĝis inter la parohoj kaj la Fondaĵoj kaj Movadoj *(Oeuvres et Mouvements)*, kiuj estas observejoj de la evoluo de nia socio. Tiuj interŝanĝoj kondukas al novaj eblecoj de kunlaaoro.

2. Ni mezuris, okaze de ĉi tiu studo, *la multecon* de la formoj de servo : - anonco de la Parolo, - servo ĉiutaga en nia komunumo aŭ en nia najbararo, - aŭskulto kaj akompano de la suferantoj, - solidareco kun la malakceptitoj. Ni atentis je la disvolviĝo de la diakonia agado ĉi tiujn lastajn jarojn, je la kunordigado de granda nombro da tiuj iniciatoj en la Protestanta Interhelpo - Nacia Federacio (Entraide Protestante - Fédération Nationale), kaj je la dinamiko tiel donata al la solidarecaj agadoj.

Tiu disvastiĝo estas situenda en la moviĝo de socio, ene de kiu sin serĉas laŭ multaj formoj la esprimo de novaj solidarecoj.

3. La malplibonigo de la sociaj mikskonsistoj multobligas en nia socio la situaciojn de necerteco ; la formoj de malriĉeco diversiĝas kaj ofte aldoniĝas. Granda nombro de geviroj, francaj kaj alilandanaj estas damaĝataj en sia laboro, en sia korpo kaj en sia digno. Ĉu niaj eklezioj estas instigitaj de tiu ĉeesto de la malriĉuloj inter ni ?

4. La distanco ofte kreskas inter la diakonia laboro kaj la paroĥa vivo. La diakoniado laboras ĉe la randoj, kaj sentas sin ofte randigita en la vivo de la komunumoj. Ni konstatas hodiaŭ novan demandadon de la diakoniado pri ĝia propra identeco kaj zorgo, kaj de la paroĥaj komunumoj, pri ĝia diakonia respondeco. Ebla komenco de nova komunikado inter du esprimoj de la vivo de la fido.

## Konvinkoj

La servo estas unu el la esprimoj de nia komuna homeco. Ĝi ofte kunigas, inkluzive en niaj propraj institucioj, agantojn kun malsamaj motivoj aŭ konvinkoj.

Aŭkultante la Evangelion, ni eldiras la sekvantajn konvinkojn, kiuj enradikiĝas nian propran elvidon de la servo :

1. En la Evangelio ni ricevas la Parolon, kiu nin vokas kaj donas nin al ni mem. Ni estas liberigitaj el la angoro devi nin pravigi pri niaj faroj. Nia vera identeco estas donita al ni per graco. Nia servo ne havas sian devenon en si mem. Ĝi estas akcepto de la donaco de Dio en Kristo : respondo al la ricevita amo kaj praktikado de la dankado. Tiel la Evangelio donas al ni unue la liberecon loĝi dum nia tuta ekzistado en la ĉiutaga vivo, kiel en servo-loko.

2. Pere de la Evangelio, ni malkovras la aspekton de la servo tian, kia ĝi estas malkaŝata en la vivo de Jesuo : rompo disde ĉiuj estremaj kondutoj kaj pasio veki la alian en sia libereco. La parolo, kiu anoncas la Bonan Novaĵon estas nedisigebla de la agoj, kiuj ĝin manifestas kiel potencon de libero kaj re-kreo de la vivo. La servo estas la esprimo de lia vivo, donita por ĉiuj ĝis morto.

3. Kolektite de la Evangelio, la Eklezio konas sin kiel komunumon de la vundebluloj. Ĝi ne dividas sin inter fortuloj kaj kaj malfortuloj. Ĉiu tie estas alterne tiu, kies forto kuraĝigas la aliajn, kaj tiu, kies malforto alvokas helpon. Ĉirkaŭ la Vorto kaj la Sankta Manĝo dividitaj, la servo donas sin, kiel akcepto de la alia en sia malsimileco kaj lernado de la reciprokeco.

4. Sekve de Jesuo, ni ne povas apartigi servon al Dio kaj servon al homoj. Ambaŭ estas "similaj", solidaraj, implicas kaj kritikas reciproke. Defendi la homon, kiam li estas ofendita "similas" konfesi la Dion de Jesuo Kristo.

5. La Evangelio estas portanta promeson por ĉiu homa vivo. Koni tiun ĉi promeson, tio estas aserti, ke la homa estulo neniam reduktiĝas ĝis tio, kion li faris, aŭ suferis, ĝis lia malbono aŭ lia destino : li estas iu, kiu estas vokita, kiel ununura.

La diakoniado vivas el tiu promeso. Ĝi tie trovas la kuraĝon por agado. Ĝi atestas al ĉiu estulo, pri tiu digno, kiu estas ties ĉi. Tial ĝi volas esti ne simpla helpa gesto, sed praktiko de liberigo kaj, en la perspektivo de la Regno, signo de anticipo.

**Debatoj**

Pluraj debatoj ekestis en niaj interŝanĝoj. Gravas teni ilin malfermataj. Tiel :

1. Niaj komprenoj de la Evangelio estas diversaj, kiel estas la kvar evangelioj mem.

Iuj opinias ke, pri socia kaj politika etiko, uzi la racion kaj la homajn solidarecojn sufiĉas plejofte por ke ĉiu decidu siajn engaĝojn, sen antaŭa aliro al la legado de la Biblio.

Aliaj ricevas de la Evangelio Parolon, kiu alvokas nin al la libero kaj engaĝi nin, sekve de Jesuo, en lia liberiga praktiko, manifesti la esperon de la Regno per konkretaj signoj de justeco kaj de agnosko de la alia.

Neniu el niaj komprenoj kapablus sola raporti pri la tuta Evangelio.

2. Ni sentas la samtempan urĝon de karitata diakonio, kiu bandaĝas la vundojn kaj zorgas pri la plej-urĝo, kaj de transformiga diakonio, kiu celas longatempe kaj laboras por la ŝanĝiĝo de la mensoj kaj de la strukturoj. Unu bezonas la alian, eĉ se estas malfacile konkrete preteriri karitatan diakonion, la ekskludaj meĥanismoj ŝajnante tiel

nemodifeblaj.

3. La komplementeco inter la engaĝo de unuj en la publika sektoro (ŝtata aŭ loka) aŭ en laikaj institucioj (ne religiaj), kaj la apogo fare de aliaj de diakonia sektoro kun kristana referenco.

4. Ĉu la demando pri specifeco de la diakoniaj institucioj situas en la elekto kaj la konduko de la agadoj ? Ĉu en la motivo de la agantoj ? Ĉu en formo aŭ alia de kunfrontado kun la parolo de la Evangelio ?

5. La artiko en niaj praktikoj de tekniko (kun ĝiaj postuloj) kaj de parolo (entenanta la aŭdadon kaj la ateston de la fido).

*Proponoj*

1. Tiu ĉi debato estis la ekkomenco de nova reciproka agnosko de la paroĥaj komunumoj kaj de la diakoniaj entreprenoj (Fondaĵoj kaj Movadoj, diakoniejoj, ktp.).

La Nacia Sinodo substrekas la gravecon de ĉi tiu evoluo kaj invitas la ĉiujn partnerojn disvolvi ĉi tiujn interŝanĝojn. «Regionaj forumoj de diakonio» periode kunigante agantojn de la Fonfaĵoj kaj Movadoj kaj de la diakonio, kristanojn engaĝitaj en laikaj strukturoj, kaj agantoj de la paroĥa vivo povus esti konkreta formo de divido kaj de komunikado, kaj permesi la daŭrigon sur la kampo de la teologia pripenso pri "Evangelio kaj servo".

La Nacia Sinodo kuraĝigas la interesatajn respondeculojn kune serĉi tion, kio povus esti regione kaj loke la kondiĉoj de vera partnereco inter paroĥoj kaj diakoniaj entreprenoj.

2. La demando estis ofte espimita pri lokoj en la paroĥa vivo, kie tiuj kiuj rekte baraktas kun la problemoj de socia agado povus dividi kun aliaj siajn zorgojn, kaj senti sin tiel akompanataj de la Eklezio.

La Nacia Sinodo rekomendas tiun ĉi iniciaton al la paroĥaj komunumoj. Ĝi invitas ilin priprensi pri la maniero, kiel la diakonia zorgo povas integriĝi en la Diservo de la komunumo kaj kontribui je ĝia renovigo (loko de la diakonio en la informado, en la preĝo, subteno de la personaj

iniciatoj, ktp.).

3. La decidoj adoptitaj pri la diversigo de la servadoj permesas la agnosko de servadoj diakoni-tipaj. Gravas daŭrigi la pripensadon, tiel pri la formo de ĉi tiuj servadoj, kiel pri la necesa trejnado.

Informita pri la hipotezo pri magistreco pri teologio kun elektebloj, la Nacia Sinodo kuraĝigas la Protestantan Instituton pri Teologio *(Institut Protestant de Théologie)* daŭrigi en tiu direkto.


4. La Nacia Sinodo atentis pri la graveco de la debato pri la laikeco de nia socio : la malfirmigo de la komunaj referencoj, la kultura plureco, la progreso de la maltoleremoj kaj integrismoj metas en novaj terminoj la demandon pri la laikeco. La protestantaj eklezioj havas originalan lokon por teni en ĉi tiu debato. Kia povas esti ilia specifa servo en laika socio ?

La Nacia Sinodo rekomendas ĉi tiun demandon je la atento de ĉiuj komunumoj.

5. La temo, pri kiu ni laboris, invitas ĉiun al reveno sur sin mem. Ĝi estas la okazo rekonsideri niajn prioritatojn, niajn elektojn por la vivo, nian rilatadon al la plej senrimedaj kaj randigitaj. Eltrovi ankaŭ per la Evangelio, ke ĉiu havas en si neuzitajn kapablecojn por agi, por komuniki, por novigi.

Tiun ĉi pripensado rilatas ĉiun. Ĝi orientas nin kune al la serĉo de tio, kio povus esti nova spiritualeco por nia tempo, inventokapabla de novaj solidarecoj.

Dokumento BIP
trad. André Bachelier



Rita Rössler

# ASSISI : PACO INTER LA RELIGIOJ ?

«Vere mi ekkomprenas, ke Dio ne partiemas
je iuj personoj, sed en ĉiu ajn etno,
la Dion timantaj kaj juste agantaj
estas de Li akceptataj.»
(Agoj 10:34-35)

## Kial Assisi ?

Ĉar, en tiu itala urbo naskiĝis kaj vivis **Francisko** (1181-1226), la malriĉuleto, kiu eminente praktikis kaj disvastigis universalan, eĉ kosman fratecon. Lia salutesprimo estis : «Al ĉiuj loĝantoj en la tuta mondo mi, frato Francisko, malgranda ulo kaj servanto, deziras pacon el la ĉielo kaj sinceran amon en la Sinjoro Dio.» Eĉ dum la krucmilitoj, kiam kristanaj armeoj akre batalis kontraŭ islamanoj, Francisko sin prezentis milde kaj humile al la egipta sultano, parolante pri Dio kaj Jesuo Kristo ; kaj la islama suvereno lin respektis kaj honoris.

La krucmilitoj apartenas al forpasintaj epokoj, sed malpacoj kaj perfortoj iel ligitaj kun religiaj diversecoj estas bedaŭrinde ankoraŭ aktualaj : hinduistoj kaj sikoj en Hindio ; kristanoj, islamanoj kaj druzoj en Libano ; islamanoj kaj kristanoj en la kaŭkazaj sovetiaj respublikoj ; kaj tiel plu... Ofte tiaj malpacoj havas politikajn aŭ sociajn bazojn, kaj estas kondamnataj de la religiaj respondeculoj ; tamen la skandalo restas.

## La dialogo inter la religioj

En ĉiuj epokoj ne mankis grandaj animoj kiuj strebis al interreligiaj toleremo kaj dialogo, sed ĉefe en la lasta jarcento tiu idealo konsciiĝis pli vastajn homrondojn. Inter la unuaj provoj ĉi-sence menciindas la t.n.

---

**PACO, INTERRELIGIA DIALOGO, INTERNACIA RELIGIA KONFERENCO** · PAIX, DIALOGUE ENTRE RELIGIONS, CONFERENCE RELIGIEUSE INTERNATIONALE · PEACE, INTER-RELIGIOUS DIALOGUE, INTERNATIONAL RELIGIOUS CONFERENCE · FRIEDE, INTERRELIGIöSER DIALOG, RELIGIöSE INTERNATIONALE KONFERENZ · PAZ, DIáLOGO ENTRE RELIGIONES, CONFERENCIA RELIGIOSA INTERNACIONAL · PACE, DIALOGO TRA RELIGIONI, CONFERENZA RELIGIOSA INTERNAZIONALE.

**Monda Parlamento de Religioj** (angle *World's Parliament of Religions*), kunvenigita en Chicago (Ĉikago), Usono, lige kun la 4-a jarcento de la malkovro de la amerika kontinento. La Parlamenton lanĉis la presbiteriana kaj katolika eklezioj de Usono, kaj funkciis 17 tagojn, ekde la 11-a ĝis la 17-a de septembro 1893, kaj ĝin partoprenis pluraj centoj da religi-fakuloj : monaĥoj, pastoroj, misiistoj, historiistoj, filozofoj.

Celo de la Parlemanto estis instigo al paca interŝanĝo de ideoj kaj sentoj pri la diversaj religiaj travivaĵoj. Ameriko intencis per tio prezenti al la mondo modelon de toleremo : montri ke la kvereloj kiuj kaŭzis malpacojn en Eŭropo, ne plu daŭras en Ameriko ; pruvi ke konkordo inter religioj estas ebla kaj dezirinda ; kaj ke senreligieco kaj materiismo kontraŭas al la fundamentaj homecaj ideoj.

La inaŭguran ceremonion partoprenis ĉirkaŭ 4000 homoj. La reprezentantoj de la grandaj religioj eniris procesie, vestitaj per religiaj ornatoj. La "Patro-nia"-preĝo, akceptita de ĉiuj, estis recitata ĉiumatene de la asembleo. La ferma kunsido kunvenigis 10 000 homojn, kaj estis vere triumfa.

Ni rimarkigas, ke ĝuste en tiuj jaroj Esperanto komencis sian aventuron, kun similaj idealoj, kiel evidentiĝas interalie el la Zamenhofa *Preĝo sub la verda standardo*, kies unuan kaj lastan strofon ni citas :

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas
Hodiaŭ ni preĝas.

........................

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj
Antaŭen kun pacaj armiloj !
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.

Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine !

En la interreligiaj rilatoj oni pasis el **malŝato** al **tolero** ĝis **respekto**. Ĉi-teme la Koncilio Vatikana Dua deklaris (1965) :

> «La katolika eklezio nenion rifuzas el ĉio kio estas vera kaj sankta en ĉi tiuj religioj. Ĝi konsideras kun sincera respekto tiujn ag- kaj viv-manierojn, tiujn ordonojn kaj instruojn, kiuj, kvankam plurflanke diferencaj ol tio kion ĝi instruas kaj proponas, tamen ne malofte reflektas radion de tiu vero, kiu lumas al ĉiuj homoj.»

La koncilia deklaro ne restis senefika : diversaj lokaj kaj internaciaj iniciatoj estis lanĉitaj. Inter ili menciindas la islam-kristana Dialogo en Tarabulus (Tripolo), Libio (1976), kun 500 partoprenintoj ; la Kolokvo pri *Religio kaj homo* en Cochin, Hindio (1980), kun 250 partoprenintoj ; la Monda Kongreso de Religiistoj pri Etiko en Tokio kaj Kioto, Japanio (1981). Al tio aldoniĝis reciprokaj vizitoj de kristanaj *monaĥoj* en Bangkok (1968), Bangalore (1973), Srilanko (1980), kaj de orientaj monaĥoj en eŭropaj kristanaj monaĥejoj.

Intertempe formiĝis pluraj konstantaj organizaĵoj, inter kiuj eminentas la *World Conference on Religion and Peace* (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), kiu aranĝis kunvenojn en Kioto, Japanio (1970), Leuven, Belgio (1974), Princeton, Usono (1979), Nairobi, Kenjo (1980)... Sed Assisi estis alia afero !

## La tago de Assisi (Asizo)

Longtempe preparita, la Asiza renkontiĝo estis oficiale anoncita de papo Johano Paŭlo 2-a la 25-an de januaro 1986 en la roma bazoliko de S. Paŭlo, je la ĉeesto de reprezentantoj de diversaj nekatolikaj konfesioj kunvenintaj por la fino de la preĝo-semajno por la unueco de la kristanoj :

> «En ĉi tiu solena okazo, diris la papo, mi deziras anonci ke mi estas iniciatanta oportunajn konsultojn kun la respondeculoj ne nur de la kristanaj konfesioj kaj komunumoj, sed ankaŭ de aliaj

religioj de la mondo, por estigi kune kun ili specialan preĝo-renkonton por paco en la urbo Assisi, kiun la karitatoplena figuro de S. Francisko transformis al centro de universala frateco.»

La 27-an de oktobro 1986 alvenis al Assisi reprezentantoj de pli ol sesdek religioj, konfesioj, komunumoj, sektoj kaj internaciaj religiaj organizaĵoj : katolikoj, ortodoksanoj, antikvaj (antaŭ-kalcedonaj) eklezioj, pra-katolikoj (malnov-), anglikanoj, protestantoj, hebreoj, islamanoj, budhistoj, ŝintoistoj, hinduistoj, sikoj, ĝainoj, zoroastranoj, afrikaj kaj indianaj tradici-religianoj, ktp.

Lanĉante la preĝo-tagon de Assisi oni zorgis eviti **malajn ekstremismojn**. Ĉe unu ekstremo estas la **integrismo**, la **demonigo** de ĉiuj religioj ekster la propra. Tio kondukas al **maltoleremo** kaj certe ne akceptas tiajn interreligiajn aranĝojn. Aliflanke staras la **relativismo**, **eklektismo**, **sinkretismo**, kiu kondukas al **kompromisemo** kaj **indiferentismo**. Kontraŭ tiaj ekstremismoj, oni pledis por **fideleco** al sia konscienco kaj kredo, kunigita kun **respekto** al la konsciencoj kaj kredoj de la aliaj kaj **konscio** pri nia komuna, **frata homeco**, kies fonto kaj celo estas plej supera Estulo, kiun ni nomas Dio.

La Asiza tago komenciĝis per la akcepto de la diversaj religianoj fare de la papo, kiu klarigis la sencon de la iniciato :

> «La kunveno de tiom da religiaj estroj, li diris interalie, hodiaŭ estas per si mem invito al la mondo konsciiĝi ke ekzistas alia dimensio de paco, kaj alia maniero por ĝin akceli, kiu ne estas rezulto de intertraktoj, de politikaj kompromisoj aŭ de ekonomiaj marĉandoj. Ĝi estas rezulto de preĝado... Ke ni venis ĉi tien, ne implicas ajnan intencon strebi al religia konsento aŭ marĉandi niajn religiajn konvinkojn.»

Post la akcepto, la diversaj religianoj disiris en diversajn lokojn por aparta preĝado. La diverskonfesiaj kristanoj preĝis kune, ĉar, kiel emfazis siatempe papo Johano 23-a, «tio kio nin kunigas estas ege pli multe ol tio kio nin disigas.»

Fininte la apartan preĝadon, ĉiuj faris **pilgrimon** al komuna loko, simbole al tio kio devus esti la komuna evoluo de la homaro : "frateca vojaĝo, en kiu unuj reciproke akompanas la aliajn al la transcenda celo, kiun Dio destinas por ni.". En la komuna loko (la malsupra placo de S. Francisko) la pilgrimuloj, kiuj observis religian **faston** en la tuta tago, faris denove ne komunan, sed laŭvican **preĝon**. Jen fragmentoj de preĝoj.

**Budhistoj preĝis jene :**

«Ke ĉiuj estuloj, kie ajn ili estas, suferantaj korpe aŭ mense, ekhavu oceanon da feliĉo kaj ĝojo, per niaj meritoj...
Ke la nudulo trovu vestaĵon, la malsatulo nutraĵon, la malesperulo esperon, daŭran feliĉon kaj prosperon...»

**Hinduistoj preĝis jene :**

«Ho Dio, gvidu nin el iluzio al Realo
Ho Dio, gvidu nin el mallumo al lumbrilo
Ho Dio, gvidu nin el morto al senmorteco.
Pacon, pacon, pacon al ĉiuj.
Ni preĝpetas pacon en la ĉieloj ; pacon enĉiele kaj surtere ; pacon en la herboj kaj la plantoj ; pacon en ĉiuj Diaĵoj ; pacon al la tuta kreaĵaro.»

**Islamanoj preĝis jene :**

«En la nomo de Dio, Bonkora kaj Kompatema.
Laŭdon al Dio, Sinjoro de la Universo, Bonkora kaj Kompatema, Reganto de la Rekomenc-Tago...
Servantoj de Dio estas tiuj kiuj iras surtere en humileco kaj, kiam malklerulo sin turnas al ili, ili diras : Pacon !»

**Ĝajnoj preĝis jene :**

«Omaĝon al la plej Pura
Omaĝon al la Liberiĝinto
Omaĝon al la Majstroj
Omaĝon al la Religiaj Instruistoj
Omaĝoj al la Tutmondaj Asketoj
Armilon kiom ajn fortikan povas venki armilo pli forta ; tamen nenia armilo pli fortas ol senperforto.»

**Ŝintoistoj preĝis jene :**

«Ĉeftasko de kredanta homo rilate la nuntempajn mondon kaj homaron devus esti : pli kaj pli firmigi sian solidarecan senton, por ke samaj estu la sinceraj preĝoj...

Kvankam la popoloj vivas trans la maro, kiu ĉirkaŭas nin, ni kredas ke ĉiuj estas niaj fratoj...»

**Sikoj preĝis jene :**

«Ĉiopova Dio, subteno de mia vivo-spiro, amiko de vidvoj, amiko de malriĉuloj, liberigu min el aflikto, kaj donu al mi pacon...»

**Afrikaj tradici-religianoj preĝis jene :**

«Dio Ĉiopova... Ni ĉiuj hodiaŭ vin preĝpetas unucele. Al nia mondo mankas paco. Nin ĉirkaŭas daŭraj militoj kaj konfliktoj. Ni bezonas pacon. Tio instigis la sanktan patron inviti ĉiujn mondajn religiojn kunveni por preĝi por paco... Ke viaj benoj estu abundaj super favorantoj kaj laborantoj por paco.»

**Indianaj tradici-religianoj preĝis jene :**

«Mi preĝos por ke ni ĉiuj devontiĝu preĝi kaj aktivi por paco interne de niaj familioj, triboj kaj nacioj. Mi preĝas por ĉiuj miaj fratoj kaj fratinoj irantaj sur ĉi-nia Patrino Tero. Mi preĝos en mia lingvo... sed antaŭ ol ekpreĝi, mi petas ĉiujn ĉeestantojn preĝi samtempe kun mi, ĉiu siamaniere.»

**Zoroastranoj preĝis jene :**

«Kiu preĝas, tiu sin turnas al Dio. Li sciu ke perforto estas radiko de ĉiuj mizeroj en la mondo. Ĉi tie kompenemo triumfu super miskompreno ; paco triumfu super malkonkordo ; sindonemo super indiferenteco ; estimo super malŝato ; vera parolo triumfu super mensoga parolo ; triumfu la vero super la falso.»

**Hebreoj preĝis jene :**

«Nia Dio, kiu estas en la ĉieloj, la Sinjoro de paco kompatos kaj korfavoros al ni kaj al ĉiuj filoj de la tero, preĝantaj por favorkoreco kaj kompato, petante pacon, strebante al paco...

Ho Sinjoro, kiu estas en la ĉieloj, donu pacon al la tero, donu bonfarton al la mondo, donu trankvilon al niaj hejmoj.»

**Kristanoj preĝis jene :**

«Sinjoro, faru min ilo de via paco :
kie estas malamo portu mi Amon
kie estas ofendo portu mi Pardonon
kie estas malkonkordo portu mi Unuecon
kie estas malespero portu mi Esperon
kie estas aflikto portu mi la Ĝojon
kie estas mallumo portu mi Brillumo.
Ho Majstro, faru ke mi ne celu :
esti konsolata pli ol konsoli
esti komprenata pli ol kompreni
esti amata pli ol ami ;
ĉar donacante oni ricevas
pardonante oni estas pardonata
mortante oni releviĝas por eterna vivo.»

**La fruktoj de Assisi**

Rimarkinde estas ke en la Asiza tago okazis batalhalto de militoj kaj geriloj en preskaŭ la tuta mondo. La 27-a de oktobro 1986 instruis ke la religiemaj homoj estas packonstruantoj : aŭtentika religieco estas bazo de paco, kaj serioza konstruo de paco estas signo de vera religiemo.

Assisi estis la unua, eble la spirite plej intensa kunveno de religiestroj. La dua okazis la 3-an de aŭgusto 1987 : temis pri la "Kulmin-kunveno de **Hiei-monto**" apud Kioto, Japanio, lanĉita de la 92-jara respektinda Eitai Yamada, okaze de la 1200-a jubileo de la fondo sur Hiei-monto de la nukleo de la japana budhismo. Ĝi estis forta daŭrigo de la "Asiza spirito".

La tria preĝo-tago por paco okazis en Warszawa (Varsovio), Pollando, la 2-an de septembro 1989. Ĉi-okaze la papo ĉeestis per televida mesaĝo. Per citaĵo el ĝi ni resumas la sencon de la mirinda vojo, kiu komenciĝis en Assisi, pludaŭris en Hiei-monto kaj Warszawa, sed atendas pluajn paŝojn el ĉiuj bona-volaj religianoj, kun la helpo de Dio :

> «Vi volis daŭrigi la vojon de Assisi, en spirito de strebado al paco per preĝado kaj interreligia dialogo... Hodiaŭ en Warszawa, plenumiĝas alia etapo de ĉi tiu signifoplena irado de diversreligiaj homoj strebantaj al paco... Necesas daŭrigi ĉi

tiun strebadon al paco en dialogo kaj preĝado... Mi bondeziras ke la voĉo de la homoj hodiaŭ kunvenintaj en Warszawa atingu la korojn de ĉiuj homoj kaj ilin konvinku trairi la vojon de dialogo kaj de intertraktado respektema al ĉies rajtoj !»

Battista Cadei, Italio

---

Battista CADEI, italo (1937), romkatolika pastro de 1963, doktoro pri klasika filologio, instruisto pri greka kaj latina lingvoj, vicparoĥestro, eksredaktoro de la Esperanto-sekcio ĉe Radio Vatikana.

Do revas ni okulaperte :
     Venu ŜALOM en plena senco,
          Konstruu ni kun pacienco
               Kaj lerte

Ĉi mondon, sed inversigita !
     Ĉesu malgaj' de kiu ploras :
          Larmfrapojn onte ni titolas
               Granitaj !

Por senhejmuloj jen tegmenton,
     Putojn konstrui en dezerto,
          Laciĝi eĉ ne pro fi-sperto
               Momenton :

Ekhaltu fine fuĝantfluo,
     Ĉies ĉagrenon ni forkisos,
          Nenies larmojn plu publicos
               Revuo.

Ho glora celo : Sankta Paco !
     Home vivadi sur ĉi Tero :
          Estu Justeco kaj Libero
               Kompaso !

por U.E.A.
Gerrit Berveling, Nederlando
el *Trifolio*, Vlardingena kajero 5, pp. 9-10
kaj el *Poemaro por Paco*

notoj :
'EIPHNH (ejrene) : helenaĵo,
PAX : latinaĵo,
ŜALOM : hebreaĵo,
ĉiuj tri signifas PACO
sed iliaj enhavoj ne samas...

## PACO INTER HOMOJ : ĈU EBLAS ?

### Konvinkoj

Mi memoras pri tiu episkopo, al kiu oni petis, ke li diru kelkajn vortojn pri la homa pekemo. Li respondis : «Se paroli ĝenerale, mi estas kontraŭ ĝi.» Ĉar oni petis ke mi diru kelkajn vortojn pri paco inter homoj, mi registru tuj en la komenco, ke mi estas por ĝi. Fakte, mi edukiĝis en familio kaj en politika medio, en kiuj la koncepto "milito" estis fiaĵo kaj la laboristoj de la mondo intencis unuiĝi kaj malebligi militojn. Tamen ni eble ne rimarkis ke klasbatalo estas en si mem speco de milito, kaj ke kapitalismon oni ne povos faligi sen perforto kaj militado reala. Sed se nia afero estas justa, finfine, nia milito estas do justa kaj pravigita, ĉu ne ? Kaj pro tiu konvinkiĝo, la homoj ĝenerale ne pensas paceme, malgraŭ piaj kaj kliŝaj publikaj deklaroj.

Mia patro estis soldato en la unua mondmilito kaj grave vundiĝis ; saman sorton ankaŭ spertis mia bopatro, cetere, kaj dekmiloj da aliaj viroj, pli bonŝancaj ol la milionoj kiuj detruiĝis - kiuj revenis hejmen tute seniluziigitaj kaj deklarante, ke tiu milito estis la lasta milito, ĉar la homoj lernos la lecionon kaj ne permesos ripetadon de tiu genocido. Anstataŭ tio, oni konstruos mondon taŭgan al la herooj revenintaj. Tiel kontraŭmilita estis mia patro, ke li malpermesis al mi ĉiajn ludilojn kiuj iel ajn spegulis militon : plumbaj soldatoj, tankoj, revolveroj, glavoj - ludiloj ĉiam tre allogaj por knaboj, ankoraŭ hodiaŭ ĉie videblaj en la manoj de knabetoj, ofte en formo de interstela militado kiel montrata sur kinejaj ekranoj, televido, ktp. Tre popularaj cetere estas ankaŭ filmoj pri diversaj militoj kaj armeoj.

Kaj la rezulto de mia edukado ? Ankaŭ mi unuavice iĝis militisto, konvinkita pri la justeco de nia afero :

> "Ni, la junuloj, iris en inferon
> por tranĉi el la monda mam' kanceron :

---

**MILITO, PACO, PSIKOLOGIA VIDPUNKTO** · GUERRE, PAIX, POINT DE VUE PSYCHOLOGIQUE · WAR, PEACE, PSYCHOLOGICAL POINT OF VIEW · KRIEG, FRIEDE, PSYCHOLOGISCHER GESICHTSPUNKT · GUERRA, PAZ, PUNTO DE VISTA PSICOLóGICO · GUERRA, PACE, PUNTO DI VISTA PSICOLOGICO.

ni kredis je pli forta posta sano,
pli pura vivo laŭ pacama plano."
(*La perfidita juno*)

Kaj ankaŭ mi revenis seniluziiĝite :

"Se denove mi militus
laŭ ordon' de l' registaro,
kaj per bomboj forlikvidus
kelkajn milojn de l' homaro -
ili estus miaj fratoj,
demokratoj :
eternan punon mi meritus,
se denove mi militus.
(*La granda aventuro*)

Malgraŭ tio, mi notis en *La infana raso* :
"Ni rigardu iom la faktojn : tria milito
dum nia jarcento estas neevitebla,
Ĉar :
Jam la junaj parolas pri nova milito,
dum sango apenaŭ sekiĝis sur niaj manoj."
(Ĉapitro XXI)

La tuta pensmaniero de la normalaj homoj, inter kiuj mi kalkulas ankaŭ min, estas plenplena je naivaĵoj kaj kontraŭdiroj. Pro tio, kvankam mi estas 'por' la paco, mi sentas necese esplori la demandon : la paco - ĉu ĝi eblas ?

**Neniam**

En la antikva Romo staris templo dediĉita al la dio Jano. La pordojn de tiu templo oni fermis nur tiam, kiam en la tuta Imperio regis paco. La imperiestro Aŭgusto notis ke dum pli ol kvardek jaroj de lia regado la pordoj de la templo estis fermitaj nur trifoje. Mi devas diri ke tiuj tri fojoj prezentas gratulindan sukceson. Se ni hodiaŭ posedus templon, kies pordon oni fermus nur kiam paco regus en la mondo, tiuj pordoj *neniam* estus fermitaj dum la nuna jarcento, nek en la pasinta jarcento, nek en iu ajn jarcento de la kristana epoko, ĉar en ĉiu momento okazas milito ie

en la mondo. Mi eraris, dirante, ke tria milito dum nia jarcento estas neevitebla - ĉar jam okazis kaj okazas tria, kvara, kvina, ktp. militoj. Jam frue post la dua mondmilito. Reto Rossetti registris :

"Homaro ! Super ĉi inundo
ne portos flose vin arkeo !
Jam faŭkas la abisma fundo :
Oni militas en Koreo."
(*Balado pri la malfacilo kuiti belon en la nuna malkvieta mondo*)

Mia eraro - kiun partoprenas tre multaj homoj - estis pensi nur pri milito nuklea, forgesante pri militoj, kiujn oni nomas 'konvenciaj' (jen bela vorto en la kunteksto) !

Tiu citaĵo el Rossetti delogas min flankeniĝi momente en mia temo, ĉar la korea milito (hodiaŭ preskaŭ forgesita) ankaŭ alimaniere inspiris lin. Tiama skota studrondo starigis konkurson por verkado de infanrimaĵoj en Esperanto. Konstatinte ke en aliaj lingvoj la infanrimaĵoj ofte - kvankam tion oni ne plu rekonas - memorigas ian eventon, kiu siatempe ŝajnis grava en la socio, do estis iasence satira. Reto verkis infanrimaĵon surbaze de la aktuala korea milito, kiu tre interese pruvas la diritan tezon pri forgesitaj eventoj : neniu hodiaŭ povas kompreni la rimaĵon, kiu ne scias ke "Duglas" estis usona generalo kaj "Jalu" estas korea rivero, apud kiu okazis grava batalo en tiu milito, fakte la bordo inter Norda kaj Suda Koreio. Jen tiu infanrimaĵo :

"Brava Duglas
fajras, kuglas,
en la norda neĝo.
Ek al Jalu ! -
sed ne falu,
pum ! de via seĝo !"

**Akceptindaj !**

Sed tia malserioz0 vere ne konvenas al nia grava temo. Unue la atombombo kaj poste la nukleaj eksplodiloj kaŭzis interesan disduiĝon en nia pensmaniero pri milito. Tiel terura estas la minaco de nukleaj

armiloj, ke tiuj t.n. 'konvenciaj' armiloj ekŝajnas eĉ akceptindaj ! Finfine, bomboj, tankoj, eĉ napalmo nur mortigas homojn kaj detruas konstruaĵojn ktp., dum nukleaj armiloj kapablas dezertigi la planedon kaj malebligi travivon de la raso. Pro tio ni estas kontentaj toleri malpli fiajn aferojn prefere ol la neimageble terurajn sekvojn de milito per nukleaj armiloj. Toleri, jes. Nur supraĵe ni indigniĝas, kiam Irako kaj Irano intermilitas dum preskaŭ dek jaroj kun detruiĝo de eble miliono da vivoj kaj bombardado de urboj kaj vilaĝoj ; kiam homoj mortpafas unu alian kaj bombe mortigas senkulpajn virinojn kaj infanojn en Norda Irlando ; kiam oni perversigas la mensojn de infanoj kaj junuloj en sociaj malpacaj regionoj - do en la jam menciitaj lokoj kaj multaj aliaj kiel Libano. Protestas pri tiaj fiaĵoj nur tute malgrandega minoritato da individuoj en diversaj landoj, kaj iliaj protestoj fakte restas senefikaj antaŭ la indioferento de la plimulto.

Niaj lingvoj perfidas nin ofte, kaj videbligas niajn nerimarkatajn kontraŭdirojn kaj senkosciajn hipokritaĵojn. Ekzemple, ni ofte uzas la vorton 'paco', sopiras pri paco aŭ preĝas por paco, ne rimarkante ke la nocio 'paco' en si mem implicas la nocion 'milito'. Ni preĝas aŭ laboras por 'paco' ĉar 'milito' restas ebla alternativo. Kaj milito restas alternativo ĉar ĝi estas implicita en nia homa naturo. Oni povas diri iom troige ke vera paco ekzistos nur tiam, kiam la vorto malaperos, kaj tio, kion ni nomas 'paco', nomiĝos 'normaleco' ; kiam okazos tio, la humilaj estos heredintaj la teron - kaj laŭ ĉiuj signoj kaj spertoj tio ne okazos tre baldaŭ.

**Universala ?**

Tio ne okazos tre baldaŭ ĉar agresemo, perfortemo kaj potencavido estas universalaj homaj karakterizoj en pli aŭ malpli granda proporcio. Espereble mi neniun ofendas per tiu pretendo. Evidente ne ĉiu el ni - espereble neniu el **ni** - estas embria Hitler aŭ Kaligulo. Sed ni ankaŭ ne ĉion toleras senreage, ni ne akceptas senproteste ke oni superuzu nin aŭ traktu nin malŝate aŭ maljuste aŭ malestime. Nia memrespekto postulas ke ni elbatu por ni taŭgan pozicion en la familio, en la socio, en la pangajna posteno. Ĉar ne ĉiam fizike montriĝas nia agresemo, nia potencavido : ankaŭ psike ni strebas gajni avantaĝojn, ĉu etajn ĉu egajn, en niaj diversaj rondoj - pensu ekzemple pri la konata ĝangalo de oficejaj politikoj ! Nur sanktulo, oni foje pensas, kapablus malhavi

tiajn karakterizojn - kaj estas historia fakto ke ne ĉiuj gesanktuloj nombriĝis inter la humiluloj de la tero. Pensu ekzemple pri Sankta Jeanne d'Arc.

La normaleco de luktoj kaj streboj, eĉ de milito, estas tre ofte implicita en niaj metaforoj. Ĉu ni esperantistoj ne nomas nin pacaj batalantoj, kaj ĉu tio ne estas granda kontraŭdiro ? Kaj tamen se ni ne batalintus, ĉu nia afero ekzistus tra cento da jaroj ? Multaj el niaj plej aprobindaj movadoj kiuj fakte ilustras niajn aliajn, pli mildajn karakterizojn, uzas similajn metaforojn : la Savarmeo, ekzemple, dediĉita al la bonfaro, posedas generalojn, majorojn, leŭtenantojn, ktp. Kompreneble ĝi militas - sed kontraŭ la Diablo, la Princo de la Mallumo, kio kompreneble estas milito justa. Sed militoj ĉiam estas justaj - laŭ iuj. Same aprobinda estas la movado *Milito kontraŭ manko* ; sed la elekto de tiu titolo klare pruvas, ke ni senkritike akceptas la koncepton de milito kiel natura fenomeno. Homoj dezirantaj pacon ĝenerale rekonas ke sian celon ili ne atingos senlukte, kaj ne malofte rigardas tiun atingon kiel specon de 'venko' : tiuj, kiuj 'pasive rezistas' - ekzemple subtenantoj siatempe de Ghandi - tamen utiligas forton, la forton de la inercio.

Sed kiam ni parolas pri tiaj temoj ni fakte supozigas ke ĉiuj homoj estas 'normalaj', ke ĉiuj homoj, same kiel ni mem, posedas la universalajn homajn instinktojn kaj impulsojn. Ni supozigas ke ĉiuj homoj ĝis pli aŭ malpli granda grado scias elekti inter bono kaj malbono, scias pesi situacion racie kaj emocie kaj laŭeble agi bonintence. Ni fakte supozas, ke ĉiuj homoj abomenas militon kaj respektas la vivon. Sed tiel tute ne estas. Ni scias ke multaj homoj volonte dungiĝas kiel soldatoj, kaj elserĉas militojn por kiuj dungiĝi, kondiĉe ke la materia profito estas sufiĉe ampleksa. Ni scias ke eĉ sen militoj eblas dungi iun, kiu kontraŭ monpago pretas mortigi aŭ torturi aliajn homojn. Fakte ni estas devigataj rekoni ke signifa proporcio de la homa raso tute malhavas varmkorecon, kompaton, eĉ normalan komprenon pri aliuloj ; al tio aldoniĝas en ili malkapablo antaŭvidi sekvojn kaj konsekvencojn de diversaj agoj. Tiun psikan staton ni nomas psikopatio, kaj ĝi estas multe pli ofta inter ni, ol ni ŝatas supozi.

**Psikopatio ?**

Psikopatoj pretas murdi kaj seksperforti, foje tute kaprice aŭ pro momenta koleriĝo. Ili volonte dungiĝas kiel torturistoj kaj ekzekutistoj. En Britio antaŭ ol oni nuligis la mortpunon, la ŝtatoficejo ricevis ĉiumonate meznombre pli ol po unu petskribon por la posteno de ŝata ekzekutisto. Mi ne volas aserti ke ĉiu petinto estas psikopato laŭ la plena psikologia takso, sed mi ja opinias ke homon pretan tute rutine mortigi aliulojn oni ne povas rigardi kiel tute normalan. Espereble ne. Tiajn frenezulojn nia socio klopodas regi, eventuale en frenezulejoj kaj malsanulejoj, eventuale en malliberejoj. Sed pruvi la psikopatecon de individuoj estas preskaŭ neeble sen la atestaĵo de jam faritaj krimoj. Rekoni ilin ofte oni povas ; kiel instruisto dum pli ol tridek jaroj mi rekonis kelkajn inter la gejunuloj, kaj kelkfoje tiu rekono estis konfirmita per ilia plenaĝa agado. Rekoni, sed kiel pruvi ? Kaj se tia homo, al kiu mankas ĉia kompatemo kaj sentoj de bonkoreco, fariĝas ŝtareganto aŭ potenculo, kio tiam okazas ? La historio, proksima kaj malproksima tempe, liveras al ni sennombrajn ekzemplojn de tia situacio, kaj regnoj de krueleco, ekstermado eĉ de propraj ŝatanoj, torturoj kaj ekzekutoj, abundis en la pasinteco kaj ekzistas hodiaŭ. Psikopata reganto facile varbas similajn subulojn, kaj ankaŭ subulojn kiuj pretos fari laŭordone plej malbonajn aferojn - pli precize, aferojn malhomecajn - por gardi la propran bonstaton. Unu rezulto de tia potenco estas ofte... milito. Nia jarcento spertis tion ; sed mi proponas por konsidero fenomenon de antaŭ precize ducent jaroj : la Franca Revolucio. Tiu revolucio en la komenco celis nuligi sociajn maljustaĵojn kaj starigi egalecan utopion ; sed tiu celo tre baldaŭ forgesiĝis en teroro de persekutoj kaj poste... militoj. En tiaj politikaj ĥaosoj, la homoj plej senkompataj kaj senskrupuloj plej kapablas kapti al si la regadon. Tiaj ĥaosoj ĉiam kaj ĉiam povas okazi en la politika vivo. Ĉiam eblas ke la psikopatoj nin regu ; kaj tio nepre ebligas ĉiumomente militon.

La psikopation klopodas klarigi - kaj sekve kompreni - niaj psikologoj. Sed kiel klarigi kaj kuraci ennaskitan malhomecon ? Tio ne estas laŭmoda koncepto, tamen mi asertas ke malhomeco estas ofte en individuoj ennaskita. Kaj kial ne ? Diversaj kripluloj naskiĝas, bedaŭrinde, homoj kiuj denaske lamas, blindas, surdas, kretenas. Ĉu do ni miru pro naskiĝo de kripluloj emociaj, homoj kiuj senkoras, egoismas, batalemas, psikopatas ? Jam delonge daŭras debato pri la proporcia influo al la

personeco de heredo kaj eduko. Kio estas ennaskita, kio estas trudita de la cirkonstancoj ? Tiu demando komprenebla restas nerespondita, sed tutcerte neniu el ambaŭ influoj estas komplete senkulpa. Se ni egaligas la edukon, tamen restas inter individuoj profundaj malsimilecoj, eĉ foje inter t.n. identaj ĝemeloj. Por multaj, espereble la plimultaj el ni, edukado povas moderigi niajn ennaskitajn karakterizojn, sed kiel oni ne ĉiam povas doni vidkapablon al denaska blindulo, tiel oni ne povas ĉiam doni kunsentemon al denaska senkorulo. La psikopatojn ni ĉiam havas inter ni. Kiel ĉe individuoj, tiel ankaŭ ĉe grupoj, kun tiu diferenco, ke grupoj emas agi eĉ malpli racie ol individuoj. Sendiskute, la homo estas besto gregema. Inter ni ekzistas sendependemuloj, sed ili estas vere maloftaj, kaj ilin la grupoj rigardas kiel ege ekscentrajn. Tiu politikisto kiu diris : «Mi sincere bedaŭras la tagon, kiam mi enlasis en mian partion la duan membron» estas admirata de multaj, sed traktita serioze de neniu. Politikisto sen partio estas nur ridinda en ĉiu reala kunteksto. En grego aŭ grupoj la individuoj sentas sin pli sekuraj ; sed ili estas ankaŭ pli regeblaj kaj trompeblaj. Aneco en iu grupo kvazaŭ transdonas individuan respondecon al tiu grupo. Tre ofte en lernejoj, kiam oni akuzas lernanton pri iu malobeo al regulo, tiu indigne protestas : «Sed mi ne estas la sola kulpulo !», ne komprenante, ke tiu fakto neniel senkulpigas lin kiel individuon. Kaj ni scias ke grupoj kapablas plenumi iun fiaĵon, kiun kapablus neniu grupano individue.

Kaj bedaŭrinde, aneco en iu grupo tre tre ofte implicas malamon al aliaj grupoj. Tio povas okazi surbaze de ekzemple religio, raso, gento, nacio, klaso, aŭ kontraŭuloj estas, ĉu ne, laŭdifine malamikaj. Tiaj malamoj tutsimple ne havas racian bazon, kvankam kompreneble la grupoj klopodas pravigi racie siajn antipatiojn. Sed multaj homoj spertas maltrankvilon en ĉeesto de apartenantoj al aliaj grupoj : blankuloj en ĉeesto de nigruloj, nejudoj en ĉeesto de judoj, ktp., kaj ĉiam kompreneble, reciproke. Tia maltrankvilo, kiam ĝi ekzistas, sentiĝas tute senkonsidere pri la apartaj trajtoj de la koncerna individuo aŭ individuoj. Racian bazon ĝi malofte havas. Sed tiu sento povas rezultigi grandajn maljustaĵojn, kverelojn, interbatiĝojn kaj finfine militojn. Ŝajnas al mi ke tiu sento estas speco de histerio, kiel ajn oni volas difini tiun terminon. Grupo turniĝas kontraŭ grupon, precipe se la alia grupo estas malpli multnombra, do t.n. minoritato. Milito estas nur logika rezulto de tia mallogika konduto.

## Montri sian forton

Alia faktoro kiu kontribuas al militemo, estas la aventuremo de la plimultaj gejunuloj. Tio rezultiĝas parte de niaj instinktoj, parte de la edukiĝo. La ĉefa rolo de la junaj en iu grego estas certigi la daŭrigon de la grego per reprodukto, kaj tiucele ili iĝas dum kelkaj jaroj plejofte fanfaronemaj, sinmontremaj, konkuremaj inter si. Tio validas pri ĉiuj duseksaj kreaĵoj, inkluzive de la homo. La junuloj klopodas allogi al si junulinojn per agoj rimarkinde virecaj ; kaj junulinoj provoke kuraĝigas tion, por ili havigu al si la plej fortajn kaj viglajn ensemantojn. Inter la rekonataj taskoj de la junaj viroj ĉiam enkalkuliĝis ankaŭ batalado kaj militado. Manko de milito ili serĉis kaj ankoraŭ serĉas okazojn por pruvi, al si kaj al aliaj, sian forton kaj sian kuraĝon. En iuj triboj tia estas ekzemple mortigo de leono aŭ de alia sovaĝa besto, en niaj triboj tia estas ekzemple rapidega veturado sur motorcikloj aŭ en aŭtomobiloj. Danĝero estas por normala junulo stimulilo, pesilo de liaj karakterizaĵoj kaj kapabloj. Al tiaj animoj, milito povas prezentiĝi kiel aventuro. Miakaze, la registaro ebligis al mi lerni la pilotadon kaj disponigis al mi la plej rapidan, plej manovreblan kaj plej pafkapablan aviadilon de la epoko, kaj tio ege plaĉis al mi. Mi malmulte antaŭpensis eventualajn sekvojn de tio, kaj kiam, ĉe festo post mia kvalifikiĝo, mia fluginstruisto diris al mi : «Postnelonge vi batalos por via salajro», tiu evidentaĵo fakte venis al mi preskaŭ surprize ! Junuloj tutsimple ne konceptas propran morton - ĝis ĝi konfrontas ilin.

Tial, eĉ hodiaŭ, ne estas malfacile varbi armeojn. En multaj landoj, kompreneble, soldatiĝo dum kelka tempo estas deviga ; sed eĉ armeoj volontulaj facile altiras aventuremajn junulojn. Ni ofte forgesas ke ĉiam novaj generacioj vere malmulte atentas la spertojn de siaj gepatroj, kredante ke tiuj spertoj ne plu validas en tiel malsama hodiaŭo. Ke ili eraras, tion ili vane predikas al la propraj infanoj !

Kaj diversmaniere kaj diversgrade la edukado kontribuas al la militemo de la gejunuloj. Vane protestis angla poeto de la unua mondmilito :

"...se aŭdus vi dumire, kiel sango
el pulmoj koruptitaj ŝaŭmgargaras
obscene, kiel sur senkulpa lango
fiaĉa gusto de kancer' amaras,

vi ne, amiko, kun fervora gest'
al la infanoj, ardaj gloron sori,
mensogus : *Dulce et decorum est*
*pro Patria mori.*"
(Wilfred Owen)

Tiu latinaĵo, de poeto de la Romia Imperio, signifas : «Estas dolĉe kaj konvene morti por la Patrujo» ; kaj bedaŭrinde, sub tiu aŭ alia formo, ĝi estas intruata ĝis hodiaŭ kiel patriotismo, naciismo, ŝovinismo, malamo al aliaj homgrupoj, ĉu naciaj, ĉu religiaj, ĉu rasaj, sed ĉiam politike. Mi aldonu, ke, kvankam mi plene aprobas la koncepton de **eduko por paco**, mi forte dubas pri ties longedaŭra efikeco kontraŭ aliaj formoj de influo, ekzemple la gazetaro kaj aliaj informiloj.

## Armiloj

Kaj fine mi atentigas vin ke dum ekzistas armilfabrikado, armiloj estos uzataj. Kompreneble, kun aŭ sen la uzinoj, tiu, kiu deziras havi armilon, trovos ĝin. El pace uzataj eksplodiloj, ekzemple dinamito por minado aŭ vojkonstruado, oni konstruos bombojn. Fakte neniam estis, aŭ estos, klara diferenco inter laborilo kaj armilo. En la tranĉeoj de la unua mondmilito oni ofte batalis ĝismorte per la fosiloj mem uzitaj por fosi la tranĉeojn : mia patro foje diras al mi amare, ke fosiloj estis pli efikaj mortigiloj ol bajonetoj... Tamen, aldone al tio, ĉiu kiu havas monon hodiaŭ, povas akiri pli aŭ malpli facile la plej kompleksajn, malnaivajn kaj danĝerajn armilojn produktatajn en la uzinoj de la mondo. Kaj armilojn oni pli aŭ malpli frue uzos, se oni posedas ilin. Kaj fermi la armiluzinojn estas tutsimple neeble. Neniu registaro iam ajn rezignos pri siaj armeoj, kaj, sincere, neniu popolo iam ajn postulos tion. Timo ludas tro grandan "olon en la homa konjukturo. La homoj timas sin lasi senprotektaj kontraŭ minacoj realaj aŭ nur supozataj. Malgraŭ heroaj oferoj de kelkaj kuraĝaj individuoj protestintaj kontraŭ krueleco kaj la detruado de senkulpaj vivoj, la instinktoj, kaj iasence la blindeco, de la grandaj homamasoj neniam konsentos rezigni pri perfortado. La paco restos utopia koncepto, al kiu oni genufleksos teorie, sed pri kiu oni praktike ne kredas.

## Evitebla ?

Mi do proponas la tezon ke milito estas neevitebla. Restas tamen la demando, ĉu ĝi estas eĉ evitinda ? Supozeble al tiu demando preskaŭ ĉies senpripensa tuja respondo estas : ho jes, komprenehle. Sed pripensu iom. Pripensu la sekvojn. Se mia tezo pravis, por malebligi militojn oni devus iel forigi el la homoj ties agresemon, ties aventuremon, ties potencavidon. Sed kiam ajn oni ŝanĝas unu faktoron en situacio, oni samtempe ŝanĝas aliajn. Sen agresemo, sen aventuremo, sen potencavido, kia estus nia raso, kaj kio okazus al ĝi ? Ĉu ĝi ne stagnus kaj konsekvence regresus ? Ĉu ĝi ne pli similus ŝafaron ol leonaron ? Ĉar ĝi certe estus pli facile regebla de eventualaj renegatoj, en kiuj restus, neevitehle, la nedezirataj karakterizoj. En tia socio, unu frenezulo povus regi la mondon ! Sen agresemo, kiel progresus la mondo ? Sen aventuremo, kiu volus esplori, trovi novajn fontojn de energio ; sen potenavido, kiu volus evoluigi la novajn trovaĵojn kaj ilin ekspluati ? Ĉu ni ne trovus nin en mondo de uloj burokratecaj, sen la energio necesa por ilin superruzi ?

Vi eble pensas : ne necesas forigi agresemon, ktp., necesas redirekti ilin. Jes, tio estus bela solvo. Ankaŭ nun ne ĉiu agresemo, evidente, celas mison kaj malbonon. Ni provu kaj provu. Sed ĉiam aperos inter ni la frenezuloj kaj la psikopatoj, kies trajtojn oni neniel povas redirekti.


Mi liveris al vi raporton sufiĉe pesimisman. Mi fakte rolis advokaton de l' diablo. Mi klopodis taksi realisme nian situacion. Tamen mi volonte konfesas, ke ne nur realisme ni devas pensi, sed ankaŭ idealisme, ĉar idealismoj kontribuis almenaŭ same multe al la homa progreso kiel realismo, se ne pli. Se daŭra paco vere ne eblas, ĉu tiuokaze valoras labori por ĝi ? Komprenehle jes. Eĉ se io ne komplete atingeblas, tio ne malvalidigas klopodojn al plibonigo de nia socio. Ni rajtas kredi ke militoj estas fiaĵoj kaj ke paco, kondiĉe ke ni uzas ĝin bone, estas baza homa rajto. Neniam mankis inter ni la Kasandroj kaj Jeremia-j, kiuj profetis misfortunon, kaj mi tre dubas, ĉu finfine ili multe kontribuis al la progreso. Ili certe estis tre kontentaj, se ili povis diri poste : «Mi ja avertis vin». Mi neniel volas esti unu el ili. Se erari, mi preferas erari optimisme. Mi preferas kredi kaj esperi, malgraŭ t.n. realismaj konkludoj. Ĉar estas realisme diri ankaŭ : profeti estas

senprofite ; alivorte, neniu povas esti certa pri la estonteco.

William Auld (Britio)
el *Monato*, julio 1989, pp.22-25.

---

William AULD, skoto, magistro pri literaturo, fama Esperantista verkisto (*La infana raso* - 1956), antologiisto (*Esperanta antologio*) kaj lekciisto.



Rita Rössler

# MILITO KAJ PACO SUR LA TERO DE LA FIDOJ

"Kie estas glavo tie ne estas libro kaj
kie estas libro tie ne estas glavo."
Rabeno Eleazar ben Perata[1]

Kiam multaj konfliktoj en la mondo venas al siaj solvoj dum nia "mirinda" nuntempo oni vidas nur progresetojn en la jam pli ol la kvarjardeka konflikto en la Mezoriento[2]. Sed tio certe ne estas la sola ebla legado de la historiaj eventoj. Eble tiun periodon jam inaŭguris la fama vojaĝo de la egipta prezidanto Anwar al-**Sadat** al Jerusalem en novembro 1977. Oni rakontas ke alveninte Jerusalemon oni menciis al Sadat ke en la juda tradicio la plej grandaj herooj ne estas la militaj sed tiuj kiuj antaŭenigas la pacon inter la nacioj[3]. Tiuj vortoj plaĉis al Sadat kiu tuj diris : «Tia heroo mi volas esti !»

Multaj (sed tute ne ĉiuj) konsentas ke la pactraktato kiu estis subskribita en Washington (Camp David) la 26-an de marto 1979 estis la unua paŝo sur la longa kaj malfacila vojo al paco en la Mezoriento kaj ankaŭ al malaltigo de la tensioj en la mondo. Signo pri tia konsento estas interalie la Nobel-premio pri Paco kiun Sadat kaj Menaĥem **Begin** kune ricevis.

En ĉi tiu eseo mi volus ĉefe trakti la rilatojn al milito kaj paco en judismo kaj islamo kaj ankaŭ provi spuri la radikojn de la konflikto kaj ankaŭ montri kelkajn solvojn kiuj tamen ne sukcesis enradikiĝi. Certe kristanismo ankaŭ apartenas al la Tero de la Fidoj sed ĉar "politike" ĝi

---

**MILITO, PACO, JUDISMA VIDPUNKTO, ISLAMA VIDPUNKTO, ISRAELA-ARABA KONFLIKTO, CIONISMO** • GUERRE, PAIX, POINT DE VUE ISRAELITE, POINT DE VUE ISLAMIQUE, CONFLIT ISRAELO-ARABE, SIONISME • WAR, PEACE, JEWISH POINT OF VIEW, ISLAMIC POINT OF VIEW, ISRAELI-ARAB CONFLICT, ZIONISM • KRIEG, FRIEDE, JUDISCHER GESICHTSPUNKT, ISLAMISCHER GESICHTSPUNKT, ISRAELISCH-ARABISCHER KONFLIKT, ZIONISMUS • GUERRA, PAZ, PUNTO DE VISTA JUDAICO, PUNTO DE VISTA ISLáMICO, CONFLICTO ISRAELI-áRABE, SIONISMO • GUERRA, PACE, PUNTO DI VISTA GIUDAICO, PUNTO DI VISTA ISLAMICO, CONFLITTO ISRAELO-ARABO, SIONISMO.

ne ludas ĉefrolon en la konflikto (se oni ne volas studi la kristanan aprobon kaj subtenon por Israelo fare de la fundamentismo usona ktp., sed tio estus transiri la limojn de ĉi tiu eseo), kaj ankaŭ pro tio ke la plimulto de eseoj en ĉi tiu kajero traktas kristanismon, mi flankenlasas ĝin.

## Ĉe judismo

Same kiel judismo ne estas vegetara sed permesas la manĝadon de viando kondiĉe ke la brutoj estu buĉitaj laŭ rigora juda ritualo kaj ke la viando poste estu traktita laŭ diversaj leĝoj (ĝis la sango estos forviŝita kaj elsorbita)[4], ĝi ne estas pacifisma kaj malpermesas militojn sed tamen havas multajn specialajn kondiĉojn por permesi kaj konduki militadon. Ni studu iomete tiujn kondiĉojn por perforto kaj milito, komencante ĉe la individua nivelo.

Oni instruas en judismo ke estas tri aferoj pri kiuj estas pli bone mem morti ol malobei, nome fremda Diservo, incesto kaj murdo. Se iu homo estas ordonita murdi alian (senkulpan) homon, tiam estas pli bone mem morti ol fari tion, aŭ laŭ la lingvo de la Talmudo : «Kiu scias kies sango estas la plej ruĝa»[5]. Sed kiam temas ne pri senkulpa homo, sed pri atakanto (*rodef*) oni devas savi sian propran vivon kaj eĉ la vivon de tria atakita persono, ankaŭ se oni devas murdi la atakanton pro tio. Tiu rajto tamen havas la kvalifikon, ke oni povus halti la atakanton nur kripligante lin (en la piedoj aŭ alie), oni devas fari tion, kaj uzante tro severan kontraŭmezuron oni estos respondeca pri lia morto.

Alia okazo kiam perforto kontraŭ homo estas permesata estas por gardi kontraŭ la malicoj de informantoj kaj perfiduloj interne de la juda socio, kiuj endanĝerigos la tutan komunumon. Sed ankaŭ ĉi tie la celo estas nur malebligi kaj ne puni, kaj se aliaj mezuroj estus sufiĉaj, oni ne rajtas ekzekuti la kulpulon.

Tria okazo de permesata perforto estas por savi kaptitojn ĉar ili estas konsiderataj kiel homoj en morta danĝero.

Uzi perforton por defendi propraĵon estas permesita nur kiam la vivo ankaŭ estas en danĝero, kaj same por defendi religiajn konvinkojn oni estas permesata nur pri tre milda formo de perforto[6].

Ekzistas diversaj leĝoj, kiel la popolo povas kontraŭstari maljustan reganton sed ili ne inkluzivas la uzon de perforto. Unu tia mezuro estas la leĝo, ke kiam la popolo rifuzas (malobeante) unu leĝon faritan de la *Sanhedrin* ĝi estas aŭtomate **malvalida** (tiu leĝo estas tre grava demokrata leĝo en judismo). Ankaŭ la unuopulo rajtas malobei ĉiun maljustan aŭ kontraŭleĝan ordonon senpune, se la *Sanhedrin* post la faro decidas ke la ordono vere estis maljusta kaj fuŝa. Oni ankaŭ havas la rajton voĉigi kontraŭan opinion ol la *Sanhedrin* sur la stratoj se oni pensas ke ĝi eraris en iu decido. Same striko estas permesata kaj kune kun kelkaj aliaj leĝoj kontraŭ premado fare de la riĉuloj ili garde protektas la ekonomie malfortajn en la socio. Tamen vivante inter aliaj popoloj en fremdaj landoj la judoj havas tre malmultajn eblecojn (rajtojn laŭ la Torao) por protesti aŭ revolti[7].

## La militoj

Kiam temas pri militoj inter nacioj la Torao kaj la rabenoj (t.e. la t.n. **buŝa** torao) provizas nin kun longa listo de leĝoj kaj kvalifikoj de preskaŭ "utopia"[8] karaktero. La plej ĉefa nocio estas la divido inter "ordonita milito" *(milĥemet micva)* kaj "libervola milito" *(milĥemet reŝut)*. Al la unua kategorio apartenas nur kelkaj tre specialaj militoj, nome la milito kontraŭ la sep popoloj de Kanaan por konkeri la landon dum la tempo de Josuo, la eterna milito kontraŭ la ĉefa malamiko Amalek (popolo kiu jam delonge ĉesis ekzisti), civila milito kontraŭ idoladoranta izraela komunumo aŭ urbo kaj fine, defenda milito por savi la vivon se fremda ŝtato atakas la popolon.

La sep popoloj de Kanaan kaj la amalekidoj estis gravaj pekuloj kaj pro tio malhavis la rajton travivi. Sed malgraŭ tio ili povis savi siajn vivojn se ili nur akceptus "la sep bazajn leĝojn de Noa" kiuj estas devigaj al la tuta homaro[9]. Oni vidas ke la diversaj popoloj kiuj loĝis en Kanaan havis diversajn sortojn laŭ siaj rilatoj kun la izraelaj triboj. La girgaŝidoj ekzemple elektis forlasi la landon kaj faris tion en paco. La gibeonidoj akceptis la postulojn de la izraelanoj kaj travivis.

Milito kontraŭ idoladoranta izraela komunumo aŭ urbo neniam okazis kaj la rabenoj eĉ opinias ke tiu devo estas entute teoria kaj neniam okazos.

Kiam la popolo kaj lando estas atakita oni devas defendi sin sed ne ĉiam tio estis la plej saĝa agadmaniero kaj la fina decido restas ĉe la profetoj kaj rabenoj kiuj interpretas la volon de Dio.

La dua kategorio, kiu inkluzivas ĉiujn ceterajn militojn, estas ankaŭ tre limigita. Oni rajtas komenci "libervolan" militon nur post kiam la *Sanhedrin* kun siaj 71 membroj, la reĝo de Izrael kaj la Ĉefpastro per la orakloj *Urim* kaj *Tummim* aprobis ĝin[10]. Kaj tia milito ne povas esti tute arbitra sed farita nur por gardi Izraelon kaj por sanktigi la nomon de Dio, t.e. enkonduki la sep bazajn leĝojn de Noa[11] ĉe iu barbara, malamika kaj idoladoranta popolo. Kaj eĉ se ĉiuj tiuj kondiĉoj estas plenumitaj, ŝajnas ke la "libervola" milito tamen estis limigita per la "idealaj limoj" de la Sankta Lando[12].

Komparante kun la nuntempo oni povas konstati ke malmultaj religioj en la mondo ankoraŭ apartenas al la kategorio kiu "malakceptis la sep bazajn leĝojn de Noa" (certe nek kristanismo, nek islamo).

Reĝo ne ekzistas en Israelo kaj ankaŭ ne *Sanhedrin*, kaj ĉefpastro same kiel *Urim* kaj *Tummim* mankas. Pro tiuj eksteraj kaj internaj kaŭzoj estas preskaŭ neeble por judoj fari militon se oni volas rigore sekvi la Toraon kaj la rabenan tradicion[13]. Oni povas ankaŭ konstati ke en la *Aggada* (rakontoj en la Talmudo) Dio ĵurigis Izraelon ke ili ne konkeru la Landon perforte[14]. Interese estas ankaŭ noti ke kvankam la unua okupado de la lando Izraelo, kiu okazis dum la tempo de Josuo, rezultis en la plej alta "sankteco" *(keduŝa)*, tiu sankteco estis tuj forviŝita post la malvenko al Babilono, ĉar ĝi estis origine atingita per perforto. La dua okupado dum la tempo de Ezra kaj Neĥemja havis iomete malpli altan "sanktecon" sed pro ĝia paca karaktero ĝi fariĝis multe pli longdaŭra kaj ĝi neniam forviŝiĝos (tiu estas la sankteco kiu restas ankoraŭ hodiaŭ).

## Ĉe islamo

Komparante kun islamo oni vidas ke ankaŭ ĝi havas la nocion de "ordonita (t.e. deviga) milito", la t.n. *ĝihad*, kaj la Korano diras rekte ke «Dio preferas la luktantojn antaŭ la neluktantoj»[15]. Milito estas priskribita kontraŭ la nekredantoj kaj politeistoj, kaj ĉiuj kiuj luktas "en la vojo de Dio" ricevos bonan rekompencon en la paradizo. Ofte tamen temas ĉefe pri lukto nur kontraŭ tiuj kiuj reciproke malamikas kaj se la

malamikoj ĉesos militi ankaŭ la islamanoj devas sekvi kaj ĉesi[16]. Malamikeco devas esti nur laŭ la mezuro de la reciproka malamikeco[17]. La islama leĝo ankaŭ permesas lukti kontraŭ la "popoloj de la libro", t.e. kristanoj kaj judoj kiam tiuj "ne praktikas la veran religion"[18].

Islamo diferencigas origine inter du mondoj, *Dar al-Islam* kie regas ordo kaj paco kaj kie la popoloj kredas nur al unu Dio, kaj *Dar al-Ĥarb* kie malordo kaj malpaco regas. La kalifo estis ordonita laŭpove provi grandigi *Dar al-Islam* per la sankta milito nomita *Ĝihad*[19] (Laŭ unu aspekto *ĝihad* similas la "ordonitan militon" en la juda tradicio ĉar temas pri pozitiva ordono, sed laŭ alia aspekto ĝi pli similas la "libervolan militon" ĉar temas pri elradikigo de politeismo kaj la enkonduko de "kredo je unu sola Dio").

En praktiko tiu divido de la mondo daŭris nur dum la unuaj jarcentoj de la islama ekspansio. Poste oni enkondukis trian nocion nome *Dar al-Sulĥ*, t.e. la mondo de la (pac-)traktatoj[20], kie la rilatoj kun aliaj popoloj kaj ŝtatoj estis regataj per tempaj traktatoj kaj kelkfoje ankaŭ per pagado de iu "simbola" tributo.

## Paco

Tiel multe pri la rilato al perforto kaj milito en la du religioj. Se ni rigardas la alian flankon de la monero nome la celadon al paco en la du tradicioj ni havos alian bildon. Oni povas konstati en judismo ke la ordono "celu al paco" kaj "iru kaj serĉu la pacon" estas la sola pozitiva ordono *(micva)* pri kiu estas dirita ke oni devas **aktive** celi por ĝi kaj eĉ iri kaj serĉi ĝin[21].

Jam en la Torao estas menciita ke paco estas la esenca idealo kaj celo por la socio. Tamen tiu paco ne povas alveni se ne justa organizado de la socio estas establita[22]. La Torao antaŭvidas la tempon kiam la paco ragos kaj la nacioj ĉesos deziri konkeri la landon[23].

La profetoj profundiĝis sur tiu tempo kaj faris el universala paco la ĉefa trajto de la mesia erao. Tiu erao estos atingita kiam la Unua kaj Sola Dio estos rekonita de la tuta homaro, Izrael estos reveninta al sia hejmolando kaj la monto de Dio estos firme establita[24].

La rabenoj daŭrigis en tiu tradicio glorigante la pacon kaj kantante ĝian laŭdon. La tuta Torao, ili diris, estis donita nur por antaŭenigi la pacon[25]. Paco estas la supera idealo kaj unu el la tri bazoj de la mondo[26]. Ili ankaŭ konsideris la neceson de pli egaleca sistemo de distribuado de la riĉaĵoj de la mondo kaj tio kontribuos al la ĉesado de la militoj inter la nacioj[27]. Kiel la profetoj ankaŭ la rabenoj revis pri la tago kiam la Sabato de la futuro estos inaŭgurita[28] kaj kiam la 70 nacioj de la mondo fariĝos unu sola nacio[29].

La studado de la Torao fariĝis la ĉefa instrumento por atingi pacon en la mondo. «Kiu studas la Toraon por la ĉielo antaŭenigas pacon en la ĉiela domo supre kaj en la tera domo sube»[30].

Unuavide islamo ne ŝajnas esti religio sopirante al paco, kaj la Sankta Milito, *ĝihad*, okupas gravan lokon en ĝia tradicio. Tamen oni devas kompreni la evoluon de tiu sinteno dum la malfacila lukto de la profeto Muhammad kontraŭ la malamikaj triboj en Mekka kaj en la ĉirkaŭaĵo[31]. Dum la tempo en Mekka, Muhammad unue priskribis paciencon kaj fleksecon kiel la plej gravaj virtoj, sed post la fuĝo al Medina (antaŭe nomita Jatrib) la devo rebati atakojn fariĝis sankta priskribo. En la Korano estas emfazita ke danĝeruloj kaj senkreduloj estas tiuj kiujn oni precipe devas venki.

## *Dar al-Salaam*

Paco tamen estas idealo en Israelo kaj krom la antaŭe menciitaj *Dar al-Ĥarb*, *Dar al-Sulĥ* kaj *Dar al-Islam* ekzistas ankaŭ *Dar al-Salam*, la teritorio aŭ loĝejo de la paco. Temas pri la ĉiela domo ankaŭ nomita la paradizo kaj tiu nocio estas unu el la ĉefaj instruoj de islamo. Oni rakontas en la Korano ke kiam la fideluloj alvenos paradizen

> «Ili ne aŭdos vanan parolon kaj ne instigojn al pekoj, sed unu solan parolon : "Paco... Paco..."[32].»

Aliaj suraoj rakontas kiel la kredantoj eniras paradizon en paco kaj sekureco[33].

Unu el la plej fruaj suraoj estas la fama surao 97, "la nokto de la dekreto", kiu temas pri la nokto kiam la sorto de la mondo estos decidita kaj la anĝeloj malsupreniros por reguligi kaj ordigi ĉiujn aferojn sur la tero. Pri tiu nokto estas dirite : «Ĝi estas Paco ĝis la aŭroro de la

mateniĝo»[34]. Aliloke en la Korano paco *(Salam)* estas unu el la nomoj de Dio[35].

Kiam Muhammad sin turnas al la "popoloj de la libro" (t.e. judoj kaj kristanoj) li enkondukas la nocion "vojoj de paco"[36] : «Dio gvidas tiel sur la vojoj de Paco tiuj kiuj provas plaĉi al Li.»[37]

Islamanoj ankaŭ fieras pri sia salutvorto «*salam alejkum*» (paco al vi), kiu eble estis enkondukita de la profeto mem aŭ almenaŭ popularigita de li (tiu salutvorto tamen ekzistas ankaŭ ĉe judoj jam de foraj tempoj kaj en la hebrea kaj en la aramea lingvoj). Pacamanta islama sekto en Bharato nomita Ahmadija (fondita de Mirza Ghulam Ahmad) uzas la tiel nomatajn sep pacsalutojn de la Korano por akceli pacon : Pacon diras Dio, Pacon al Noa, Pacon al Abraham, Pacon al Moseo kaj Aaron, Pacon al Eliahu, Pacon al vi, (la nokto de la dekretoj) estas paco[38].

Evidentas ke la nocioj de milito kaj apco ekzistas en ambaŭ religioj. Sed kial evoluis la nuntempa konflikto en militan lukton inter judoj kaj araboj pri la rajto al la lando de la fidoj ? Por bone kompreni tion oni devas apartigi inter la diversajn nivelojn de la konflikto. Esence oni povas paroli pri tri diversaj niveloj : la religia, la politika kaj la humaneca nivelo[39].

## Judoj kaj araboj

La religia konflikto inter judoj kaj araboj estas parto de reciprokaj rilatoj kiuj ekzistas ekde la apero de nova religio per la profeto Muhammad en la arabia duoninsulo. Tiom oni povas nomi la konflikto inter judismo kaj islamo. Kvankam kutime regis bonaj rilatoj inter la du religioj, kaj judoj ofte trovis rifuĝejon en islamaj landoj kie ili havis ian aŭtonomecon por evoluigi sian propran kulturon, ekzistis ankaŭ streĉoj kaj tensioj kaj kelkfoje (sed malofte) ankaŭ persekutoj. En la juda tradicio la ĉefa malamiko al Jakobo t.e. Izraelo estis Esav ankaŭ nomita Edom, kiu estis identigita kun la Romia imperio kaj poste kun la kristana mondo. Kontraŭe la iŝmaelidoj, t.e. la araboj kaj poste la islamanoj estis konsiderataj kiel fratoj, erarantaj kaj iomete furiozaj sed ne speciale malamikaj. La Dio pri kiu instruis kaj ankaŭ je kies nomo profetis Muhammad estis la Dio de Abraham, la prapatro de la du popoloj, la juda per la filo Jicĥak (Isaak), kaj la araba per la filo Iŝmael.

Ambaŭ popoloj kaj religioj agnoskas tiun fundan parencecon kvankam oni disputas pri kiu estis la plej grava inter la du duonfratoj[40]. Muhammad preĝis al unusola Dio, al kiu preĝis ankaŭ la judoj kaj la kristanoj, kaj komence li opiniis sin esti profeto por ĉiuj popoloj, elektante Jerusalemon kiel la plej sanktan urbon al kiu la "kredantoj" turnu sin dum la kvin ĉiutagaj preĝoj. Nur post kiam la judoj en Medina malagnoskis lian "profetecon" kaj eĉ interrilatis kun rivalaj triboj en Mekka, li difinis islamon kiel "araban" religion kaj Jerusalem fariĝis nur la tria en sankteco post Mekka kaj Medina[41]. Tiu nova religio tamen agnoskis la profetojn Moseo kaj Jesuo kaj same la sanktecon de la Torao kaj de la Evangelioj. La juda popolo kune kun la kristanoj fariĝis protektataj popoloj *(dhimmis)* interne de islamo, kaj tio signifis reciprokan rilaton de devoj kaj rajtoj sed tamen implikante ian malpli altan gradon de civitaneco. La *dhimmis* devis pagi individuan imposton *(jizia)* kaj rekompence ili estis protektataj kontraŭ eksteraj kaj internaj danĝeroj kaj malamikoj. Sed oni tamen konstatas ke judoj ofte militis kune kun la araboj, ekzemple dum la konkerado de Jerusalem fare de Kalifo Omar, kaj kiel danko ili estis permesitaj reveni al la Sankta Urbo[42].

Alia nivelo de konflikto estas la politika inter la cionistoj kaj la novaj sendependaj arabaj ŝtatoj en Mezoriento. Araboj konsistigas nur 20 %-n de ĉiuj islamanoj kaj la grupo de ŝtatoj kiuj aktive luktis kontraŭ la israela ŝtato estis nur duono de tiuj araboj. Post la pactraktakto kun Egiptio restas nur 5 % de aktive militantaj islamanoj dume minacantaj la judan ŝtaton (Irano ne estas inkludita en tiu kalkulo).

La komenco de tiu konflikto devenas de la tempo de **Herzl**, sed ĝi restis malgrava afero dum la tuta tempo de la otomana regado de Palestino. Nur kiam en 1922 la Ligo de Nacioj decidis doni la mandaton de Palestino al Britio por la eksplicita celo establi tie judan "hejmolandon"[43] (tio estis kvin jaroj post la Deklaracio de Balfour) la situacio akriĝis. Dum la tuta antaŭa epoko de cionismo la ĉefa metodo ĉiam estis aĉetado de tero kaj paca koloniado. Pro la brita milita regado kreskis tensioj inter la loĝantaroj kaj ankaŭ inter ili kaj la britoj, kaj kelkfoje eruptis perfortaj konfliktoj kaj revoltoj. Regulaj militoj komencis nur post la deklaracio de sendependeco de la israela ŝtato la 15-an de majo 1948[44]. Israel devis defendi tion, kion ĝi jam atingis per paca vojo de aĉetado kaj koloniado kaj tial la milito fariĝis "deva" laŭ la senco de la Torao.

Sed postaj militoj certe havis pli da libervola aspekto, kaj tiel estis esence kontraŭaj al la spirito de la Torao. Oni povas rimarki ke ankaŭ ĉe la araboj oni ne nomis la militojn *ĝihad* ĉar Palestino ne apartenas al *Dar al-Ĥarb* en vera senco (islamaj leĝoj ankoraŭ funkcias por islamanoj en Israelo). Kreiĝis konflikto inter modernaj nacioj kaj novaj sendependaj ŝtatoj kiu havis pli politikan ol religian karakteron.

## La palestinanoj

Tria nivelo de la konflikto estas inter la israelanoj kaj la palestinanoj kaj eĉ iasence inter judoj kaj araboj en Israelo mem. Temas pri civitanaj rajtoj kaj humanecaj konfliktoj. Grava estas la fakto ke la palestinanoj mem preskaŭ entute ne partoprenis en la diversaj militoj inter la modernaj nacioj. Estis la najbaraj ŝtatoj kiuj atakis per regulaj armeoj. Post kiam P.L.O. (Palestina Liberig-Organizo) estis fondita en Jerusalem en 1964 ili komencis partopreni en diversaj kontraŭisraelaj agresoj sed neniam rekte militis (escepte eble dum la milito en Libano). Nur dum la lastaj du jaroj per la tiel nomata *intifada* (laŭvorte "traskuado") la palestinanoj komencis mem preni sian sorton en la propraj manoj kaj sukcesis aŭdigi sian voĉon.

Kvankam multaj provoj estas faritaj por trovi solvon kiel dividi la landon inter judoj kaj araboj, la tasko estas malfacila ĉar la loĝantaroj estas miksitaj en multaj regionoj. Jerusalem, Ĥejfa, Akko kaj nombro da aliaj urboj estas dupopolaj kaj en aliaj lokoj ekzistas araba kaj juda urboj tuj apude kiel ekzemple Nazaret Elit apud Nazaret kaj Kiriat Arba apud Ĥevron. Kiam la lando estis dividita laŭ la limo de 1948, la judoj fariĝis preskaŭ sole regantaj sur la israela flanko de la limo kaj la araboj tie povis partopreni nur en malpli gravaj taskoj de la socio. Same sur la palestina flanko de la limo judoj estis ekzilitaj kaj ili ne rajtis viziti la tombejon de Abraham en Ĥevron aŭ la okcidenta muro de la Templo en la malnova urbo de Jerusalem, kvankam laŭ la ĉesmilita traktato ili havus tiun rajton. Dum la sestaga milito en 1967 la israela regado estis etendita ankaŭ al la antaŭaj palestinaj-jordaniaj teritorioj Jud-Samario kaj Gaza. Enkondukante tie militan regadon uzante la "antikvajn" britajn leĝojn kaj regularon deveninta de la tempo de la mandato, la subpremado kaj rompoj de bazaj homaj rajtoj fariĝis ĉiam pli oftaj ; normala afero de la vivo tie. Tio fakte daŭris ĝis spontane eksplodis la *intifada* kiu estas aŭtentika popola protesto kontraŭ multjara misregado

kaj arbitreco de la "militaj" regantoj.

Ĉi tie mi ne volas diskuti eblajn estontajn solvojn de la konflikto sed nur mencii kelkajn voĉojn de la pasinteco kaj eĉ iamajn solvojn de la konflikto, kiuj por iu aŭ alia kialo ne sukcesis enradikiĝi. La historio de la konflikto jam estas longa kaj komplika kaj ekzistas same multe (aŭ eble eĉ pli) da "militarduloj" kiel da "packonstruantoj". Mi nur mencios kelkajn el ĉi lastaj, kiuj, kvankam jam apartenantaj al la historio, instruas nin pri la hodiaŭa situacio.

**Cionismoj**

*La* politika cionismo, t.e. la provo ricevi ŝtatan permeson por la cionista entrepreno por tiel en ordigita maniero povu reloĝigi la landon Palestinon per revenintaj judoj, naskiĝis per Teodor **Herzl**. Fariĝinte la gvidanto de la cionista movado li turnis sin al diversaj regnestroj, kaj plej grave al la tiama reganto de Palestino, la turka sultano Abdul Hamid II, kun la propono ke la tuta judaro helpu ordigi la malbonajn financojn de la otomana imperio kontraŭ la permeso de juda enmigrado al Palestino kaj fondado de nova juda ŝtato[45]. Herzl fine estis akceptita nur de pli malalta ministro kaj la sultano neniam akceptis pli ol disa juda migrado al la otomana imperio sed ne pri koncentriĝo en iu speciala regiono. La plej bona politika solvo kiun Herzl fine povis oferi al siaj adeptoj estis la uganda plano de Chamberlain, kiu fine fiaskis post grava krizo en la cionista movado.

Rimarkinde estas ke en sia programlibro *Der Judenstaat* (La juda ŝtato) Herzl forgesas mencii la arabojn kaj la eventualajn problemojn, kiuj povus ekesti en la rilatoj kun ili[46]. Dum longa tempo la slogano de la cionistoj fakte estis : «Donu al la popolo sen lando la landon sen popolo»[47]. Post sia vizito al Palestino Herzl komencis mencii la aliajn enloĝantojn en siaj libroj ĉiam substrekante, ke la paca kunvivado venkos (malgraŭ ke la atencoj estos farita kontraŭ ĝi). Karakterize por la optimismo de Herzl estas la devizo kiun li elektis por la gvidantoj de la nova ŝtato en la libro *Altneuland* (Malnova nova lando) «Nia devizo devas nun kaj ĉiam aŭdiĝi : Homo, vi estas mia frato»[48].

Alia tipo de cionismo kreskis ĉirkaŭ grupoj de *Ĥibat Cion* (Amantoj de Ciono). Ili pli akcentis la neceson de revivigo de la "juda spirito" kaj

subtenis plenkore la iom-post-iom-an revenon al la "hejmolando". Baldaŭ ili fariĝis opozicio kontraŭ Herzl, sed post la fiasko de la uganda plano kaj la morto de Herzl, ili fariĝis pli potencaj kaj fine troviĝis inter la gvidantoj de la cionista movado.

Konata pacifisto inter la cionistoj estis Aaron David **Gordon**. Li venis al Palestino en 1904 kaj komencis prediki religie influitan socialismon pri la esenca valoro de laboro. Tre influita de la pensadoj de Tolstoj, la kultivado de bonaj rilatoj kun la araboj estis unu el liaj ĉefaj temoj.

Ankaŭ rabeno Aaron Samuel **Tamaret** estis inter la fruaj cionistoj sed poste li rompis kun la movado pro ties troa "naciismo" kaj publikigis en 1905 la libron *Judismo kaj libereco*, en kiu li akre atakis la naciisman ideon kiel novan idoladoradon. En siaj sekvaj skribaĵoj li per elokventa stilo klarigis sen-perforton kaj pacifismon el judisma perspektivo.

Pli konata persono aktiva dum la frua cionismo estis Martin **Buber**. Ankaŭ li dediĉis sian tutan vivon al humaneca idealo kaj enkondukis post la unua mondmilito la novan terminon "hebrea humanismo"[49]. Ĉiam Buber insistis ke la judoj en Palestino vivu **kun** la araboj kaj ne nur **apud** ili. Pro tio ke la diversaj pretendoj al la lando estis tiel aliaspektaj kaj tute malsamaj, ne ekzistis alia vojo ol konstrui Cionon per justeco *(miŝpat)* kaj li emfazis ke nenia "senbezona" maljusteco estu farita ĉar neniam la rimedoj povus esti pravigitaj per la celo. Kontraŭe ili estas interrilataj kaj la celo atingota dependas de la rimedoj uzitaj. Paco estis por Buber la plej supera idealo inter ĉiuj kaj ricevante pac-premion en Germanio, li parolis pri la potenco de la paco :

> «Popoloj devas paroli unu kun la alia per iliaj veraj humanistoj por ke la granda paco foje povu realiĝi kaj la detruita vivo povu renoviĝi sur la tero. Tiu granda paco estas io tute alia ol la manko de milito... Tiu paco signifus... ke io nova ekzistas, jes vere iu pli granda kaj pli potenca eĉ ol milito ekzistas. La homaj pasioj arde fluas en la militon kiel la riveroj en la lagon, kaj la milito laŭplaĉe disponas pri ili. Sed tiuj pasioj devas eniri en la grandan pacon kiel oro en la fajro kiu fandas kaj transformas ĝin. Tiam popoloj kune konstruos kun eĉ pli potenca ardo ol ili iam detruis unu la alian.»[50]

Eĉ Ĥaim **Weizmann** *(Ĥajim vajcman)* kiu fine fariĝis la unua prezidanto de Israelo apartenis al la opozicio kontraŭ Herzl. Dum multaj jaroj li aktivis en kaj post la unua mondmilito, ankaŭ gvidis la cionistan movadon (ne ĉiam formale sed tamen reale) kaj dum diversaj konferencoj, kie la cionistoj kaj arabaj naciistoj renkontis, li ĉeestis kiel la cionista reprezentanto. Ĉiam li rakontis pri agrabla kunestado kun la araboj dum tiuj renkontoj. En 1918 li vizitis Palestinon kun cionista delegacio kaj tiam ankaŭ renkontiĝis kun Emir **Fajsal** en (la hodiaŭa) Jordanio. Ili sukcesis veni al funda interkompreno kaj konsento pri la reciprokaj celadoj kaj la emiro eĉ faris skribitajn promesojn al Weizmann. Sed tiuj proponoj kaj decidoj baldaŭ fariĝis neefektiveblaj ĉar la grandpotencoj jam estis decidintaj per sekreta traktato, la t.n. Sykes-Picot-traktato inter Britio, Francio, Rusio kaj Italio, pri divido de Mezoriento inter si en zonoj de interesoj, io kio tute kontraŭis la promesojn de Britio al la araboj kaj cionistoj.

En sia biografio Weizmann poste skribis pri siaj impresoj dum la pariza (Paris) pac-konferenco en 1919 :

> «Mi pensas ke la fina identeco de la arabaj kaj judaj interesoj estas funda realeco.»[51]

Kion Emir Fajsal siaflanke opiniis ni povas vidi el letero kiun li skribis al Felix Frankfurter la 3-an de marto 1919 :

> «Ni sentas ke la araboj kaj judoj estas kuzoj per la raso, suferantaj similajn subpremojn en la manoj de pli grandaj potencoj ol ni mem... Ni araboj, speciale la edukitaj inter ni, vidas kun granda simpatio la cionistan movadon... Ni laboras ambaŭ por reformita kaj revivigita Mezoriento kaj niaj du movadoj kompletigas unu la alian... estas sufiĉe da loko en Sirio por ni ambaŭ. Vere mi pensas ke por neniu povas esti grava sukceso sen la alia.»[52]

Tio estas nur ekzemplo de la kompreno kiu tamen ekzistis kaj ekzistas inter judoj kaj araboj. La ekzemploj povas esti multobligitaj sed tamen la perfortaj erupcioj estas tio, kio plej tiras la atenton. David **Ben-Gurion**, kiu prenis la povon (iomete en konflikto kun Weizmann) alte estimis la "kuraĝon" en la praktika politiko, kaj kvankam li havis kelkajn trajtojn de "paculo", li enmetis ĉiujn siajn talentojn por rapide konstrui novan modernan armeon. Baldaŭ Israelo fariĝis preskaŭ same agresema kiel siaj arabaj najbaroj.

Priskribante la historion, tiu eseo fariĝos multe tro longa kaj mi nur volas fini per unu citaĵo de Weizmann, kiu bone reeĥas la humanecan dimension de la problemo :

> «Mi estas certa, ke la mondo juĝos[53] la judan ŝtaton per tio, kion ĝi faros kun la araboj, same kiel la tuta juda popolo estos juĝita per tio, kion ni faras aŭ ne faras en ĉi tiu ŝtato, kiam al ni estis donita tiel mirinda ebleco post miloj da jaroj da vagado kaj suferado.»[54]

Jeremi Gishron, Israelo

---

notoj

1. TB *Avoda Zara* 17 b.

2. La longeco de la konflikto povas esti alie kalkulita depende de tio, kion oni opinias esti ĝia esenco. La movado de Herzl komencis antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj kaj la religio de Muhammad antaŭ ĉirkaŭ 1300 jaroj.

3. Mekhilta Eliro 20:22, Sifra Levidoj 20:15.

4. Judismo havas nur unu "ordonon" *(micva)*, ke oni **devas** manĝi viandon, kaj tio estas la Pasko-ofero dum Pasko *(pesaĥ)*. Ĉar oni ĉesis fari tiun oferon post la detruo de la dua templo, ortodoksa judo povas esti senprobleme vegeterano. Minoritata opinio inter la rabenoj (kaj iasence ankaŭ Ranbam) opinias ke tio estas la plej pura formo de judismo, kaj ke la permeso manĝi viandon venis nur pro la popola malkontento. Ankaŭ rimarkinda estas ke laŭ la *halakha* oni ne diras la kutiman benon pri nova vestaĵo se ĝi estas farita el pelto aŭ ledo.

5. TB Sanhedrin 74 a.

6. La plej fama escepto estas Pinĥas, la nepo de Aaron, kiu fervoris por Dio kaj mortigis du pekantojn. Rabeno Naftali Zevi Judah Berlin klarigis, ke Dio donis al li la "traktaton de paco" por trankviligi lin. Oni povas noti, ke en la toraa rulaĵo, **ŝalom** en ĉi tiu loko ĉiam estas skribita kun rompita litero *vav* por montri, ke ne temas pri regula kaj kompleta paco.

7. **Ne ĉiuj konsentas,** ke tia estas la vera judismo, sed nur pro eksteraj kialoj kaj cirkonstancoj ĝi evoluis en tiu direkto, kaj ke tiu mensostato de la dissemiĝo *(diaspora)* devas esti forĵetita (ekzemple Albert Menni).

8. Tiel estis nomitaj la militaj leĝoj de Readmono fare de George F. Moore. Vidu : **Moor** (G.F.). - *History of religions.* - New York : C. Scribner's Sons, 1932., vol. 2, p. 24.

9. **Rambam**, Jad ha-Ĥazaka, Melaĥim 6:5, **Rambam** : Readmono 20:10. Pri la amalekidoj vidu : TJ Shevi'it 6:1, Vajikra Rabba 17:16.

10. Ne ĉiuj konsentas ke Urim kaj Tummim estas necesaj.

11. *Ankaŭ* en la Korano Noa estas simbolo de pacema homo.

> «Aĥ Noa, malsupreniru kun la paco kiun ni donos al vi kaj kun la benoj por vi kaj por la komunumoj de tiuj kiuj estas kun vi.» (surao 11:48)

12. Tio estas la limoj menciitaj en la unua interligo inter Abraham kaj Dio :

> «En tiu tago la Eternulo faris interligon kun Abram, dirante : Al via idaro Mi donos ĉi tiun landon, de la rivero de Egiptujo ĝis la granda rivero, la rivero Eŭfrato.» (Genezo 15:18)

13. **Zevin** (Solomon Joseph). - *Le-or ha-Halakhah.* - 1946., p. 17.

14. TB Ketubin 111a.

15. Surao 4:95-96.

16. Surao 2:190.

17. Surao 2:194.

18. Surao 9:29. Kvankam islamo agnoskas la revelacion de Moseo kaj Jesuo, ĝi tamen opinias, ke la sekvantoj de tiuj religioj fuŝis la originajn tekstojn kaj ke la plimulto de ili ne plu iras sur la vera vojo de Dio.

19. Vidu en surao 2:216 :

«La milito estas ordonita por vi kvankam vi malŝatas ĝin. Tre povas esti ke vi malŝatas ion, kio tamen estas por via bono.»

kaj ankaŭ (surao 2:244) :

«Luktu sur la vojo de Dio. Sciu ke Dio ĉion ampleksas.»

20. Jam en la Korano estas menciita ke traktatoj estas ebla solvo. Vidu surao 6:90-91 kaj surao 9:7. Ne ĉiuj islamanoj akceptas tamen la nocion *Dar al-Sulĥ*.

21. Midraŝ, Bemidbar Rabbah, seder Ĥukkat 19:27.

22. Vidu Lev 26:6 kaj komparu Nom 6:26.

23. Eliro 34:24.

24. Vidu Jes 2:2-3 ; 11:1-9 ; 40:1-5 ; 64:25 ; Miĥa 4:1-5 ; Hoŝ 2:20 kaj Jeĥ 34:25 ; 37:26.

25. TB Gittin 59 b.

26. Miŝna, Nezikim, Avot 1:18. Komparu Zeĥ 8:16.

28. TB Baba Mecia 59 a.

29. Tanĥuma, Noaĥ 19.

30. TB Sanhedrin 99 b.

31. **Anreae** (T.), **Widengren** (G.). - *Muhammad - hans liv och hans tro.* - Stockholm : Natur och Kultur, 1967. - p. 163.

32. Surao 56:26.

33. Surao 15:46 kaj surao 50:34.

34. Surao 97:5.

35. Surao 59:23.

36. Komparu Sentencoj 3:17 "... Ĉiuj ĝiaj vojetoj estas paco" kaj ankaŭ Jesaja 59:8 : "Vojon de paco ili ne konas... "

37. Surao 5:16.

38. Suraoj 36:50 ; 37:79 ; 37:109 ; 37:120 ; 37:130 ; 39:73 kaj 97:5.

39. Nature oni povas ankaŭ kalkuli pri multaj pliaj niveloj ekzemple la konflikto inter riĉaj kaj malriĉaj nacioj kaj ankaŭ inter Usono kaj Sovetio, ktp.

40. La islamanoj opinias ke Abraham estis ordonita oferi sian filon Iŝmael kiun li havis kun Hagar (kaj ne Isaakon (Jicĥak) kiel diras nia Biblio).

41. La tombejo de Muhammad troviĝas en Medina.

42. Kontraŭe al la bizancianoj, kiuj uzis la monton de la templo kiel ĉefa rubaĵejo por la urbo, Omar tuj purigis la lokon kaj baldaŭ estis tie konstruitaj sanktejo kaj moskeo, kiuj restis ĝis hodiaŭ (kvankam restaŭritaj kelkajn fojojn).

43. **Weizmann** (Chaim). - *Trial and error - the autobiography of Chaim Weizmann.* - New York, 1949. - p. 366.

44. Oni kalkulas ke proksimume triono de la judaj palestinanoj estus preferintaj la pacan vojon kaj tiel la eviton de milito. Multaj el la aktivaj pacamantoj proteste elmigris.

45. Herzl ankaŭ mencias tiun ideon en sia libro *Der Judenstaat* : «Se Lia Sultana Moŝto donus al ni Palestinon, ni povus komprense deklari nin pretaj tuj reguligi la financojn de Turkio.» Herzl (Teodoro). - *La juda ŝtato.* - Budapest : Literatura Mondo, 1934. - p. 50.

46. Unu el la unuaj kiuj menciis tiun problemon estis **Aĥad Ha-Am** en artikolo nomita *Vero de la lando Israelo* en 1891 (tio estis eĉ antaŭ la libro de Herzl)

47. Palestino ne estis vigla kaj floranta lando dum la 19-a jarcento, sed duondezerta kaj for de la ĉefvojoj, havante nur malmultajn enloĝantojn. Kiom malmultaj ili tamen estis, ili konsistigis la popolon de la lando, kaj kiam la judoj komencis alveni kaj tiel la ekonomia situacio pliboniĝis kaj laboreblecoj estis kreitaj, tio rezultis en rapida pligrandiĝo de la araba loĝantaro per natura kresko kaj enmigrado.

48. Herzl, 1934, p. 172.

49. Nocio klarigita ĉefe en *Der heilige Weg*, 1919. Ĝi havas kelkajn similecojn kun la "rusa" hilelismo dd Zamenhof.

50. **Buber** (Martin). - *Pointing the way : collected essays* / red. Maurice Friedman. - 1957. - pp. 234-235.

51. Weitzmann, 1949, p. 235.

52. Ibid., pp. 245-246.

53. Malmultaj vere objektivaj studoj pri la situacio de la araboj en Israelo estas faritaj. Preskaŭ ĉiuj faktoj en cirkulado havas aŭ por-israelan aŭ por-araban tendencon kaj oni ankoraŭ devas atendi multajn jarojn ĝis la historio povos prave juĝi, liberigita de subjektivaj konkludoj kaj tempaj oportunecoj.

54. Weizmann, 1949, p. 462.

----------------

## Bibliografio

**Andrae** (Tor), **Videngren** (Geo) . - *Muhammed - hans liv och hans tro.* - Stockholm : Natur och Kultur, 1967.

**Block** (Asher) . - The jewish tradition of peace, en *Fellowship*, febr. 1953.

Fredsförrdraget mellan Egypten och Israel, en *Tillbakablick* (informilo de la israela ambasado en Stockholm), 33, marto 1981.

**Gendler** (Everett). - Judaism and nonviolence, en *Fellowship*, jan.-feb. 1976.

**Herzl** (Teodoro). - *La juda ŝtato - provo de moderna solvo de la juda problemo.* - Budapest : Literatura Mondo, 1934.

**Jakobovitz** (Sir Immanuel). - The morality of warfare, en *L'Eylah*, 2, 4.

**Kimelman** (Reuven). - Nonviolence in the Talmud, en *Roots of jewish nonviolence.* - New York : Jewish Peace Fellowship, 1985.

**Rackman** (Emanuel). - Violence and the value of life : the halakhic view, en *Violence and defense in the jewish experience* / red. Salo Baronen, George Wise. - The Jewish Publication Society of America, 1977.

**Schwarzschild** (Stefen). - The necessity of the lone man, en *Fellowship*, majo 1965.

**Shapiro** (David S.). - The jewish attitude towards peace and war, en *Studies in jewish thought*, vol. 1, New York : Yeshiva University Press, 1975.

**Tamaret** (Aaron Samuel). - Politics and passion : an inquiry into the evils of our time, en *Judaism : a quaterly of Jewish life and thought*, 12, 1 vintra numero, 1963.

**Weizmann** (Chaim). - *Trial and error - the autobiography of Chaim Weizmann.* - New York : Harper & Brothers, 1949.

---

Jeremi GISHRON *(giŝron)*, israelano, naskiĝinta (1948) en Svedio, migrinta al Israelo en 1972. Studis ekonomion, geografion kaj religion. Doktoriĝis pri *Religiaj trajtoj en Esperanto*. Aktivas en Eldonejo *Sivron*.

# RELIGIISTOJ POR PACO

Intervjuo kun Rabeno Jeremi Milgrom, konata aktivisto de la Israela Pacmovado. Li estas 36-jara kaj loĝas en Israelo ekde 1968 partoprenante dum multaj jaroj en la juda-araba dialogo. La intervjuo okazis la 22-an de septembro 1989.

**Demando** : Kio estas via rekta partopreno en la Israela Pacmovado ? Rakontu pri la nova organizo kiun vi fondis.

**Respondo** : Jes, mi fondis novan grupon nomita "Religiistoj por Paco" (anglalingve *Clergy for Peace*, hebree *Anaŝej Dat Lema'an Ha-Ŝalom*, kaj arabe *Riĝal Din Min Aĝal As-Salam*), kaj ĝi estas la unua aktiva reto inter profesiaj religiuloj (religi-istoj), rabenoj, pastoroj, klerikoj, imamoj, kadioj kaj ŝejkoj en Israelo, kiuj estas dediĉitaj al establi la religian ordonon **micva** de paco en ĉiu aparta religio kaj ĉiuj kune, reciproke fortigante kaj subtenante unu la alian. Vidu, ekzistas interreligia dialogo kaj ankaŭ multa paclaboro estas farita, sed neniam ankoraŭ ekzistis **religia** paclaboro inter judoj kaj araboj. Kompreneble oni havas organizojn kiel *"Oz ve-Ŝalom"* (Forto kaj paco) kiu estas mirinda, sed ĝi estas nur por judoj. Ankaŭ ekzistas religiaj palestinanoj kiuj laboras por paco sed neniam rekte kunlaborante kun judoj. La komunaj programoj kiuj ekzistas inter judoj kaj araboj estas ĉefe ne-religiaj. Vere mi pensas ke la komuna faktoro inter la plimulto de judaj-arabaj dialogoj estas la fakto ke homoj sur ambaŭ flankoj flankenlasis siajn proprajn religiajn tradiciojn. Ili sentas bezonon rompi kun la reakcia aŭ eĉ rasisma naturo de iliaj religiaj tradicioj, kaj tial la dialogo estas ĉefe humanisma. Nia dialogo estas esence religia sed ankaŭ humanisma.

**Demando** : Ĉu ĉiuj pacaktivistoj en Israelo estas okupitaj kun la israela-araba konflikto aŭ ĉu vi ankaŭ laboras kun la pli ĝeneralaj problemoj kiel la nuklea minaco, la konflikto inter Okcidento kaj Oriento, k.t.p. ?

**Respondo** : Ekzistas individuoj kiuj laboras pri la problemoj de Meza Ameriko kiu lastatempe estis en la novaĵoj pro la kolombia ligo, vi scias, pri la drogoj kaj la vendado de militiloj tie. Ankaŭ ekzistas kelkaj israelaj aktivuloj kiuj zorgas pri Sud-Afriko, sed ĝenerale mi volas diri ke la pac-movado estas fokusita al la konflikto inter Israelo kaj la palestinanoj. Male al homoj ĉie aliloke en la mondo kiuj estas

okupitaj pri pacproblemoj pro siaj globalaj konsciojn, en Israelo oni fariĝas aktivisto ĉar oni devas iri al la armeo, ĉar viaj infanoj aŭ fratoj aŭ gepatroj servadas en la armeo kaj la tuta problemo fariĝas tre intima kaj proksima. Kvazaŭ rimedo por travivi en ege fizika maniero.

**Demando** : Ĉu vi estas aktiva en la organizo **Beit Hillel** en la Hebrea Universitato sur Monto Ha-Cofim kaj kiajn programojn ili havas ?

**Respondo** : Beit Hillel havis dum multaj jaroj juda-araban projekton kiu estis studenta dialoga projekto. Ĝi estis komencita de Rabeno Jack Kohiner, la antaŭa direktoro. Bedaŭrinde, post la emeritiĝo de Jack la programo iom post iom ĉesis ĉar mankis sufiĉe da pozitiva etoso. Li petis min daŭrigi kun la programo por kelke da tempo sed mi ne certas ĉu tiu studenta programo ankoraŭ funkcias.

Krome ekzistas multaj programoj kiuj organizas kunestadon de judoj kaj araboj en mez-lernejoj kaj eĉ en antaŭ-lernejoj. Kelkaj el tiuj programoj estas dediĉitaj al dialogo simple inter homoj sed aliaj grupoj estas pli direktitaj al politikaj celoj, la ĉesado de la okupado kaj simile. La programo en Beit Hillel estis tradicie dialogo por la valoro de la dialogo mem, tamen mi pensas ke ni ĉiuj komprenis ke ekzistis politika celo kiu povus esti atingota je la fino. Se ni komprenus unu la alian, ni ĉesus murdi unu la alian kaj ni permesus unu la alian politikajn kaj civitanajn rajtojn tiel kiel ni komprenas ke homoj devas esti.

**Demando** : Mi ankaŭ aŭdis pri la **Neve Shalom** projekto. Kiel ĝi funkcias ?

**Respondo** : Neve Shalom estas tre speciala loko, eble vi legis ke ĝia fondinto ĉi jare estis proponita por la Nobel-premio pri Paco. Neve Shalom estas pli ol dek jaroj aĝa, ĝi estas agrikultura vilaĝo kie judoj kaj araboj loĝas kaj vivas kune, tie vi havas judojn kaj arabojn laborantajn kune 24 horojn ĉiutage. Krom la vilaĝo ekzistas tie ankaŭ instituto nomita **La Lernejo por Paco**, kiu trejnas individuojn en dialogo. Mi mem ricevis mian unuan trejnon tie kiel konduki dialogojn kaj ili daŭrigas trejni homojn kaj kunigi klasojn de mezlernejanoj kaj simile. Tiu estas mirinda loko. Ĝi ne celas esti modelo por ĉio kio okazas en Israelo. La plimulto de judoj preferas vivi kun aliaj judoj kaj la plimulto de araboj preferas vivi kun aliaj araboj, sed mi opinias ke kiel pruvo ke oni povas vivi kune, ĝi estas tre grava.

**Demando** : Pri kio okupiĝas la **Palestina Instituto por la Studo de Senperforto** ?

**Respondo** : Tiu instituto estis fondita de D-ro Mubarak Awad, kiu estis bedaŭrinde deportita pasintan jaron ĉar la registaro pretendis ke li estis perdinta sian loĝrajton kaj kiel turisto ĝi havis la rajton sendi lin "hejmen", rifuzante plilongigi lian vizon. Tiu centro laboras kune kun grupo de israelanoj kaj palestinanoj por senperforto. Post la forveturo de Mubarak, Nassif Aseila fariĝis la direktoro. Ili faras multe da dokumentado pri senigo de civitanaj rajtoj kaj ili ekzistas kiel loko kie homoj povus studi senperforton. Sed mi pensas ke la tuta demando ĉu la *intifada* estas perforta aŭ senperforta, aŭ je tia grado ĝi eble estas perforta, estas demando kiu bezonas pli da tempo.

**Demando** : La iniciatinto de Esperanto, D-ro L.L. Zamenhof ankaŭ estis pacaktivulo kaj li havis kelkajn originalajn ideojn, ke ne per desegnado de landlimoj sur la mapoj oni povas krei pacon, sed nur per la antaŭenigo de egaleco inter ĉiuj homoj. Li eĉ venis al la ekstrema vidpunkto ke oni devas ĉesi nomi ŝtatojn laŭ popoloj. Kion vi pensas pri tiuj ideoj ?

**Respondo** : Mi pensas ke ili estas esence veraj, nur ke oni devas kompreni ke ambaŭ popoloj ĉi tie, la juda kaj la palestina popoloj, serĉas por si mem sendependecon, t.e. atingi tian situacion, ke la popolo mem respondecas pri sia kulturo, religie, politike kaj etne, kaj tial neniu el la du popoloj vere volas fali en tiun situacion ke ĝia plimulto kaj superrego povas esti minacita. Mi kredas ke la plimulto de la palestinanoj same preferas vivi en lando kiu estas ĉefe palestina. Spite al tio ke mi samopinias kun vi ĉar persone kaj ideologie mi ne opinias ke naciismo havas grandan valoron, maksimume naciismo povas esti ilo por antaŭenigi la interesojn kaj bezonojn de unu grupo kaj neniam ĝi devas fariĝi la idolo por iu abstrakta valoro. En tiu spirito de sen-naciismo mi pensas ke Israelo devas esti la lando de ĉiuj ĝiaj civitanoj kaj ke homo povas esti kaj judo kaj palestinano en tiu kunteksto ktp., tamen mi ne rekomendas ke en la hodiaŭa situacio la tuta Israelo de la Mediteraneo ĝis la rivero Jordan estu du-nacia ŝtato de ĉiuj iliaj civitanoj.

**Demando** : Kial pri la Eŭropa ekzemplo kie oni nun volas forigi la landlimojn inter la ŝtatoj kaj establi komunan merkaton. Ĉu eble tio estas la direkto de la historio ?

**Respondo** : Mi preferus kredi tion se mi nur povus. Permesu min respondi iomete pli longe kaj eble mia vidpunkto elstaras pli klare. Mi pensas ke ekzistas ege forta sento de aparteneco al grupo, ĉiu individuo scias ĉu li estas judo aŭ palestinano. La situacio ĉi tie ne similas tiun en Eŭropo aŭ Usono, kie oni povas esti kosmopolito. La tuta pakaĵo : kulturo, religio, historio kaj destino estas intime kunplektitaj kaj ili estas la aferoj kiuj gravas por la judoj kaj same por la palestinanoj. Mi pensas ke du ŝtatoj plej bone solvos la homajn timojn. Homoj timas esti subpremitaj. Bone... ni havu unu lando kiu estas ĉefe juda, kaj alia kiue estas ĉefe palestina kaj fine... espereble, ni povos labori en direkto de konfederacio laŭ la modelo de la eŭropa Komuna Merkato kiun vi menciis.

**Demando** : Kion pri la civitanaj rajtoj de la araboj en Israelo propra kaj en la teritorioj ?

**Respondo** : Ĉi tie ni estas en tre malbona situacio. Nedubeble estas ke la araboj havas tre malmulte da civitanaj rajtoj en la teritorioj. Laŭ difino ili malhavas civitanajn rajtojn ĉar ili estas sub milita regado, kiu estas kelkfoje indulga kaj kelkfoje tre severa. Dum la pasintaj du jaroj ĝi certe fariĝis severa kaj ĝi estis sufiĉe severa ankaŭ antaŭe. En Israelo mem, la araboj ne havas plenajn civitanajn rajtojn kaj preskaŭ ĉiu judo kiun vo alparolas agnoskos tiun fakton. La demando estas : ĉu li estas komforta kun tiu fakto aŭ ne ? Mi pensas ke la plimulto de pensantaj judoj dirus ke tiu estas malbona situacio. Ĝi kondukos al malamikeco kaj al plia streĉiĝo kaj malsekureco. Sed multaj judoj krome aldonus ke nenia alia alternativo ekzistas tiel longe kiel ni havas sekurecajn problemojn kaj tiel longe ni ankoraŭ estos en milito kun la ĉirkaŭaj ŝtatoj, ktp. Ni devas sekuri plenan kontrolon super ĉiuj aferoj, kaj la individuaj rajtoj de la araboj havas duan rangon de graveco post nia bezono de grupa pluvivo.

Mi ne komplete akceptas tiun argumenton, kaj mi nek komplete rifuzas ĝin, sed mi malakceptas ĝin en ĝiaj ĉefaj aspektoj, t.e. ke mi kredas ke ne sufiĉaj klopodoj estas faritaj en ĉi tiu lando por garantii la integrigon kaj partnerigon de la israelaj araboj. Kelkaj el la eraroj devenas de la historio mem de la ŝtato. Ĝi estis en 1948 establita sole per judoj. Ĉiuj subskribintoj de la Deklaracio de sendependeco estis judoj, kaj iamaniere esti arabo en ĉi tiu lando ankoraŭ signifas preskaŭ difine, duan klasstatuson. En aliaj vortoj, la celo de la ŝtato kiel

difinita de la Ŝtato mem ankoraŭ estas servi la bezonojn de la juda popolo en la tuta mondo. Tio signifas ke judo kiu alvenas al ĉi tiu lando tuj povas aŭtomate ricevi sian civitanecon laŭ la leĝo de reveno. La maniero en kiu la Ŝtato ellaboris siajn regulojn, kaj tio estas terura skandalo kaj tragedio, havis la rezulton ke palestinano kiu naskiĝis ĉi tie ne plu povas fariĝi civitano se li loĝis ekster la lando dum la malmultaj jaroj post 1948, kaj se li volus poste reveni mankas al li ĉiujn rajtojn. Lia posedaĵo jam estus eksproprietigita kaj uzita de la ŝtato. Tio vere estas ege trista situacio, kaj mi pensas ke ĉi tie ni havas neniigon de la civitanaj rajtoj. Tio estas io pri kio kelkaj judoj tre konscias, kaj la plimulto de judoj iagrade scias. Kelkaj judoj fakte pensas ke tio estas en ordo, ka la araboj iru ien aliloken, kaj mi pensas ke tio estas kvazaŭ parodio de pensado. En aliaj vortoj, kelkfoje nia sensekureco kaj nia bezono pri sekura hejmolando fariĝas la kialo por rifuzi al iu alia lian hejmolandon. Mi pensas ke tiu estas terura eraro kaj tre nejuda pensmaniero.

Tamen ni devas konfesi ke niaj klasikaj judaj tekstoj ne mencias la rajton de iu alia popolo al nia lando, ili rilatas nur al nia rajto al ĝi. Ekzistas tial danĝero de maltoleremo kaj tiuj kiuj prizorgas religion devas montri kiel prave interpreti tiujn tekstojn en la hodiaŭa situacio.

**Demando :** Ĉu vi pensas ke povas ekesti nuklea minaco en la regiono, ke la israelanoj kaj la araboj ekposedos tiajn militilojn ?

**Respondo :** Mi pensas ke la nuklea minaco estas tre reala ĉi tie. Ŝajnas tre eble ke ni jam havas la bombon kaj la danĝero ĉi tie estas danĝero por la tuta mondo. Ĉar kiam oni uzas nukleajn militilojn oni malpurigas la tutan teron, kaj certe oni havas moralan problemon atakante senkulpajn nemilitantojn. Ekzistas kvazaŭ ĝenerala konsento en la mondo ke nemilitantoj havas la rajton je vivo, eble la soldato ne havas. Iu kiu kredas je senperforto dirus : «Mi ankaŭ ne vundos tiun soldaton», sed certe la plimulto de homoj en la mondo akceptas ke nemilitantoj, virinoj kaj infanoj, estus liberaj de tiu politika puno. La nuklea bombo estas politika puno por tuta populacio kaj por la mondo.

Povas okazi ke oni uzu ĝin ie kaj pro tio mi pensas ke oni devas labori por malpermesi la bombon ĉie. Se Israelo estas evoluinta atoman potencialon, tio denove estas reflekso de ĝia malsekureco.

**Demando :** Kiel vi vidas la estontecon de la pacprocedoj ? Ĉu vi vidas la futuron en helaj aŭ malhelaj perpektivoj ? Eble oni fine venos al iu pli firma komenco ?

**Respondo :** La konflikto en ĉi tiu momento estas tia ke la israelanoj povas pli aŭ malpli reteni ĝin, israelanoj vivas ĝoje kaj prospere kaj suferas nur iomete, dum la suferado estas treege granda sur la palestina flanko. Kaj la plej granda problemo estas, ĉar niaj vivoj ne estas perturbitaj tiel multe nenio movas nin cedi. Mi pensas, ke multe dependas de la grandpotencoj por movigi Israelon en direkto de negocioj, trovi la kondiĉojn por ke Israelo sentas sin tiel forta kaj sekura ke ĝi povas elteni la spekulacion pri paco. Sed mi pensas ke ni ankaŭ devas eduki la popolon ke tio kion ni faras ne estas akceptebla ĉar ni punas tutan populacion, kaj ke nia sekureco vere dependas de tio ke ni sukcesos etendi la manon al la palestinanoj. Multaj pensas ke nia sekureco dependas de tio ke la palestinanoj foriros kaj malaperos, sed tio estas ege trista iluzio. Kaj krome ĝi estas malmorala iluzio, kiu neniam okazos. La palestinanoj ne foriros kaj la *intifada* pruvos tion. Mi volus diri ke multaj homoj estas malpli esperplenaj nun ol iam antaŭe.

**Demando :** Kiam Sa-ro Naryan Desai el Bharato (Hindio), la filo de la sekretario de M. Gandhi, estis tie, li parolis pri senperforto kiel vivovojo male al senperforto nur kiel praktika agado por solvi politikajn problemojn. Kion vi pensas pri tio ?

**Respondo :** Mi pensas ke senperforto estas ege profunda filozofio. Kaj ĝi povas esti io, kion oni provas realigi ĉiam. Mi esperas ke homoj kiuj eble uzas senperforton nur por praktikaj taktikaj celoj ankaŭ estas tuŝitaj spirite, tiel ke la agado fariĝas pli ol nura taktiko. Por mi ĝi estas proksima al mia kredo kaj mi preferas paroli pri ĝi laŭ larĝaj perspektivoj kaj ne nur kiel taktiko.

Se oni konsideras senperforton nur taktikon, tio signifas ke oni ankoraŭ provas gajni, kaj tio estas ege malmatura sinteno. Mi pensas ke ju pli frue homoj komprenas ke aŭ ĉiuj gajnas aŭ ĉiuj malgajnas des pli bone. Kaj kiam oni parolas tiel oni jam parolas pri senperforto kiel filozofio kaj kiel vivovojo. Mi pensas ke tiu vivovojo tre povas spirite riĉigi la homon.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Intervjuis kaj tradukis Jeremi Gishron (Israelo)
parte aperinta en *Jerusalema bulteno*, 7

numero 8

## LA SANKTA SPIRITO

Mi proponas al vi verki pri aspekto de tiu ĉi granda (!) temo. Jen do listo de eblaj subtemoj. Vi komprenenble povas proponi ion tute alian, kadre de la sama ĝenerala temo.

Via respondo jesa aŭ nea alvenu plej rapide kiel eble, kaj en jesa kazo, via artikolo alvenu al mi en septembro (aŭ antaŭe kiam finverkita). Se vi bezonas pliajn semajnojn, tiam, bonvolu averti min.

- Kiu estas la Sankta Spirito ?
- Kion faras la Sankta Spirito ?
- Kiel oni parolas pri Li (Biblio, teologoj, ktp).
- La Spirito en la juda kompreno (resp. alia)
- Pentekosto
- La Konsolanto (parakleto)

- La promeso de la Sankta Spirito
- La pleneco de la Sankta Spirito
- La fruktoj de la Sankta Spirito
- La donacoj de la Sankta Spirito
- La potenco de la Sankta Spirito
- La baptado en la Sankta Spirito
- Naskita en la Sankta Spirito
- la Sankta Spirito kaj la Sanktaj Skriboj

- La ĥarisma vekiĝo
- La parolo en lingvoj

- recenzoj pri la Sankta Spirito

ABONOJ

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF (ECU 10)
(vi nepre indiku por kiu jaro, aŭ ekde kiu numero).

al *Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.*
per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio,
aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al **Aŭstrio**, *Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien*
ÖPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer

**Belgio**, *Jacques Lemaire, r. des Déportés 100, 6180 Courcelles*
konto 001-0405933-64

**Britio**, *Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN*
national giro, FEBC, 65274 0006

**F.R. Germanio**, *Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald*
Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60

**Irlando**, *Maire Mullarney, Mill h., Whitechurch Rd, Rathfarnham, Dublin 14*

**Israelo**, *Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem*

**Italio**, *Centra Oficejo de IKUE, v. F. Berni 9, 00185 Roma*
CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000

**Nederlando**, *Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen*
post giro, KELI, 5506132

**Svedio**, *Arne Lundkvist, Skohornbacken 73, 126 39 Hägersten*
poŝtĝirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0

**Svislando**, *Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen*
poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8 Zürich

**Usono**, *Cornelius McKown, 460 Orlando Ave., State College, Pa 16803*

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, pere de la konto **evka-e**.
(vidu en la jarlibro de UEA 1989, ĉe la paĝo 34)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

Parabolo de la graco, kiun donas la mondo 2

Jacques TUINDER : La Regno de Dio kaj Lia justeco 3

Theotima ROTTHAUS : Al malriĉuloj Evangelio estas predikata 9

MA Young-tae : Ĉiela paco kaj monda paco 15

KóBOR Lajos : Pri la Dia justeco 19

Marcel COLLEU : Amo de Dio, amo al Dio 25

Adolf BURKHARDT : Inter Diluvo kaj Ĉiel-arko 29

Peter HAYWARD : Homa justeco 35

*Nacia Sinodo de la F.R.E.* : Evangelio kaj Servo 39

Battista CADEI : Assisi : Paco inter la religioj ? 45

Gerrit BERVELING : ’EIPHNH, PAX, ŜALOM 53

William AULD : Paco inter homoj : Ĉu eblas ? 55

Jeremi GISHRON : Milito kaj paco sur la tero de la fidoj 67

Jeremi MILGROM : Religiistoj por paco (intervjuo) 85

prezo : 35 FRF (ECU 5)